

HISPANA ESPERANTO - BIBLIOTEKO

HISTORIO - ARTO - LITERATURO - TRADICIO - BELAJ NATURAĴOJ K. C.

DU JUNAJ FRAŬLINOJ

KAJ

KORNELIINO

DU NOVELOJ EL LA BONEKZEMPLAJ DE

MIĤAELO DE CERVANTES

(TUTMONDFAMA AŬTORO DE «KIĤOTO»)

TRADUKITAJ DE

JULIO MANGADA ROSENÖRN

PREZO: 1'75 Fr. sv.

(TRI RESPONDKUPONOJ)

ADRESO:

GLORIETA DE BILBAO, 5. — MADRID

HISPANUJO

3266

HISPANA ESPERANTO-BIBLIOTEKO

celas eldoni jare se eble dekdu librojn ĉiu 32 paĝa almenaŭ, $13\frac{1}{2} \times 19\frac{1}{2}$ cm., pri literaturo, historio, folkloro, k. t. p., de Hispanujo, kun belaj ilustritaĵoj kaj muzikaĵoj, sur luksa papero. La plej malmultekosta libraro estas ĉi tiu Biblioteko.

Abonu kaj abonigu la Bibliotekon sendante 8 sv fr. por dekdu kajeroj; enlandanoj, 7 pesetojn. Ĉi tiu anonco nuligas ĉiujn antaŭajn. Abonanto tuj ricevos *ok kajerojn*: el ili «Avila» kun 30 bildoj, «Ferdinando VI^a kaj Farinelli», historia novelo proze kaj verse verkita; «Pri Hispanujo kaj ĝiaj Popolkantoj, Popolkantaro de Murcia», kun muzikaĵoj kaj bildoj, pri kiu «Heroldo de Esperanto» diras: «eble estas ĝusta esprimo nomi ĝin tre alloga prelego»; «El Moderna Hispana Parnaso» kun multaj belaj bildoj; k. c.

Grupoj kaj Asocioj devas aĉeti la Kolekton de «Hispana Esperantisto» (1917-22), kiu formas luksan belegan volumon kun interesa teksto kaj multenombraj ilustritaĵoj pri hispanaj monumentoj. 25 sv. fr. por fremduloj; 25 pesetojn por enlandanoj.

Listo al abonantoj (daŭrigo):

38. S-ro Eladio Fort.—Rambla de la Paz, 34, *Villanueva y Geltrú* (Barcelona).
39. » Andrés Castro, Komandante de Doganĝendarmoj.—*Pontevedra*.
40. » Benigno Luna.—Abascal, 45, *Madrid*.
41. » Pedro García.—Talleres de la Puntilla, *Ceuta*.
42. » Sebastián Chaler.—San Mariano, 124, *Tarrasa*(Barcelona).
43. » Epitacio García.—Luisa Fernanda, 25, *Madrid*.
- 44 al 50. «*Esperantujo*». —(S-ro Šimonek) 1500 W. Cullerton *Chicago III* (Usono).
51. S-ro Fructuoso Velayos.—Castelló, 9, *Madrid*.
52. » José Lerroux.—Menéndez Pelayo, 30, *Madrid*.
53. » Vicente Moreno.—Mayor, 86, *Madrid*.
54. » Francisco Martínez Vallejo.—Av. Dr. Federico Rubio, 57, *Madrid*.
55. » Mariano Cardona.—Paseo del Dr. Esquerdo, *Madrid*.
56. » Luis Campos.—San Miguel 17, *Melilla*.
57. » Juan Ratés.—Barcelona, 38; *Rubi* (Barcelona).

HISPANA ESPERANTO-BIBLIOTEKO

HISTORIO - ARTO - LITERATURO - TRADICIO - BELAJ NATURAĴOJ K. C.

DU JUNAJ FRAŬLINOJ

KAJ

KORNELIINO

DU NOVELOJ EL LA BONEKZEMPLAJ DE
MIĤAELO DE CERVANTES

(TUTMONDFAMA AŬTORO DE «KIĤOTO»)

TRADUKITAJ DE

JULIO MANGADA ROSENÖRN

PREZO: 1'75 Fr. sv.

(TRI RESPONDKUPONOJ)

ADRESO:

GLORIETA DE BILBAO, 5. — MADRID

HISPANUJO

ANTAŬKLARIGOJ DE LA TRADUKINTO

Ĉar mi celis traduki fidele, konservante samtempe kiel eble plej formon kaj stilon de la tutmondfama aŭtoro, eble oni trovos la tradukojn strangaj, kvankam mi ankaŭ celis alĝustigi ĉi tiujn al la internacia celo de esperanto.

Mi pensis eldoni ciun noveleton aparte, sed fine mi decidis aperigi ilin kune, formante ĉi tiun duoblan numeron de ĉi biblioteko, kiun sekvos «Muzika Folkloro de Kubo» kun nombraj muzikaĵoj kaj kantoj; kaj jam estas preparitaj aliaj verketoj, el ili unu pri la hispana araba poezio kaj ĝia influo en la hispanan kristanan, tre interesa verketo kun arabaj versaĵoj tradukitaj kaj komparo de ĉi tiuj kun kristanaj.



FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESPERANTO
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

DU JUNAJ FRAŬINOJ

Kvin mejlojn de urbo Seviljo staras vilaĝo, kiun oni nomas Kastil-blanko, kaj en unu el la multaj gastejoj, kiujn ĝi havas, je la vesperigo, eniris vojiranto, rajdante sur bela fremda ĉevalo; ne akompanis lin iu servisto, kaj li, ne atendante, ke iu subtenu al li la piedingon, desaltis de la selo tre rapide.

Alkuris poste la gastejmastro—kiu estis viro diligenta kaj honora—; sed ne sufiĉe rapide, ĉar kiam li alvenis jam la vojaĝanto estis sidanta sur ŝtonbenko de la vestiblo, kaj malbutonumanta tre rapide siajn butonojn ĉe la brusto eĉ faliganta siajn brakojn ambaŭflanken, kvazaŭ li svenus, la mastrino, kiu estis bonfarema, sin alproksimigis al li, kaj aspergante lian vizaĝon per akvo, ŝi rekonsciigis lin, kaj ĉi tiu, elmontrante ĉagrenon, ĉar oni estis vidinta lin tiel, rebutonumis la butonojn, petante, ke oni donu al li tuj ĉambro por pasigi la nokton, kaj ke, laŭ eblo, la ĉambro estu por li sola.

La mastrino diris al li ke nur estis en la tuta domo unu ĉambro havanta du litojn, kaj estus nepre se iu gasto alvenus, loĝigi lin por ripozi en unu el ambaŭ. Pro kio, la vojaĝanto decidis pagi la du litojn, kaj tirante el sia poŝo oran moneron, ĉi tiun li donis al la gastejstrino kondiĉe ke ŝi ne difinu al iu la vakantan liton.

Ne sin montris la gastejmastrino malkontenta je la pago; male, ŝi promesis fari tion kion li petis de ŝi eĉ se la ĉefkanoniko de Seviljo alvenus tiun nokton al ŝia hejmo. Ŝi demandis al li ĉu li volis vespermanĝi kaj la vojaĝanto respondis nee rimarkigante nur sian deziron pri kiel eble plej bona zorgo por sia kvarpiedulo, petante tuj la ŝlosilon de la dormoĉambro li aliris al ĝi kaj en ĝin eniris, fermante tuj la pordon, kiun li ŝlosis kaj eĉ li apogis du seĝojn al la pordo laŭ oni povis poste verŝajne kredi.

Apenaŭ li estis sin enferminta, kiam kunvenis interesanĝi opiniojn la mastro, la servisto, atentante la zorgon por la bestoj, kaj du vilaĝanoj, kiuj hazarde tie de antaŭe estis, ĉe la gastejo, kaj ĉiuj pritraktis la

grandan belecon kaj gracion sintenadon de la nova gasto, konkludante ke neniam ili estis vidintaj tiel grandan belecon; ili kalkulis proksimume lian aĝon, ke li estis dek ses aŭ dek sep-jara; pri tio, kio povis kaŭzi la svenon okazintan al li, kaj tial ke ili ne povis trafi la kaŭzon, ili restis en supozo pli-malpli verŝajna laŭ siaj opinioj, sed, tamen, mirigite de lia belsinteno. La vilaĝanoj foriris al siaj hejmoj, la mastro doni la hordemangaĵon por la ĉevalo, kaj la mastrino pretigi ian manĝaĵon por ebla nova gasto. Kaj ne pasis multe da tempo, kiam eniris alia iom pli aĝa ol la unua kaj ne malpli belsintena, kaj apenaŭ la mastrino lin aŭdis, ŝi diris al li:

—Dio helpu min, kio estas ĉi tio? Ĉu venas, feliĉe, ĉi tiun nokton sin gastigi anĝeloj ĉe mia domo?

—Kial diras tion ĉi ŝia mastrino Moŝto?—demandis la kavaliro.

—Mi ne diras tion pro io, sinjoro; mi nur diras, ke vi, kavaliro Moŝto, ne desaltu de la selo, ĉar mi ne havas ĉambron kaj liton, kiun liveri al vi, ĉar ĵus luis la solan ĉambron kun du litoj kavaliro, kiu dezirante resti sola, pagis al mi la du litojn, kvankam kompreneble li nur bezonas unu; kredeble li devas ŝati la solecon; kaj je Dio kaj je mia animo, ke mi ne scias kial, ĉar li ne havas vizagaĵon kaj sintenadon por sin kaŝi, sed male, por ke la tuta mondo lin rigardu kaj benu—diris ŝi.

—Ĉu tiel bela estas li, mastrino Moŝto?—redemandis la kavaliro.

—Ne nur bela, eĉ belega li estas—reĉiris ŝi.

—Ĉi tien, tenu—diris, je ĉi tiu klarigo, la kavaliro—ĉar kvankam mi dormu sur la planko, mi vidos la viron, kiu tiel estas laŭdata.

Kaj donante la piedingon por ĝin subteni al mulkondukisto lin akompananta, la kavaliro saltis de la selo teren kaj ordonis servi al li la vespermanĝon; ĉi tion faris la gastejmastrino. Dum li vespermanĝis, eniris vilaĝpedelo—kiel kutime okazas en la malgrandaj vilaĝoj—, kiu sidigis por babiladi kun la kavaliro dum ĉi tiu vespermanĝis, kaj li ne forgesis, inter argumento kaj argumento, engluti tri glasetojn da vino kaj elkarnigi mordetante brustostaron kaj kokson el perdriko, kiujn donis al li la kavaliro, kaj ĉion pagis la vilaĝpedelo demandante novaĵojn pri la kortego, pri la milito en Flamujo kaj alveno de la Turko, ne forgesante la sukcesojn de l'Transilvano, kiun nia Dio gardu.

La kavaliro vespermanĝis kaj silentis, ĉar li, veninte de neniu loko concernata de la demandoj, ne povis satigi la scivolemon de la vilaĝpedelo. Dum ĉi tio okazis la gastejmastrino estis zorganta la ĉevalon kaj li sin sidigis poste apud la kavaliro kaj la pedelo por partopreni la kon-

versacion kaj gustumi sian vinon mem, pagotan de la kavaliro, ne malpli ol la vilaĝpedelo; kaj je ĉiu vinporcio englutita, li turnis kaj klinis sian kapon al la maldekstra ŝultro kaj laŭdadis la vinon altigante ĝin en la nubojn sed ne lasante ĝin tie pro timo ke ĝi akvumiĝu, laŭ la granda rapido per kiu li relaŭdadis kaj reenglutadis. De afero en aferon, ili revenis al la laŭdoj pri la enfermata gasto, pri liaj sveno kaj enfermo, aldonante la gastejmastro ke la enfermato ne volis vespermanĝi, trograndigante la pompon de la sakoj, la superecon de la ĉevalo, kaj riceŝon de la brila vojkostumo vestita de li, pro kio la gastejmastro opiniis esti strangaĵo, ke la enfermaton ne akompanis servisto. Ĉiuj tiuj ĉi trograndigaĵoj naskis novajn dezirojn ĉe la kavaliro vidi la enfermaton, kaj tiu petis je la gastejmastro fari ion ajn por ke li povu eniri ripozi sur la alia vakanta lito, dononte pro tio oran moneron; kaj tial ke la promeso elvekis avidemon de la gastejmastro, la avidemo naskis ĉe ĉi tiu deziron havigi la liton al la kavaliro, tamen la avarulo konsciis tio neebla, ĉar la pordo de la ĉambro estis fermata de interne kaj li ne kuragiis veki tiun kiu tie dormis kaj kiu ankaŭ estis paginta la du litojn. Sed ĉion tion ĉi solvis la vilaĝpedelo dirante:

— Tio, kion ni povas fari, estas, ke mi frapu la pordon dirante, ke mi estas aŭtoritatulo, kiu, pro ordono de la urbestra Moŝto, kondukas ĉi tiun kavaliro en ĉi tiun gastejon por lin loĝigi, kaj ĉar ne estas vakanta alia lito, mi ordonas al la enfermato, ke li donu la vakantan. La gasto certe protestos, kaj diros ke oni faras al li ofendon, ĉar la lito estas luita de li, kaj ne estas juste depreni ĝin al tiu, kiu ĝin pagis; sed la ordono senkulpigos la gastejmastron kaj lia Moŝto antigos sian celon.

Al ĉiuj ŝajnis taŭga la ruzaĵo de la vilaĝpedelo, kaj la kavaliro lin rekompencis per kvar realoj.

Oni efektivigis poste la planon; kaj fine, montrante grandan ĉagrenon, la unua gastigato malfermis la pordon al la aŭtoritatulo, kaj la dua kavaliro, petante pardonon pro la ofendo, kiun verŝajne oni estis farinta al la unua, sin direktis sin kuŝigi sur la neokupatan liton; sed nek la unua respondis eĉ parolon, nek vidigis sian vizaĝon, ĉar apenaŭ li estis malferminta la pordon, li aliris al sia lito, kaj kun la vizaĝo turnita al la muro, por ne respondi, li ŝajnis dormi. La dua gastigato sin kuŝigis esperante satigi sian scivolemon je la mateno, je la ellitiĝo. Estis decembra nokto el tiuj longaj kaj invitantaj al ripozado, super ĉio post laciĝo pro vojrajdado; sed la unua gasto ne estis trankvila, kaj

tuj post la noktomezo, li komencis sopiri tiel ĉagrene, ke ĉiu sopiro ŝajnis esti adiaŭo de lia animo forlasanta lin; kaj tio okazis tiamaniere, ke, kvankam la dua dormis, li vekigis pro la plendado de la ĝemanto, kaj mirigate de la ploregoj akompanantaj la sopirojn atente li sin pretigis aŭskulti tion kion verŝajne la plendanto estu murmuretonta al si mem. Estis la ĉambro en mallumo, kaj tre apartigataj la litoj unu de alia; sed tamen la dua gasto aŭdis dirojn, el ili ĉi tiujn, kiujn per voĉo mallaŭta kaj delikata, la ĉagrenato diris:

—Ve al mi, malfeliĉa! Kien puŝas min la nekontraŭstarebla forto de mia fatalo? Kiu vojo estas mia, aŭ kiel mi esperas eliri el la konfuza labirinto en kiu mi min trovas? Ve, malmultaj kaj nespertaj jaroj, nekapablaj je ĉiu bona konsidero kaj konsiliĝo! Kia fino estos al ĉi tiu nekonata pilgrimado mia? Ve, honoro malestimata; ve, amo nedankata; ve, respekto al honoraj gepatroj kaj parencoj ofenditaj kaj ve al mi, fojon kaj milfojojn ve, ĉar tiel freneze mi min forlasis al miaj deziroj! Ho trompintaj paroloj, kiuj tiel potence devigis min respondi per faroj! Sed, je kiu mi plendas, malfeliĉa! Ĉu ne estis mi mem, kiu volis sin trompi? Ĉu ne estis mi mem, kiu prenis la tranĉilon per siaj propaj manoj por tranĉi kaj terĵeti sian honoron kun tiu, kiun pri mia valoro havis miaj maljunaj gepatroj? Ho, perfida Marko Antono! Kiel estas eble, ke kun la dolĉaj paroloj, kiujn vi diris al mi, miksigis la galo de viaj malĝentilajoj kaj malestimoj? Kie vi estas, nedankemulo; kien vi iris, nekomprenita perfidulo? Respondu al mi, ĉar mi min turnas al vi; atendu min, ĉar mi vin sekvas; subtentu min, ĉar mi malfortigas; pagu al mi tion, kion vi ŝuldas al mi; helpu min, ĉar per multnombraj agoj, vi estas devigata al mi.

Tion dirinte, li silentis, montrante per la vegoj kaj sopiroj, kè el liaj okuloj ŝprucadis malĝojaj larmoj. Ĉion, silente kaj trankvile, estis aŭskultanta la dua gasto, konjektante, per la diroj, kiujn li estis aŭdinta ke sendube tiu, kiu plendis, estis virino, kaj tio ĉi ekscitis pli lin koni ŝin, kaj multfoje li estis decidata aliri al la lito de la verŝajna virino, kaj tion li estus farinta se je tiu momento mem li ne estus rimarkinta ke la plendanto ellitiĝis, malfermis la pordon kaj diris vokante la gastejmastron por ke oni surmetu la selon kaj bridon al la ĉevalo, por ekvoĵiri denove. Je tio, depost iom longa tempo, dum la gasto vokadis, la gastejmastro respondis por trankviligi la gaston ĉar ankoraŭ ne estis pasinta la noktomezo kaj la mallumeco ĉe la kamparo estis malpermesanta vojrajdi kaj ke ĉi tion fari estus malsaĝaĵo. La vokinto trankvi-

ligis, kaj reenirinte en la ĉambron, li refermis la pordon sopirante profunde.

Ŝajnis al tiu, kiu aŭskultadis, esti dece alparoli al la plendinto kaj proponi al li por lia servo tion, kion li estis povanta, devigante la plendinton per ĉi tio montriĝi malkaŝe kaj rakonti lian historion; kaj tiel, la aŭskultinto diris:

— Vere, kavalira Moŝto, se la sopiroj ellasitaj de vi, kaj la paroloj, kiujn vi diris, ne estus kortuŝintaj min por bedaŭri la malbonon pri kiu vi plendas, mi konscius ne havi naturan sentemon, aŭ ke mia animo estas el ŝtono kaj mia brusto el malmola bronzo; kaj se ĉi tiu kompatato, kiun mi sentas al vi, kaj la decido, kiu en mi naskiĝis, meti mian vivon je via savo — se tiu ĉi estos ebla por via malfeliĉo — meritis iun ĝentilaĵon, rekompence mi petas je vi, ke vi vin konduitu klarigante al mi la kaŭzon de via doloro, kaŝante al mi nenion.

— Se la doloro ne estus freneziginta min — diris la plendinto —, bone mi devus memori, ke mi ne estas sola en ĉi tiu ĉambro, kaj mi estus metinta pli da singardemo ĉe mia lango kaj pli da sindeteno en loko, kie tiel grave estas al mi llin posedi, mi volas fari tion, kion vi petis je mi, renovigante la doloran historion de miaj malfeliĉoj; eble okazos, ke la nova doloro min mortfrapu; sed se vi volas, ke mi faru tion, kion vi petis je mi, vi devas promesi al mi, je la intereso, kiun vi elmontris al mi, laŭ la propono farita de vi, kaj je via kavalireco mem — ĉar per tio, kion viaj paroloj esprimas, vi promesas multe —, ke spite de ĉio, kion vi aŭdos de mi, laŭ mi diros, vi ne forlasos vian liton, nek vi venos en mian, nek vi demandos pli ol tion, kion mi volos diri; ĉar se vi farus male, je la momento mem, kiam mi rimarkos vian movon, per glavo, kiun mi havas ĉe la kapparto de la lito, mi trapikos mian bruston.

La alia, kiu milojn da neebloj promesus por scii tion, kion li tiel deziris, respondis, ke li ne malplenumos eĉ unu punkton el ĉio kion la unua petis, tion atestante per multenombraj juroj.

— Kun tiu promeso, do — diris la unua —, mi faros tion, kion ĝis nun mi ne faris, tio estas, doni klarigojn pri mia vivo al iu, kaj tial aŭskultu: sciu, sinjoro, ke mi en ĉi tiun gastejon eniris, kiel sendube oni diris al vi, vestite kiel viro, sed mi estas malfeliĉa fraŭlino, almenaŭ tia mi estis antaŭ ok tagoj kaj jam ne estas pro nesperteco kaj frenezigo, ĉar mi fidis al paroloj aldiritaj kaj maskitaj de perfida viro; mia nomo estas Teodosiino; mia naskiĝloko, el ĉefaj de ĉi tiu Andaluzio, kies nomon mi silentas — ĉar ne estas al vi tiel interese koni ĝin, kiel al mi ĝin

silenti—; miaj gepatroj estas nobelaj, kaj pli ol mezriĉaj, kiuj havas filon kaj filinon, la filo por ilia trankvilo kaj honoro, la filino por la malo; ili lin sendis por studi al Salamanko; ili min havis ĉe si, kie ili min edukadis per la hejmemeco kaj ĉasteco, kiujn iliaj virtoj kaj nobleco postulis, kaj mi sen ia ĉagreno ĉiam estis obeema je ili, algustigante mian volon al ilia, ĝis kiam mia malgranda sorto aŭ mia granda kuraĝo, proponis al miaj okuloj filon de najbaro nia pli riĉa ol mia patro kaj tiel nobela kiel mia patro ankaŭ. Unuan fojon kiam mi lin rigardis mi ne sentis alian ajon pli ol komplezon esti vidinta lin; kaj ne estis multo, ĉar liaj belvestaro, ĝentileco, vizaĝo kaj sintenado estis el la laŭdataj kaj estimataj de la publiko per ne kutima diskreteco kaj ĝentileco; sed por kio taŭgos al mi laŭdi mian malamikon nek plilongigi per diroj mian okazintaĵon tiel malfeliĉan, aŭ plibone dirite, la komencon de mia frenezigo? Mi diros fine, ke li vidis min unu kaj multajn fojojn de fenestro, kiu estis kontraŭ alia mia; de tie, laŭ ŝajnis al mi, li sendis sian animon al mi per siaj okuloj, kaj miaj, kun alia kontento malsama je la unua sentita de mi, ŝatis rigardadi lin kaj eĉ devigis min kredi, ke estis plena vero ĉio kion diris al mi liaj vizaĝo kaj gestoj; la rigardo estis la pero kaj petanto por la parolo, la parolo por la deklaro pri lia deziro, ĉi tiu ekbrutigis mian kaj fidon je liaj paroloj; krom ĉio tio ĉi, liaj promesoj, juroj, larmoj, sopiroj kaj cetero, kion, verŝajne laŭ mi, povas fari firma amo por konigi siajn fortan volon kaj noblan senton; kaj al mi (neniam ĉe samaj okazoj) ĉiu parolo estis kvazaŭ artileria pafotrafanta kaj renversanta parton el la fortikaĵo de mia honoro: ĉiu lia larmo estis fajro en kiu brulis mia honesteco, ĉiu lia sopiro kvazaŭ furioza vento pligrandiganta tiun bruladon, kaj tiel, ke ĉi tiu fajro fandis fine mian virtrestaĵon, kaj laste, je lia promeso esti mia edzo spite de gepatra decido destininta lin al alia virino, mi min forlasis al li tutplene, ne sciante kiel, trompante miajn gepatrojn, sen alia atestanto pli ol paĝio de Marko Antono (ĉar tiel estas nomata la maltrankviliganto atencanta mian trankvilon). Kaj apenaŭ li prenis de mi ĉion, kion li volis, du tagojn poste, li malaperis el la urbo, tiel, ke liaj gepatroj nek alia ajn persono aŭdis diri aŭ imagis kien li iris. Kiel mi restis diru tiu, kiu havu forton por tion diri, ĉar mi ne scias, nek mi sciis pli ol bedaŭradi la okazintaĵojn. Mi punis mian hararon, kvazaŭ ĝi estus kulpa je mia kulpo; mi martirigis mian vizaĝon, ĉar ŝajnis al mi ke ĝi estis doninta la tutan kaŭzon por mia malfeliĉo; mi malbenis mian sorton, mi kulpigis mian rapidan decidon, mi elverŝis abundajn senfinajn larmojn,

mi min vidis preskaŭ sufokata de ili kaj de la sopiroj, kiuj el mia dolorata brusto eliris; mi plendis silente al la ĉielo, mi pripensis kun mia imago por konscii ĉu mi estas eltrovonta iun vojon al mia savo, kaj tiu, kiun mi eltrovis, estis: survesti min per vira kostumo kaj forkuri el la domo de miaj gepatroj kaj min direkti serĉi tiun ĉi duan trompintan Eneas'on, ĉi tiun kruelan kaj perfidan Vireno'n, kiu uzurpis al mi miajn bonajn pensojn, legitimajn kaj bone fundamentitajn esperojn; kaj tiel ne enprofundiĝinte en miajn rezonadojn, proponante al mi okazon vojvestaro de mia frato kaj ĉevalo de mia patro, tiun mi survestis, la ĉevalon selis, kaj mallumegan nokton mi elliris el mia hejmo kun la intenco iri al Salamanko, kie, laŭ opinio ies, ŝajnas ke Marko Antono povis esti alveninta, ĉar ankaŭ li estas studento kaj kamarado de mia frato, pri kiu mi al vi estas dirinta. Mi ne forgesis elpreni sumon da oraj monejoj por ĉio, kio dum mia improvizata vojaĝo povos okazi al mi. Tio, kio pli maltrankviligas min, estas ke miaj gepatroj estos sekvontaj min pro la signoj de la vestaro kaj de la ĉevalo, kiujn mi havas, kaj kiam ĉi tion mi ne timos, mi timos mian fraton, kiu estas en Salamanko, de kiu se mi estus konata, jam oni povas konscii la danĝeron en kiu estas metata mia vivo; ĉar kvankam li aŭskultus miajn senkulpigojn, la plej malgranda koncepto lia pri la honoro surpermezuras ĉiujn, kiujn mi povos doni al li; pro ĉio tio ĉi, mia ĉefa decido estas, kvankam eĉ se mi perdus la vivon, serĉi mian senkonsciencan edzon, kiu ne povos nei esti tia, ĉar mensogkulpigos lin la garantiaĵoj, kiujn li lasis en mia posedo, kiuj estas fingroringo kun diamantoj kaj literoj dirantaj: «Estas Marko Antono edzo de Teodosiino». Se mi lin trovus, mi scius, kial li decidis min forlasi; kaj sekve mi devigus lin por ke li plenumu la promeson kaj fidelecon promesitajn aŭ mi deprenus de li lian vivon, min montrante tiel preta je la venĝo kiel mi estis facila permesante al li ofendi min, ĉar la nobeleco de la sango, kiun miaj gepatroj estas donintaj al mi, ekvekas mian kuraĝon, kiu promesas al mi ĉu solvon, ĉu venĝon, por mia ofendo. Ĉi tiu estas, kavalira Moŝto, la veran kaj malfeliĉan historion, kiun vi deziris koni, kiu estas sufiĉa senkulpigo por la sopiroj kaj paroloj, kiuj vekis vin; tio, kion mi petas, kaj petegas je vi, estas, ke, tial ke vi ne povas doni riparon, vi donu al mi konsilon almenaŭ, per kiu mi povos eviti la danĝerojn, kiuj malhelpas min, kaj moderigi la timon, kiun mi havas, kaj liveri al mi la rimedojn, kiujn mi uzos por atingi tion, kion tiel mi deziras kaj bezonas.

Granda intertempo estis nerespondanta parolon tiu, kiu estis aŭs-

kultinta la historion de la enamiginta Teodosiino, kaj tiom da tempo, ke ŝi pensis, ke li endormiĝis ne aŭdinte eĉ parolon el tiuj, kiujn ŝi diris, kaj ŝi, por sin konvinki pri la suspekto, diris al li:

—Ĉu vi dormas, sinjoro? Ne estus strange ke vi dormu, ĉar la enamigato, kiu rakontas siajn malfeliĉojn al tiu, kiu ilin ne sentas, eble kaŭzas al tiu, kiu ilin aŭskultas, pli da dormo ol da kompatato.

—Mi ne dormas—respondis la kavaliro—, kontraŭe mi estas tiel vekita, kaj mi sentas tiel vian malbonsorton, ke mi nescias ĉu diri, ke ĝi tiel grade min korprenas kaj doloras kiel vin mem, kaj tial la konsilio, kiun vi petas, ne nur celos konsili vin sed ankaŭ helpon al vi per ĉio, kion miaj fortoj povos, des pli ĉar, per la maniero, kiun vi uzis por rakonti al mi vian okazintaĵon, elmontriĝis la eksterordinara intelekto, kiun vi posedas, kaj, laŭ ĉi tio, devis trompi vin pli via falinta volo, ol la konvinkoj de Marko Antono; ankoraŭ mi volas konscii, kiel senkulpigon pri via malbonaĵo, viajn malmultajn jarojn, per kiuj ne estas eble havi sperton pri la multnombraj trompoj de la viroj. Trankviliĝu, sinjorino, kaj dormu se vi povas dum la malmulto da tempo, kiu certe restas el la nokto, ĉar tuj post la ektagiĝo, ni konsilos nin reciproke, kaj ni decidus kian solvon doni al via riparo.

Dankis tion Teodosiino kiel eble plej bone ŝi sciis, kaj ŝi celis ripozi iomete da tempo por trafi ke la kavaliro dormu; sed al ĉi tiu estis nebla la ripozo eĉ momenton, male, li komencis sin turni unu en alian flankon sur la lito kaj sopiri tiamaniere, ke estis perfortdevige al Teodosiino demandi al li, kion li sentis, ĉar se estus ia pasio por kiu ŝi havus riparon, ĉi tion ŝi farus per tia memvolemo, kian li al ŝi estis proponanta. Al ĉi tio respondis la kavaliro:

—Ĉar vi estas, sinjorino, tiu, kiu kaŭzas la maltrankviliĝon, kiun ĉe mi vi rimarkis, ne estas vi tiu, kiu povos ripari ĝin, ĉar se tio ĉi estus ebla, ne havus mi ian ĉagrenon.

Ne povis kompreni Teodosiino, kien celdirektis tiuj konfuzaj rezonoj de la maltrankviliĝato; sed ankoraŭ ŝi suspektis, ke ia ama pasio doloris lin, kaj eĉ ŝi pensis, esti ŝi mem la kaŭzo, kaj tio estis suspekta tinda kaj pensinda, ĉar la komforteco de la ĉambro, la soleco kaj malmalumo, kaj scii ŝian sekson estis sufiĉe naski ĉe li ian malbonan penson, kaj timante ĉi tion, ŝi sin vestis rapide kaj tre silente, kaj ŝi pendigis de sia zono la spadon kaj ponardon, kaj tiel, singardeme, sidante sur la lito ŝi estis atendente la tagon, kiu de tiam nemulte poste anoncis sian alvenon per la fumo eniranta tra la multnombraj lokoj kaj

eniroy, kiujn ĝenerale havas la ĉambroj de la gastejoj kaj voĝgastejoj. Kaj same, kiel Teodosiino, estis farinta la kavaliro, kiu, apenaŭ vidante la ĉambrom lumigata de la taglumo, elstariĝis el la lito, dirante.

— Ellitiĝu sinjorino Teodosiino, ĉar mi volas akompani vin dum ĉi tiu okazantaĵo kaj ne vin apartigi el mia flanko ĝis kiam, kiel legitiman edzon, vi havos ĉe via Markon Antonon, aŭ ĝis kiam li aŭ mi perdos la vivon; kaj tiel vi konscios la devon kaj memvolon, en kiun metis min via malfeliĉo.

Kaj dirante ĉi tion, li malfermis la fenestrojn kaj pordojn de la ĉambro.

Estis Teodosiino deziranta vidi la helecon por koni la sintenadon kaj mienon de tiu, kun kiu ŝi estis parolinta la tuten nokton; sed kiam ŝi lin rigardis kaj lin konis ŝi estus volinta ke neniam estus tagiĝinte, ke tie, por eterna nokto, estus fermiĝintaj ŝiaj okuloj; ĉar apenaŭ estis la kavaliro turninta la okulojn por ŝin rigardi — ĉar ankaŭ li deziris vidi ŝin —, kiam ŝi konis la sindonemulon — ŝian fraton —, de kiu ŝi tiom timis, je kies rigardo preskaŭ ŝi perdis la vidon de siaj okuloj, kaj ŝi restis surprizata kaj muta kaj sen koloro sur la vizaĝo; sed ŝi, elĉerpante el la timo fortojn kaj el la danĝero diskretecon, eligante la pordon, ĉi tiun prenis ĉe la pinto kaj iris surgenuiĝi antaŭ sian fraton, dirante per voĉo embarasata kaj timanta:

— Prenu, mastro kaj kara frato mia, kaj faru per ĉi tiu feraĵo la punon al tio, kion mi faris, satigante vian koleron, ĉar por tiel granda kulpo, kiel estas mia, ne estas dece ke iu kompatu restu al mi; mi konfesas mian pekon, kaj mi ne volas taŭgu al mi, kiel senkulpigo, mia pento; mi nur vin petas, ke la puno estu tiel, ke ĝi trafu depreni de mi la vivon kaj ne la honoron, ĉar kiel mi metis ĝin en neduban danĝeron forlasinte la domon de niaj gepatroj, ankoraŭ ĝi restus laŭ opinio de ĉiu, se la puno, kiun vi donus, estus sekreta.

Ŝin rigardadis la frato, kaj kvankam la malembaraso de ŝia kuraĝo incitis lin al la venĝo; la paroloj, tiel kortuŝaj kaj efikaj, per kiuj ŝi elmontris sian kulpon, moligis tiamaniere lian koron, ke li, montrante vizaĝon agrablan kaj paceman sintenadon, ŝin levis de sur la planko kaj ŝin konsolis, kiel eble plej bone li povis kaj sciis, dirante al ŝi inter aliaj aĵoj, ke ne trovinte punon saman, kia estis ŝia frenezaĵo, li prokrastis ĝin tiam; kaj same ĉar ŝajnis al li, ke la sorto ankoraŭ ne estis ferminta tutplene la pordojn al ŝi, pro kio li celos trafi la riparon per

ĉiaj eblaj vojoj antaŭ ol fari venĝon je la ofendo, kiu de ĝia granda malĉasteco venis en lin.

Pro ĉi tiuj pravajoj ree Teodosiino estis rehaviganta al si la perditajn animfortojn; revenis la koloro al ŝia vizaĝo kaj renaskiĝis ŝiaj preskaŭ mortantaj esperoj. Don Rafael—ĉar tiu ĉi estas la nomo de ŝia frato—ne volis pli preparoli al ŝi pri ŝia okazintaĵo; nur li diris al ŝi; ke ŝi ŝanĝu la nomon Teodosiion Teodoro, ke ili iru poste al Salamanko kune serĉi Markon Antonon, ĉar li opiniis ke Marko Antono ne estis en la urbo, ĉar, kiel kamarado, li estus parolinta al li, kvankam povis okazi, ke la ofendo estus mutiginta lin kaj foriginta al li la deziron vidi la ofenditon. Sin submetis la nova Teodoro sub tio, kion volis ŝia frato. Eniris poste la gastejmastro, al kiu ili ordonis, ke li provizu al ili ion por matenmanĝi, ĉar ili volis deiri tuj.

Dume la mulisto selis la bestojn kaj la matenmanĝo estis pretigota alvenis al la gastejo kavaliro vojaĝanta, kiu estis konata de Don Rafaelo. Ankaŭ lin konis Teodoro, kaj ĉi tiu ne kuraĝis eliri el la ĉambro por ne esti vidata de la kavaliro. La kavaliro kaj Don Rafaelo brakpremis sin reciproke, kaj ĉi tiu demandis al la ĵus veninto, kiaj novaĵoj okazis en ilia urbo. Je kio la demandito respondis, ke li venis de Puerto Sankta Mario, en kies haveno restis kvar galeroj pretaj eknavigacii por Napolo, kaj ke en unu el ili enŝipiĝis Marko Antono Adorno, la filo de Don Leonardo Adorno. Pro tiaj novaĵoj ĝojis Don Rafaelo, antaŭsentante ke, tial ke tiel neatendite li estis sciinta novaĵon pri tio, kio por li estis gravega, la novaĵo estis signo pri bona sukceso por lia entrepreno; li petis al sia amiko, ke ĉi tiu ŝanĝu la mulinon, sur kiu li vojaĝis, je la ĉevalo de lia patro—kiun li tre bone konis—, dirante ke li ne venis de Salamanko, sed ke li aliras al ĝi kaj ke li ne volis uzi tiel bonan ĉevalon por tiel longa vojaĝo. La kavaliro alveninta, kiu estis tre ĝentila kaj amiko lia, konformiĝis je la ŝanĝo kaj prenis sur sin la taskon redoni la ĉevalon al lia patro. Ili matenmanĝis kune kaj Teodoro sole, kaj alveninte momenton por deiri, la amiko ekmarŝis sur la vojo al Kazalja, kie li posedis riĉan terbienajon. Ne deiris kun li Don Rafaelo, kiu, por eviti la akompanion, diris al la samurbano, ke konvenas al li reveni je ĉi tiu tago mem al Seviljo; kaj ĵus vidinte Don Rafaelo lin foririnta, en ordo la bestoj por rajdi, farita la kalkulo kaj paginte ĝin al la gastejmastro, kun adiaño, ili eliris el la gastejo, lasante mirigataj ĉiujn, kiuj en ĝi restis, ilia beleco kaj ĝentila sintenado, ĉar ne havis, kiel viro, malpli da gracio, energio kaj ĝentileco

Don Rafaelo, ol lia fratino havis belecon kaj gracian sintenadon.

Poste, elirinte, rakontis Don Rafaelo al sia fratino la novaĵojn, kiujn pri Marko Antono oni donis al li, kaj ke ŝajnis al li, ke, per ebla rapideco, ili aliru al Barcelono, kie ordinare haltas tagon la galeroj, kiuj pasas al Italujo aŭ venas al Hispanujo, kaj ke se la galeroj ne estus alvenintaj, ili povus atendi ilin, kaj tie, nedube, renkonti Markon Antonon. Lia fratino diris al li, ke li faru tion, kion li konsideru plej deca, ĉar lia volo ankaŭ estis ŝia. Diris Don Rafaelo al la mulkondukisto, kiun li dungis, ke li estu paciencema, ĉar konvenis al li iri en Barcelonon, certigante al li la pagon laŭ kontento lia dum la tempo de la akompano. La mulkondukisto, kiu estis el la gajuloj de la metio, kaj kiu konis la malavarecon de Don Rafaelo, respondis, esti preta akompani kaj servi lin ĝis la fino de la mondo. Demandis Don Rafaelo al sia fratino kiom da mono ŝi kunportis. Ŝi respondis, ke ŝi ne kalkulis ĝin, ke ŝi metis la manon en la skribtablon de sia patro sep aŭ ok fojojn, kaj ĉiam ŝi eltiris ĝin plena je oraj moneroj; kaj, laŭ tio, kalkulis Don Rafaelo, ke ŝi eble prenis kvincent orajn monerojn, per kiuj kun aliaj ducent, kiujn li havis kaj oran ĉenon, kiun li kolportis, li opiniis esti sufiĉe provizata, kaj plie, konvinkita renkonti en Barcelono Markon Antonon.

Pro tio ĉi ili akcelis la iradon ne perdante tagon rajdadi, kaj ne okazinte al ili malfelico aŭ malhelpaĵo ia, ili alvenis proksime je du mejloj de urbo, kiu staras naŭ mejlojn malproksime de Barcelono, kiu estas nomata Igualado. Ili estis sciintaj sur la vojo, ke kavaliro, vojaĝante kiel ambasadoro al Romo, estis en Barcelono atendante la galerojn, kiuj ankoraŭ ne estis alvenintaj, novaĵo kiu kaŭzis al ili grandan kontenton. Kun ĉi tiu ĝojo, ili vojiris ĝis la limo de arbaro, tra kiu penetris la vojo, de kiu ili vidis elirantan viron kurantan kaj rigardantan posten kvazaŭ se li estus timigata de io. Sin metis Don Rafaelo antaŭ li, dirante:

—Kial vi forkuras, bona viro, aŭ kio al vi estas okazinta, kio, laŭ elmontroj de via grandega timo, devigas vin esti tiel rapidira?

—Ĉu vi ne volas, ke mi kuru rapide kaj timigate—respondis la viro—, tial ke mirakle mi min liberigis el bando da rabistoj, kiu restas en tiu arbaro?

—Malbono—diris la mulkondukisto—, malbono, vivu Dio! Ĉu rabistetoj je ĉi tiuj horoj? Je mia krucsignogesto, ili faros nin novaj! (1).

(1) «Ili faros nin novaj» estas esprimo per kiu oni gravigas tion malagrablan, kion oni faras al iu aŭ al iuj.

—Ne angorigu—diris ree tiu de la arbaro—, ĉar jam la banditoj estas forkurintaj kaj lasis ligitaj ĉe la arboj de ĉi tiu arbaro pli da tridek pasaĝeroj, ŝtelinte al ili ĉion; nur unu solan ili lasis libera por ke li malligu la ceterajn depost kiam ili estu transirintaj monteton, kiun ili montris al li.

—Se tio estus okazinta—diris Kalvete, ĉar tiel estis nomata la mulkondukisto—certe ni povas trairi, tial ke al loko, en kiu la banditoj faras malbonaĵon, ili ne revenas dum kelkaj tagoj, kaj mi povas certigi ĉi tion, ĉar mi estas falinta du fojojn en iliajn manojn, kaj mi spertis praktike pri ilia agmaniero kaj kutimoj.

— Tiel okazas—diris la viro.

Tio, kio estis aŭdata de Don Rafaelo, decidis ilin pasi antaŭen, kaj ili ne vojiris multe, kiam ili trafis la ligitajn, kiuj supermezuris kvardekon, kaj kiujn estis malliganta tiu, kiun la rabistoj lasis libera. Estis stranga spektaklo vidi ilin; iujn, nudaj tute; aliajn, vestitaj per la ĉifonaĵoj de la rabistoj; iujn, kiuj ploris vidante sin ŝtelataj; aliajn, ridantaj, vidante la strangajn vestojn de la aliaj; tiu ĉi rakontis detale tion, kion ili elportis el li; tiu diris, ke li bedaŭris pli sanktaĵon, kiun de Romo li surportis, ol aliajn senfinajn aĵojn, kiujn ankaŭ li surportis. Fine, ĉio, kio tie okazis, estis ploroj kaj ĝemoj de la malfeliĉaj ŝtelitoj. Ĉion tion rigardadis ne sen granda ĉagreno la du fratoj, dankante la ĉielon, ĉar el tiel granda kaj proksima danĝero Li estis liberiginta ilin. Sed tio, kio plej kortuŝis ilin, speciale Teodoron, estis vidi ĉe la trunko de glanarbo ligitan knabon, dekses-jaran verŝajne, ŝirmatan nur de ĉemizo kaj kalzonoj el lino; sed tiel bela estis lia vizaĝo, ke li perfortdevigis kaj allogis ĉies rigardojn. Saltis teren Teodoro por malligi lin, kaj ĉi tiu dankis al tiu per ĝentilaj paroloj la bonfaron, kaj Teodoro, por ke la bonfaro estu pli granda, petis al Kalvete, la mulkondukisto, ke ĉi tiu pruntedonu sian mantelon al la knabo ĝis kiam ili estu aĉetontaj alian por tiu gracia junulo. Ĝin donis Kalvete, kaj Teodoro ŝirmis per ĝi la junulon, demandante al li de kie li estis, de kie li venis, kaj kien li iris, kaj la junulo respondis, esti el Andaluzio, de loko, kiu ĵus nomita, konigis al la fratoj, stari ne malproksime je du mejloj de ilia naskiĝloko; li diris veni de Seviljo, kaj esti lia celo aliri al Italujo por havigi al si bonŝancon per la milita profesio, kiel aliaj multaj hispanoj kutimis; sed lia sorto fariĝis malbona per la fatala renkontiĝo kun la banditoj; kiuj forprenis al li sufiĉe grandan sumon da mono, kaj tiajn vestojn, kiajn oni ne aĉetos pli bonajn po tricent oraj moneroj; sed ke, spite de

ĉio, li pensis daŭrigi sian vojiron, ĉar li ne devenis de familio al kiu, je la unua malsukceso, estu glaciigonta la varmo de ĝia fervora deziro.

La bonaj rezonadoj de la junulo—kun la aŭdita sciiĝo, ke li estis de loko tiel proksima je ilia, kaj plie pro la rekomendo postulata de lia beleco—naskis memvolon ĉe la du fratoj favori lin laŭ ebla povo; kaj disdoninte inter tiuj, kiuj pli bezonis helpon, laŭ ili opiniis, tiujn mone-rojn, speciale inter monaĥoj kaj pastroj, kiuj estis pli da ok, ili devigis la junulon enrajdi en la mulinon de Kalvete, kaj sen plia halto, dum malmulte da tempo, ili alvenis al Igualado, kie ili sciis, ke la galeroj, hieraŭan tagon, estis alvenintaj al Barcelono, kaj ke de tie, du tagojn poste, ili reeknavigacius se antaŭe ne ilin perfortdevigus deiri la granda risko de la marbordo.

Ĉi tiuj novaĵoj kaŭzis, ke, sekvantan matenon, ili fruiĝu pli ol la suno, tial ke tiun nokton ili ne pasigis tute dormante sed male, la du fratoj pli maltrankvile ol ili pensis kaŭze de tio ĉi: estante ĉe la tablo, kaj kun ili la junulo, kiun ili estis malligintaj, Teodoro fiksas atentego la okulojn en lian vizaĝon, kaj rigardante lin iom kuriozeme, ŝajnis al li, ke la oreloj de la junulo estis traborataj, kaj pro ĉi tio kaj pro lia hontema rigardo, Teodoro suspektis lian virinsekson, kaj li deziris fini vespermanĝi por havigi al si aparte la certecon pri sia suspekto; kaj dum la vespermanĝo demandis al la junulo Don Rafaelo, de kiu li estis filo, ĉar li konis la ĉefajn familiojn de lia loko, se ĉi tiu estus tiu, kiun li estis dirinta. Je kio respondis la knabo, esti filo de Don Henriko de Kardenas, kavaliro bone konata. Sed Don Rafaelo diris koni bone Don Henriko de Kardenas; kaj scii, kun certeco, ke Don Henriko ne havis filon; sed, ke se tiel estus dirinta la knabo por ne malkaŝi siajn gepatrojn, tio ne estis grava, neniam plu demandonte pri tio.

—Vere estas—respondis la knabo—ke Don Henriko ne havas filojn; sed ilin havas frato lia, nomata Don Sanĉo.

—Tiu ankaŭ ne havas filojn—rediris Don Rafaelo—, sed solan filinon, kaj eĉ oni diras, ke ŝi estas el plej belaj fraŭlinoj de Andaluzio, kaj ci tion nur mi scias per la famo, ĉar, kvankam multfoje mi estis vizitanta ŝian lokon, neniam mi ŝin vidis.

—Ĉio tio, kion vi diras, sinjoro, estas vero—rediris la knabo—, Don Sanĉo nur havas unu filinon; sed ne tiel bela, kiel ŝia famo diras; kaj se mi diris, ke mi estas filo de Don Henriko, tio estis por ke vi estimu min iom, ĉar mi estas filo de ĉefservisto de Don Sanĉo, kiun mia patro servas de antaŭ multaj jaroj, kaj mi naskiĝis ĉe li, kaj pro

ia malplaĉo, kiun mi kaŭzis al mia patro, elpreninte al li bonan sumon da mono, mi volis iri al Italujo kaj iri la militvojon, tra kiu venas, laŭ mi vidis, fariĝi nobelaj eĉ tiuj de plej humila deveno.

Ĉiujn ĉi tiujn dirojn kaj la esprimmanieron, per kiu la knabo ilin diris, atentis vikle Teodoro, kaj ĉiam ĉi tiu konvinkigis pli kaj pli pri sia suspekto. Finiĝis la vespermanĝo, oni demetis la tablotukojn, kaj dum Don Rafaelo sin nudigis, dirinte Teodoro al sia frato tion, kion li suspektis pri la knabo, Teodoro, kun liaj opinio kaj permeso, apartiĝis kun la knabo al la balustrado de larĝa fenestro sur la strato, kaj ĉe ĝi ambaŭ apogante la brustojn sur la balustrado, Teodoro tiel komencis paroli:

—Mi volus, sinjoro Francisko —ĉar ĉi tiu diris esti tiel nomata—, esti farinta al vi tiom da bonfaroj, ke mi vin devigu jesi al mi kian ajn aĵon, kiun mi povos aŭ volos peti je vi; sed la mallonga tempo, de kiam mi konas vin, ne estas doninta okazon por tio; estos eble, ke dum la tempo, kiu venos, vi konos tion, kion meritas mia deziro; kaj se tiun, kiun mi nun kavas, vi ne ŝatus satigi, ne tial mi finus esti via servanto same, kiel mi estas antaŭ ol mi ĝin sciigos al vi. Mi volas ankaŭ, ke vi sciu, ke, kvankam mi havas tiel malmultajn jarojn kiel vi, mi havas pli da sperto pri la aĵoj de la mondo, ol ili provizas, ĉar per tia sperto mi estas veninta suspekti, ke vi ne estas viro, sed virino, kaj ke via deveno estas tiel nobela, kiel via beleco esprimas, kaj eble tiel malbonsorta, kiel konsciigas la ŝanĝo de la kostumo, ĉar neniam tiaj ŝanĝoj estas por bono al tiu, kiu ilin faras; se estus vera tio, kion mi suspektas, diru ĝin al mi, ĉar mi juras, je la fido de kavaliro, kiun mi havas, helpi kaj servi vin per ĉio, kion mi povos. Ke vi estas virino, vi ne povas nei al mi, ĉar la fenestroj de viaj oreloj vidigas ĉi tiun veron tute klare, kaj vi estis malsingardema ne ŝtopinte kaj kaŝinte tiujn truojn per ia ruĝa vakso, ĉar povos okazi, ke alia tiel kuriozema, kiel mi, kaj ne tiel honora, malkaŝu tion, kion vi tiel malbone estas sciinta kaŝi; mi diras, ke vi ne dubu diri al mi, kiu vi estas, je la promeso, ke mi proponas al vi mian helpon, kaj ke mi certigas al vi esti fidela je la sekreto, kiun vi volos, ke mi havu.

Tre atenteme estis aŭskultinta la knabo tion, kion Teodoro al li diris, kaj rimarkante ke li jam silentis, antaŭ ol respondi parolon, la knabo prenis al Teodoro la manojn, kaj ĉi tiujn tirante al la buŝo, li kisis ilin altrude, eĉ li banis ilin per granda kvanto da larmoj, kiuj elŝprucis el liaj belaj okuloj, kies stranga sento kaŭzis al Teodoro tian

Impreson, ke li ne povis deteni ankaŭ la ploron—propra kaj natura kvalito de virinoj edukitaj kortuŝigi pro la sentoj kaj ĉagrenoj fremdaj—; sed depost kiam malfacile Teodoro apartigis siajn manojn de la buŝo de la knabo, li estis atente atendanta tion, kion respondis la knabo, kiu, profunde ĝemante kaj akompanante la ĝemon kun grandaj sopiroj, diris:

—Mi ne volas, nek mi povas, nei al vi, sinjoro, ke via suspekto estas vera: virino mi estas kaj la plej malfeliĉa el tiuj, kiujn naskis virino alia en la mondo, kaj tial ke la agoj, kiujn vi faris al mi kaj la proponoj devigas min obei ĉion, kion vi ordonas al mi, aŭskultu, ĉar mi diros al vi, kiu mi estas, se jam ne lacigus vin aŭdado pri fremdaj malfeliĉoj.

—En malfeliĉo mi vivu ĉiam—rediris Teodoro—se mia ŝato scii ilin ne estus tiel, kiel la ĉagreno, kiun ili liveros al mi kaŭze esti viaj, ĉar jam mi ilin sentas, kiel se ili estus propre miaj.

Kaj rebrakpremite la junulinon, Teodoro faris al ŝi novajn kaj verajn promesojn, kaj la knabino, iomete pli trankvila, komencis diri ĉi tiujn parolojn.

—Koncerne mian naskiĝlokon, la veron mi estas dirinta; koncerne miajn gepatrojn, ne ĝin mi diris, ĉar Don Henriko ne estas mia patro, sed mia onklo, kaj lia frato Don Sanĉo estas mia patro, ĉar mi estas la filino malfeliĉa, kiun Don Sanĉo havas, pro ŝia beleco tiel laŭdata de via frato, kies trompiĝon kaj disreviĝon oni konscias per la nenia beleco kiun mi havas; mia nomo estas Leokadiino, la kaŭzo pri la ŝarĝo de mia vestaro aŭdos vi mem. Du mejlojn de mia urbo staras alia el plej riĉaj kaj nobelaj de Andaluzio, en kiu loĝas altranga kavaliro, kiu devenas de la nobelaj kaj antikvaj Adornoj de Ĥenovo; ĉi tiu havas unu filon, kiu, se la famo ne fruigus laŭdojn pri li tiel, kiel pri mi, estas el kavaliroj, kiujn deziri oni povas. Ĉi tiu, do, same pro la najbareco de la lokoj, kiel pro sia emo al la ĉasado, kiun same ŝatas mia patro, iujn fojojn venis al mia hejmo, kaj ĉe mi li restadis kvin-ses tagojn, kiujn, eĉ pliparton el noktoj, li kaj mia patro pasigis en la kamparo; ĉi tiujn okazojn profitis la sorto aŭ la amo, aŭ mia malgranda sperto, kiu estis sufiĉa por min faligi de la alteco de miaj bonaj pensoj en la subcon de la stato en kiu oni min vidas; ĉar rigardinte, pli ol estas permeŝate al ĉasta fraŭlino, la gracion kaj ĝentilecon de Marko Antonio, kaj konsiderinte la rangon de lia deveno kaj la grandan kvanton da bienaĵoj, kiujn oni nomas rikaĵoj, kaj kiujn lia patro havas, ŝajnis al mi, ke

se estus atingonta lin edzo, estus tio ĉi plena feliĉo, kiu povus satigi mian deziron; pro ĉi tiu penso, mi komencis rigardi lin pli interese, kaj ĉi tio devis okazi sendube tre nesingardeme, ĉar li rimarkis, ke mi lin rigardadis, kaj li ne volis, nek bezonis, la perfidulo, alian pardonon por eniri la sekreton de mia brusto kaj ŝteli al mi la plej bonajn kvalitojn de mia animo. Sed mi ne scias, kial mi min decidus rakonti al vi, sinjoro, de punkto en punkton, la detalaĵojn de mia amo, ĉar estas ili negravaj por ĉi tiu okazo, kaj nur diri al vi ĝenerale tion, kion li per allogaj agoj atingis de mi; kaj okazis, ke, doninte li al mi siajn fidon kaj promeson per grandaj, laŭ mia opinio, firmaj kaj kristanaj juroj, esti mia edzo, mi min proponis por ke li faru kun mi laŭ sia volo; sed ankoraŭ ne bone satigata de liaj juroj kaj paroloj, por ke ĉi tiujn ne forblovu ia vento, mi devigis lin skribi jurojn kaj promesojn sur paperon, kaj li donis al mi la dokumenton subskribitan de li, kiu esprimis tiom da kondiĉoj kaj kompromisoj, ke ĝi min satigis. Mi, ricevinte la dokumenton, planis por ke, nokton, li venu de sia loko kaj eniru, grimpante la murojn de ĝardeno en mian ĉambron, kie sen ia maltrankvilo li povu atingi la frukton, kiu por li sola estis destinata. Alvenis, fine, la nokto tiel dezirata de mi...

Ĝis ĉi tiu momento estis silentinta Teodoro, kaj estis lia animo pendanta de la paroloj de Leokadiino, kiu, per ĉiu el ili traboris lian animon; speciale kiam Teodoro aŭdis la nomon Marko Antono, kaj atentis la rimarkindan belecon de Leokadiino, kaj li konsciis la superecon de ŝia grandanimo kun tiu de ŝia eksterordinara saĝeco, kiun ŝi bone elpruvis per la maniero rakonti sian historion. Sed kiam ŝi diris: «Alvenis, fine, la nokto tiel dezirata de mi...», Teodoro preskaŭ perdis la paciencon, kaj ne povante fari alian aĵon, li haltigis ŝian rakonton dirante:

—Nu, tiam kiam alvenis tiu feliĉega nokto, kion li faris? Ĉu li eniris eble? Ĉu vi ĝuis lin? Ĉu li konfirmis la dokumenton? Ĉu li restis kontenta esti atinginta de vi tion, kio, laŭ vi diris, estis lia? Ĉu tion sciis via patro, aŭ kiel finiĝis tiel honestaj okazaĵoj?

—Ili finiĝis—diris Leokadiino—metante min tiamaniere, kiel vi vidas min, ĉar mi ne ĝuis lin; nek li min ĝuis, nek li venis je la rendezuo difinita.

Trankviliĝis per tiuj diroj Teodoro, li haltigis la memregadon, kiu iom post iom estis forlasanta lin ekscitate de la kolera pesto de la ĵaluzo, kiu rapide eniris en liajn ostojn kaj ostinternaĵojn, por superregi plene lian paciencon; sed ĝi ne lasis lin tiel libera, ke li ne reaŭskultu malktranvile tion, kion Leokadiino daŭrigis dirante:

—Ne venis li, kaj ok tagojn de tiam, mi sciis per novaĵo certa, ke li estis forlasinta sian urbon kaj forportinta kun li, el la domoj de ŝiaj gepatroj, fraŭlinon de sia urbo, kiu estas filino de ĉefa kavaliro, ke oni ŝin nomas Teodosiino, junulino eksterordinare bela kaj tre diskreta; kaj tiel ke ŝi estas filino de tiel nobelaj gepatroj, oni sciis en nia urbo la rabon, kaj poste la okazintaĵo venis al mia aŭdo, kaj kun la scio la malvarma kaj timita lanco de la jaluzo, kiu trapikis al mi la koron kaj al mi bruligis la animon per fajro tia, ke en ĉi tiu cindriĝis mia honoro kaj konsumiĝis mia kredito, velkiĝis mia pacienco kaj finiĝis mia saĝeco. Ve al mi malfeliĉa!, ĉar poste mi imagis Teodosiinon pli bela ol la suno, kaj pli saĝa ol la saĝeco mem, kaj super ĉio, pli feliĉa ol mi malfeliĉa! Mi legis poste la dirojn de la dokumento, mi ilin juĝis firmaj kaj valoraj, kaj ke ili ne povas malsukcesi pri la rajto, kiun ili konstatas; kaj kvankam al ili, kiel al sanktaĵo, rifuĝiĝis, mia espero, kiam mi pensis pri la suspektinda akompanantino, kiu iris kun Marko Antono, mi faligis ĉiujn planken; mi batis mian vizagon, mi detranĉis miajn harojn, mi malbenis mian sorton, kaj tio, kion mi pli bedaŭris, estis ne povi fari tiujn oferojn je ĉiuj horoj pro la nepra ĉeesto de mia patro; laste, por fini plendi sen kontraŭstaro aŭ por fini la vivon, kio estas la aĵo plej certa, mi decidis forlasi la domon de mia patro; kaj tial ke por efektiviĝi malbonan penson ŝajnas, ke la hazardo malaperigas ĉiajn barojn sen timo ia, mi ŝtelis al paĝio de mia patro liajn vestojn kaj al mia patro sumon da mono, kaj nokton, ŝirmate de nigra mantelo de la paĝio, mi eliris; piede mi vojiris iujn mejlojn, kaj mi alvenis al urbo, kiun oni nomas Osuno, kaj loĝiginte min bone en ĉaron, du tagojn poste mi eniris en Sevillo'n, kio estis eniri en la eblan certecon ne esti trovota kvankam oni serĉu min; tie mi aĉetis aliajn vestojn kaj mulinon, kaj kun iuj kavaliroj; kiuj vojaĝis al Barcelono rapide, por ne perdi la bonan okazon trafi galerojn al Italujo, mi rajdis ĝis hieraŭ, kiam okazis al mi tio, kion vi jam estis sciinta pri la rabistoj, kiuj ŝtelis al mi ĉion, kion mi surportis, kaj, inter aliaj aĵoj, la juvelon, kiu subtenis mian sanon kaj moderigis la ŝarĝon el miaj ĉagrenoj, tio estas, la ateston de Marko Antono, ĉar mi pensis transiri al Italujo, kun ĝi; kaj trovinte Markon Antonon, ĝin prezenti al li, kiel atestanton pri lia malgranda promesfirmeco, kaj kiel bonkreditigilon pri mia granda firmeco, kaj fari tiel, ke li estu devigata plenumi al mi sian promeson; sed kune kun ĉi tio, mi estas konsiderinta, ke facile neos la promesojn, kiuj estas skribataj sur papero, tiu, kiu neas tiujn devojn, kiuj devis esti

gravurataj en la animo; ĉar estas klare, ke se li havas en sia kuneŝto la senrivalan Teodosiion, li ne volos rigardi la malfeliĉan Leokadiion, kvankam pro ĉio ĉi tio mi pensas morti aŭ min intermeti inter la du por ke mia intermeto maltrankviligu ilian pacon: ne pensu tiu malamikino, pro mia ripozo, ĝui tiel malmultekoste tion, kio estas mia; mi ŝin serĉos, mi ŝin trovos, kaj mi forprenus al ŝi la vivon se mi povus.

—Sed kian kulpon havas Teodosiino — demandis Teodoro tial ke ŝi eble ankaŭ estis trompata de Marko Antono, kiel vi, sinjorino Leokadiino? Ĉu vi konscias tion?

— Ĉu povas okazi tio tiel — diris Leokadiino — tial ke li ŝin forportis kun si mem? Kaj estante kune tiuj, kiuj bone amas unu la alian, kia trompo povas esti? Nenia, certe: ili estas kontentaj, ĉar ili estas kune, same se ili estus, kiel oni diras, en la varmegaj kaj malproksimaj dezertoj de Libio, kiel en la izolaj kaj apartaj de la malvarmega Escitio; ŝi lin ĝuas, sendube, estu kie ajn, kaj ŝi sola pagos tion, kio dolorados min ĝis kiam mi ŝin trovos.

— Povas okazi, ke vi vin trompu — rediris Teodoro —, ĉar mi konas tre bone tiun vian malamikinion, kiun vi citas, kaj mi scias pri ŝiaj kvalitoj kaj honesteco, ĉar neniam ŝi aventurigus forlasi la domon de ŝiaj gepatroj, nek aikuri al la volo de Marko Antono; kaj kvankam ŝi estus farinta tion, ne konante vin, nek sciante ion ajn pri tio, kion kun li vi havis, ŝi vin ofendis neniel, kaj kiam ne estas ofendo, ne estas justa la veng.

— Pri la honesteco — diris Leokadiino — ne preparolu al mi, ĉar tiel diskreta kaj honesta mi estis, kiel ĉiuj fraŭlinoj honestaj ekzistas, kaj malgraŭ tio, mi faris tion, kion vi aŭdis; ke li forportis ŝin estas nedube; ke ŝi ne estas ofendinta min, de senpartia vidpunkto, mi tiel jesas; sed la doloro, kiun mi sentas pro la ĵaluzo, memorigas ŝin al mi kvazaŭ spado enigita centre en miaj internajoj, kaj ne estas multe, ke mi celu eligi ĝin, des pli, tial ke saĝo estas apartigi el ni la aĵojn, kiuj faras al ni malbonon, kaj tiujn, kiuj baras la bonon al ni.

— Estu tiel, kiel vi diris, sinjorino Leokadiino — aldiris Teodoro —, ĉar same kiel mi rimarkas, ke la pasio, kiun vi sentas, ne permesas al vi fari pli pravajn paroladojn, mi konscias, ke ĉi tiuj momentoj ne estas ĝustatempe por ke vi akceptu sanajn konsilojn; pri mi, mi scias diri al vi tion, kion mi estas dirinta, ke mi vin helpos kaj favoros pri ĉio, kio estas justa, laŭ mi povos; kaj same mi promesas je la nomo de mia frato, ĉar lia natura karaktero kaj nobleco ne permesas al li fari alian.

aĵon; nia vojo estas al Italujo, se plaĉus al vi veni kun ni, pli-malpli vi jam scias la sinkonduton de nia akompano; tio, kion mi petas je vi, estas ke vi donu al mi permeson por diri al mia frato tion, kion mi scias pri via deveno, por ke li sin konduku al vi per la diskreteco kaj respekto, kiujn vi rajtas, kaj por devigi lin zorgi pri vi kiel estas dece; kune kun ĉi tio mi opinias ne dece ke vi vin vestu virsekse; male, ke vi surmetu viajn seksajn vestojn, kaj se en ĉi tiu urbo estus eblo por tiel vesti vin, matene mi aĉetus la plej bonajn vestojn, kiujn mi trovas, kaj kiuj estus plej decaj al vi, kaj pri ĉio cetera koncernanta viajn pretendojn, permesu ke la tempo agadu, ĉar la tempo estas granda instruanto donanta kaj trovanta riparon al okazoj plej senesperaj.

Dankis Leokadiino al Teodosiino, kiun ŝi verŝajne konsciis Teodoro, liajn multajn proponojn kaj donis al li permeson por diri al lia frato tion, kion li volu, petante ke li ne forlasu ŝin, ĉar ŝi konsciis kiom da danĝeroj ŝi riskus se oni konus ŝin, kiel virinon.

Je tiu momento ili sin adiaŭis reciproke, kaj ili aliris por enlitiĝi: Teodoro al la ĉambro de sia frato, kaj Leokadiino al alia najbara. Ankoraŭ ne estis dormanta Don Rafaelo, atendante sian fratinnon por scii tion, kio estis okazinta al Teodoro kun tiu, kiun li konsideris virino; ĵus Teodoro eniris kaj antaŭ ol enlitiĝi, Don Rafaelo demandis al Teodoro, kiu punkton post punkto rakontis ĉion, kion Leokadiino estis dirinta al li: esti filino de Don Sanĉo, ŝian amon, la dokumenton de Marko Antono, kaj la celon kiun ŝi pretendis. Miris Don Rafaelo kaj diris al sia fratino:

— Se ŝi estas tiu, kiun ŝi diris, mi prave diras al vi, fratino, ke ŝi estas el la plej altrangaj de sia urbo kaj unu el la plej nobelaj de la tuta Andaluzio; ŝia patro estas bone konata de nia, kaj la famo, kiun ŝi havas pro sia beleco, estas inda je tiu, kiun ni vidas nun en ŝia vizago; kaj pro ĉio, mi opinias, ke ni devas esti singardemaj tiamaniere, ke ŝi ne parolu pli frue ol ni kun Marko Antono, ĉar naskas en min ian singardemon la atesto, kiun ŝi citis kaj kiun li faris al ŝi, malgraŭ ŝi sciigis ĝian perdon; sed trankviliĝu kaj enlitiĝu, fratino, ĉar por ĉio oni serĉos riparon.

Faris Teodoro tion, kion lia frato ordonis al li koncerne enlitiĝon, sed pri la retranskiviligo li ne estis kapabla, ĉar jam estis nestinta en ŝian animon la kruela malsano de la ĵaluzo. Ho, ju pli granda ĝi estis, des pli prezentigis antaŭ la imago de Teodoro la beleco de Leokadiino kaj la perfido de Marko Antono! Ho, kiom da fojoj li legis, aŭ ŝajnis

legi, la dokumenton, kiun Marko Antono donis al Leokadiino! Kiom da paroloj kaj fundamentoj li aldonis al ĝi, kiuj faris ĝin certa kaj tre efika! Kiom da fojoj li ne kredis, ke ŝi estas perdinta ĝin, kaj kiom da fojoj li imagis, ke eĉ sen ĝi, ne malplenumos Marko Antono sian promeson, kaj ke la perfidulo ne rememoros tion, kio lin devigis al li!

Tiel pasigis plej grandan parton el la nokto Teodoro, ne endormiginte. Kaj ne ĝin pasigis pli ripoze Don Rafaelo, la frato; ĉar ĵus aŭdinte kiu estis Leokadiino, subite ekbruliĝis lia koro je amo, kvazaŭ li estus samefike perolinta jam al ŝi; ĉar ĉi tiun forton havas la beleco, kiu, je unu punkto, je unu momento, naskas sekve la deziron de tiu, kiu ĝin rigardas kaj ĝin konscias, kaj kiam ĝi malkaŝas aŭ promesas ian vojon por atingi aŭ ĝui ĝin, ĝi ekbruligas per potenca subiteco la animon de tiu, kiu rigardadas ĝin, tiamaniere kaj facile kiel ekbruligas la sekan kaj pretigitan pulvon kiu ajn fulmo, kiu ĝin ektoŝas; li ne imagis ŝin ligata ĉe la arbo, nek ŝirmata de la ŝirita vesto de viro, sed de ŝia virina vesto, kaj ĉe ŝiaj gepatroj, riĉaj kaj tiel altrangaj kaj nobelaj, kiel li kaj lia fratino estas; li ne haltigis, nek li volis haltigi, sian penson ĉe la kaŭzo, kiu estis kondukinta ŝin por ke li ŝin konu; li deziris, ke la tago alvenu por daŭrigi sian vojradon kaj serĉi Markon Antonon ne pli por devigi lin fariĝi sia bofrato, ol por bari, ke li estu la edzo de Leokadiino; kaj jam metis lin la amo kaj jaluzo tiastate; ke li konsciis sukceson vidi sian fratinton sen la riparo, kiun li celis al ŝi, kaj Markon Antonon senviĝa antaŭ ol vidi sin sen espero atingi Leokadiinon; tiu espero jam estis promesanta al li feliĉan sukceson pri lia deziro ĉu per la pero de la forto, ĉu per tiu de la donacoj kaj bonfaroj, ĉar por ĉio donos al li motivon la tempo kaj la okazo.

Per ĉi tio, kion li promesis al si mem, li trankviliĝis iomete, kaj de tiam post malmulte da tempo alvenis la tagiĝo, kaj ili forlasis la litojn, kaj Don Rafaelo, vokante la gastejmastron, demandis al li ĉu en tiu urbo estis eblo vesti paĝion, kiun la banditoj estis nudigintaj. La gastejmastro diris havi unu decan veston, aĉetindan; la vendanto ĝin alportis kaj ĝi estis mezurgusta por Leokadiino. Pagis ĝin Don Rafaelo, kaj ŝi surmetis ĝin sur sin kaj sin surmetis spadon kaj ponardon tiel gracie kaj kuraĝsintenate, ke per tiu vesto mem ŝi mirigis Don Rafaelon kaj duobligis la jaluzon de Teodoro. Selis la bestojn Kalvete, kaj je la oka matene ili ekiris al Barcelono, ne volinte supreniri al fama monaĥejo Montserrat, prokrastante la viziton por kiam Dio estu farinta ke ili revenu pli trankvile en siajn naskiĝlokojn. Oni ne povos rakonti

bone la pensojn, kiujn ambaŭ gefratoj havis, nek kiel malsammaniere la du rigardadis Leokadiĝnon, dezirante al ŝi la morton Teodoro, la vivon Don Rafaelo, ambaŭ jaluzaj kaj enpasiigataj: Teodoro serĉante malperfektaĵojn, kiujn aljuĝi al ŝi por ne malpligrandigi sian esperon; Don Rafaelo, trovante en ŝi perfektaĵojn, kiuj de momento en momenton devigis lin ami ŝin pli kaj pli. Malgraŭ ĉio, ili ne malzorgis rapidiri, tiel, ke, ili venis en Barcelonon iom antaŭ la kuŝiĝo de la suno.

Mirigis ilin la bela loko de la urbo, kaj ĉi tiun estimis ili floro el la bela urbaro de la mondo, honoro de Hispanujo, timo kaj teruro por la ĉirkaŭnajbaraj kaj malproksimaj malamikoj, regalo kaj plezuro por ĝiaj loĝantoj, rifuĝejo de fremduloj, lernejo pri kavalireco, modelo pri lojaleco, ŝato por ĉio tio, kion de unu granda, fama, riĉa kaj bone fondita urbo povas postuli saĝa kaj kurioza deziro. Ĵus enirinte en ĝin, ili aŭdis grandan bruon, kaj ili vidis grandan popolamason kurantan tumulte, kaj demandinte la kaŭzon de tiu bruoj kaj movado, oni respondis al ili, ke la vojaĝantoj de la galeroj ankraditaj en la ankradejo estis tumultigintaj kaj batalis kontraŭ la urbanaro. Aŭdinte tion Don Rafaelo volis aliri vidi tion, kvankam Kalvete konsilis al li ne fari tion, ĉar ne estas saĝe iri sin meti en danĝeron, ĉar li sciis bone, kiel malbone sin liberigis tiuj, kiuj en tiajn batalojn sin metis, ke tiuj bataloj estis kutimaj, kiam al la urbo alvenis galeroj. Ne estis sufiĉa la bona konsilo de Kalvete por eviti la aliron de Don Rafaelo, kaj tial ĉiuj sekvis lin; kaj kiam ili alvenis al la haveno, ili vidis multajn spadojn ekster la ingoj, kaj multenombrajn virojn vundantaj sin reciproke sen ia kompato; dume ili, ne elseliĝinte, alvenis tiel proksime, ke ili perfekte vidis la vizaĝojn de la batalantoj, ĉar ankoraŭ ne kuŝiĝis la suno. Estis granda la popolamaso alkuranta de la urbo kaj multenombra tiu, kiu el la galeroj elŝipiĝadis, kaj tial ke tiu, kiu estis komandanta la galerojn; kiu estis kavaliro de Valencio nomata Petro Vike, de la ŝippostaĵo de la ĉefa galero, minacis tiujn, kiuj enŝipiĝis en la barketoj por iri helpi siajn samgaleranojn, kiuj ne atentis liajn ordonojn kaj minacojn, pro kio li ordonis turni la ŝipantaŭaĵojn de la galeroj al la urbo kaj pafi kanonon sen kuglo, signalo por atentigi, ke se la batalantoj ne apartiĝus, alia pafado estus kun kuglo. Dume, estis Don Rafaelo atente rigardanta la kruelean kaj furiozan batalon, kaj li vidis kaj rimarkis; ke de la loko, ĉe kiu pli sin rimarkigis la kuraĝuloj de la galeroj, kuraĝe rimarkinde batalis junulo dudek du jara aŭ iomete pli aĝa, verdvestita, kun ĉapelo de la sama koloro ornamita de riĉa juvelo kvazaŭ plektitaĵo

versajne el brilantoj; la lerteco per kiu li svingis la spadon kaj la belvida vesto, faris ke ĉiuj, kiuj rigardadis la batalon, sin turnu por lin rigardadi; kaj tiamaniere lin rigardis la okuloj de Teodoro kaj de Teodosiino, ke ili, ambaŭ samtempe, ekkriis:

—Helpu min Dio! Aŭ mi ne havas okulojn aŭ tiu de la verda vesto estas Marko Antono!

Kaj tion dirinte, per granda rapido ili desaltis de la muloj kaj eligante siajn ponardojn kaj spadojn, sen timo ia, ili sin ĵetis tra la tumultularo kaj sin metis unu ĉe unu flanko de Marko Antono kaj la alia ĉe la alia flanko lia—ĉar li estis la junulo de la verda vesto pri kiu estas dirite.

—Ne timu—diris ĵus alveninte Leokadiino ĉe la flanko de Marko Antono—, sinjoro Marko Antono, ĉar ĉe via flanko vi havas tiun, kiu estos ŝildo al vi per sia propra korpo por defendi vian.

—Kiu dubas tion—diris Teodoro—estante mi ĉi tie.

Don Rafaelo, kiu vidis kaj aŭdis tion, kio okazis, sekvis ilin ankaŭ kaj li sin metis en la partion de Marko Antono. Ĉi tiu, okupate ataki kaj sin defendi, ne atentis la parolojn, kiujn la du diris al li; male nur atentante la batalon, li faris aĵojn versajne nekredeblajn. Sed tial ke la popolamaso de la urbo, je ĉiu momento kreskis, estis devige al tiuj de la galeroj malantaŭeniri, eniri en la akvon. Malantaŭeniris malplaĉe Marko Antono, kaj ĉe la sama vico estis malantaŭenirantaj la du kuraĝaj kaj novaj Bradamanto kaj Marfiso aŭ Hipolito kaj Pantasileo. Je ĉi tiu momento venis kavaliro kataluna de la fama familio Kardonas, rajdante sur potenca ĉevalo kaj sin metante inter la du bandoj li devigis malantaŭeniri tiujn de la urbo, kiuj, koninte lin, obeis liajn ordonojn. Sed iuj, de malproksime, ĵetis ŝtonojn al tiuj, kiuj malantaŭeniris al la akvo, kaj volis la malbona sorto, ke ŝtono trafu tempion de Marko Antono, tiel forte, ke li falis akven en profundon ĝis la genuoj; kaj apenaŭ Leokadiino vidis lin falinta, ŝi brakpremis lin kaj lin subtenis sur siajn brakojn, kaj same faris Teodoro. Estis Don Rafaelo iomete deflankigata, sin defendanta el la nombregaj ŝtonoj, kiuj pluvis sur lin kaj volante alkuri al la helpo de sia amatino kaj al tiu de sia fratino kaj bofrato, kiam la kavaliro kataluna sin metis antaŭ li dirante.

—Trankviligu, sinjoro, je la fido al bona soldato, kaj faru al mi la bonvolon meti vin ĉe mia flanko, ĉar mi liberigos vin el la malrespekto kaj kuraĝo de la tumultiĝanta popolamaso.

—Ha, sinjoro—diris Don Rafaelo—permesu al mi pasi, ĉar mi vidas en granda danĝero tiujn, kiujn mi pli amas en ĉi tiu vivo.

Lasis lin pasi la kavaliro, sed li ne alvenis tiel ĝustatempe por eviti, ke oni ne estu lokuminta sur la boateton de la ĉefa galero Markon Antonon baj Leokadiinon, kiu neniam ellasis la vunditon el siaj brakoj, kaj ke ne estu aukaŭ celinta enŝipiĝi Teodoro, kiu ĉu pro laciĝo, ĉu pro doloro vidi vundita Markon Antonon, aŭ tial ke akompanis lin lia plej granda malamikino, li ne havis forton por supreniri al la boateto kaj, sendube, li estus falinta svenate en la akvo se lia frato ne alvenus ĝustatempe lin helpi, kaj la frato ne sentis malpli grandan doloron, vidante ke kun Marko Antono iris Leokadiino, ol lia fratino estis sentinta—ĉar aukaŭ li jam estis koninta Markon Antonon—. La kataluna kavaliro, allogate de la ĝentilaj sintenadoj de Don Rafaelo kaj Teodoro kiun la kavaliro kredis viro—, vokis ilin de la marbordo kaj petis de ili, ke ili bonvolu akompani lin; kaj ili, devigate de la neceso kaj timante ke la popolamaso, ankoraŭ ne pacema, estu faronta al ili ian ofendon, akceptis la proponon, kiun la kavaliro faris al ili.

La kavaliro desaltis de la selo kaj akompanante ilin ĉe la flanko, kun la spado nuda, li trairis tra meze de la popolamaso tumultigita, petante al ĝi, ke ĝi disiĝu, kaj tiel la tumultuloj faris. Celante vidi Kalvete'n kun la muloj, Don Rafaelo rigardis ĉien, kaj li ne vidis la muliston, ĉar ĉi tiu, apenaŭ ĉiuj sin elseligis, prenis la rimenkondukilojn de la bestoj kaj aliris al gastejo, en kiun, aliajn fojojn, li sin loĝigis. Alvenis la kavaliro al sia hejmo, kiu estis unu el la ĉefaj de la urbo, kaj demandis al Don Rafaelo en kiu galero li venis, kaj Don Rafaelo respondis, ke en neniu li venis, ĉar li estis alveninta al la urbo je la sama momento de la ekbatalo, kaj ke koninte en ĝi la kavaliron, kiun oni vundis per ŝtonfrapo, kaj kiun la galeranoj enŝipigis en la boateton, sin metis en tiun dangezon, petante al la kavaliro, ke ĉi tiu ordonu por revenigi teren la vunditon, ĉar de tio dependis la kontento kaj la vivo liaj.

—Mi tion faros bonvole—diris la kavaliro—, kaj mi scias, ke la vunditon donos al mi certe la generalo, kiu estas ĉefa kavaliro kaj parenco mia.

Kaj senprokraste li iris al la galero, kaj li alvenis al ĝi je la momento kiam oni kuracis Markon Antonon, kies vundo estis danĝera, ĉar ĝi estis ĉe la maldekstra tempio kaj ĝin konsideris riskiga la kuracisto. La kavaliro atingis de la generalo la vunditon por lin kuraci teren, kaj metante la vunditon tre singardeme en la boateton, akompanate de Leokadiino, kiu ankaŭ reenŝipiĝis kun la kavaliro, ĉar ŝi ne

volis sin apartigi de Marko Antono, ĉi tiun sekvante, kvazaŭ li estus la norda stelo de ŝia espero. Alveninte teren, la kavaliro ordonis alporti al li manseĝon de sia hejmo, por porti la vunditon. Dum ĉi tio estis okazanta, estis sendinta Don Rafaelo personon serĉi Kalvete'n, kiu estis en la gastejo, maltrankvila kaj scivolema je la sorto, kiun estis havintaj al si liaj mastroj, kaj kiam li sciis, ke al ili nenio malbona okazis, li ĝojis troe kaj venis al la domo en kiun oni gastigis Don Rafaelon.

Dume alvenis la mastro de la domo, Marko Antono kaj Leokadiino, kaj ĉiujn gastigis en sian hejmon la kavaliro tre ameme kaj sindonemege. La kavaliro ordonis poste, ke oni voku faman kuraciston de la urbo, por kuraci denove Markon Antonon. La kuracisto venis, sed li ne volis kuraci lin ĝis la sekvanta tago, dirante ke ĉiam la kuracistoj de la militistaroj kaj maraj armeoj estis tre spertaj pro la multnombraj vunditoj, kiujn je ĉiu okazo kuracis iliaj manoj, kaj tial ne esti konvene kuraci lin ĝis la sekvanta tago. Tio, kion la kuracisto ordonis, estis, lokumi la vunditon en varman ĉambron en kiu oni faciligu al li ripozon. Alvenis, je tiu momento, la kuracisto de la galerioj, kaj li donis klarigojn al tiu de la urbo pri la vundo, pri la maniero per kiu li kuracis la vunditon kaj pri lia danĝero perdi la vivon, laŭ sia opinio; per kio la urba kuracisto finiĝis konscii, ke la vundito estis bone kuracita, kaj samtempe—laŭ la klarigado aŭdita de li—, li trograndigis la danĝeron de Marko Antono.

Aŭdis tion ĉi Leokadiino kaj Teodoro tiel angore, kvazaŭ ili estus aŭdintaj siajn mortkondamnojn; sed por ne elmontri la doloron, ili haltigis kaj silentigis siajn sentojn, kaj Leokadiino decidis fari tion, kio ŝajnis al ŝi esti pli profitdona por satigi ŝian honoron, kaj ĉi tio estis, ke apenaŭ la kuracistoj estis forrintaj, ŝi eniris en la ĉambron de Marko Antono kaj antaŭ la ĉefo de la domo, antaŭ Don Rafaelo kaj Teodoro kaj aliaj personoj, ŝi alproksimiĝis al la lito de la vundito ĉe la kaploko kaj prenante al li manon, ŝi diris al li ĉi tiujn dirojn:

—Ne estas vi en okazo, sinjoro Marko Antono Adorno, dum kiu oni povu nek devu uzi kun vi multajn parolojn; kaj tial mi nur volas ke vi aŭskultu iujn, kiuj konvenas ĉu ne por la sano de via korpo, jes por tiu de via animo, kaj por diri ilin al vi estas necese, ke vi donu al mi permeson kaj ke vi min avertu ĉu vi estas en okazo aŭskulti min, ĉar ne estus ĵuste, ke celinte, de la unua momento de kiam mi vin konis, nur fari tion, kion vi ŝatis, je ĉi tiu momento, kiun mi konscias la lasta, mi estu al vi kaŭzo por ĉagreno.

Je ĉi tiuj diroj, malfermis Marko Antono siajn okulojn kaj ĉi tiujn li turnis atente al Leokadiino, kaj koninte ŝin preskaŭ pli per ŝia voĉo ol per sia vido, li, per voĉo malforta kaj dolora, diris:

—Diru, sinjoro, tion, kion vi volu, ĉar mi ne estas tiel proksima je la fino, ke mi ne povu aŭskulti vin, nek tiu voĉo estas al mi tiel mala-grabla, ke estu por mi ĉagreno aŭdi ĝin.

Estis atentema je ĉi tiu dialogo Teodoro, kaj ĉiu parolo dirita de Leokadiino estis akra sago, kiu trapikis lian koron kaj eĉ la animon de Don Rafaelo, kiu samtempe aŭskultis Leokadiinon. Kaj ĉi tiu, daŭrigante, diris:

—Se la bato ĉe la kapo, aŭ, plibone dirite, tiu, kiun oni donis al mi ĉe la animo, ne estus forportinta, sinjoro Marko Antono, de via memoro la bildon de tiu, kiun antaŭ nemulte vi kvalifikis via plezuro kaj via ĉielo, bone vi devus rememori, kiu estas Leokadiino, kaj kiu estas la promeso, kiun kun via subskribo kaj parafo vi donis al ŝi per dokumento skribita de via propra mano, nek forgesi la valoron de ŝiaj gepatroj, nek la forton de ŝia diskreteco kaj honesteco kaj la devon, kiun vi havas por ŝi, tial ke ŝi estis komplezanta vin je ĉio, kion vi volis de ŝi; se ĉi tion vi ne estus forgesinta, kvankam vi vidas min kun ĉi tiu vesto tiel diferenca, vi facile konus, ke mi estas Leokadiino, kaj mi, timante ke novaj malhelpaĵoj kaj novaj okazontaĵoj forprenu al mi tion, kio tiel juste estas mia, ĵus sciinte, ke vi estis foririnta de via urbo, saltinte super senfinajn malkonvenaĵojn, decidis sekvi vin sub tiu ĉi kostumo, kun celo serĉi vin tra ĉiuj partoj de la tero kaj esti trovonta vin. Pro kio vi ne devas miri, se estus, ke, fojon, vi estus konsciinta tion pri kio estas kapabla la forto de vera amo kaj la kolero de trompita virino. Iujn penadojn mi suferis dum ĉi tiu mia entrepreno, ĉiujn kiujn mi juĝas kaj konsideras bono, ĉar ili trenis la okazon vidi vin; ĉar, tial ke vi estas en tia stato, se Dio volus porti vin de ĉi tiu vivo al alia plej bona, faronte vi tion, kion vi ŝuldas al tiu, al kiu vi estas devigata, mi juĝos min pli ol feliĉa, promesante al vi, kiel mi promesas, pasigi la vivon depost via morto tiel, ke malmulte da tempo pasos por vin sekvi de ĉi tiu lasta kaj deviga tagirado. Kaj tiel, mi vin petas, unue je Dio, al kiu miaj deziroj kaj celoj aliras, kaj poste je vi, ĉar vi estas devigata de vi mem pro via kavalireco, fine je mi, ĉar al mi vi estas devigata pli ol al alia persono de la mondo, ke ĉi tie, nun, vi min akceptu kiel legitiman edzinon, ne permesante, ke la juĝisto faru tion, kion, per tiom da veroj kaj devoj, la pravo konsciigas al vi.

Ne diris pli Leokadiino, kaj ĉiuj, kiuj estis en la salono, konservis mirindan silenton dum ŝi estis parolanta, kaj tiel silente ili atendis la respondon de Marko Antono, kiu estis la jena:

—Mi ne povas nei, sinjorino, ke mi vin konas kaj ke via voĉo kaj via vizaĝo ne konsentus, ke mi tion neu. Ankaŭ mi ne povas nei, ke mi ŝuldas multon al vi, ke la valoro de viaj gepatroj estas granda kune kun via nekomparebla honesteco kaj diskreteco; nek mi konsideras, nek konsideros, vin malpli estiminda pro tio, kion vi faris por veni serĉi min uzante veston tiel malsaman je via; male, pro tio ĉi, mi vin estimas kaj estimos pli altgrade ol estas eble; sed ĉar mia nelongedaŭra sorto metis min ĉe la fino, kiel vi diris, ĉar mi kredas, ke ĉi tiuj momentoj estos la lastaj de mia vivo, kaj estas tiaj okazoj tiuj dum kiuj oni diras la verojn, mi volas diri al vi unu veron, kiu, se ne estus nun plaĉa al vi, povus esti, ke poste ĝi estu profitdona por vi. Mi konfesas, bela Leokadiino, ke mi vin amis bone, kaj ke vi min amis, kaj kune kun ĉi tio mi konfesas, ke la dokumento, kiun mi faris por vi, pli estis farata por komplezi vian deziron ol mian; ĉar antaŭ ol mi estis subskribanta ĝin, multajn tagojn antaŭe mi estis doninta mian volon kaj mian animon al alia fraŭlino de mia urbo mem, al ŝi mi donis la manon subskribitan kaj kreditigitan de tiaj agoj kaj atestantoj ke mi restis nekapabligata doni mian liberecon al alia persono en la mondo. La amo, kiun mi sentis al vi, estis distraĵo, ne atinginte de ĝi pli ol la florojn, kiujn vi scias, kaj kiuj ne vin ofendis, nek povas ofendi, iel ajn; tio, kio kun Teodosiino okazis al mi, estis atingi la frukton, kiun ŝi povis doni al mi kaj kiun mi volis, ke ŝi al mi estu donanta kun fido kaj certeco esti sia, kiel mi estas; kaj se ŝin kaj vin mi forlasis samtempe, vin mirigante kaj trompante, ŝin timigante kaj, laŭ ŝia opinio, sen honoro, mi faris tion malsaĝe pro malsperto de junulo, kiel mi estas, kredante ke ĉiuj tiuj aĵoj estis negravaj kaj ke mi povis ilin fari sen ia skrupulo, kaj pro aliaj pensoj, kiuj tiam en min venis, kaj kiuj altrudis al mi tion kion mi volis fari, tio estis, aliri al Italujo kaj tie pasigi iujn jarojn el mia juneco kaj poste reveni vidi tion, kion Dio estos farinta al vi kaj al mia vera edzino; sed la ĉielo, ĉagrenite de mi sendube, mi kredas, estas perme-sinta meti min je ĉi tiu maniero, kiun vi vidas, por ke mi, konfesante ĉi tiujn verojn, kiujn naskis miaj multaj kulpoj pagu dum ĉi tiu vivo tion, kion mi ŝuldas; por ke vi restu disrevigata kaj libera por fari tion, kion vi konscios pli deca, kaj se iam Teodosiino sciis mian morton, ŝi scios per vi kaj per tiuj, kiuj aŭskultas min, kiel, je la momento morti,

mi plenumis la promeson, kiun mi donis al ŝi dum vivo; kaj se dum la mallonga tempo da vivo, kiu restas al mi, sinjorino Leokadiino, mi povas servi vin je io, diru tion al mi, ĉar se ne estus tio akcepti vin kiel edzinon, tial ke mi ne povas, nenian alian aĵon mi lasus fari, se al mi estus ebla, por doni al vi plaĉon.

Dum Marko Antono diris tiujn ĉi rezonojn, li levis sian kapou ĉe la mano, apogante sian kubuton sur la lito, kaj ĵus fininte, li faligis la brakon kvazaŭ svenante. Alkuris al li tuj Don Rafaelo kaj brakpremane lin forte, Don Rafaelo diris:

—Rekonsciĝu, sinjoro mia, kaj brakpremu vian amikon kaj bofraton, ĉar vi volas, ke mi tiel estu; konu Don Rafaelon, vian kamaradon, kiu estos la vera atestanto pri via volo kaj pri la favoro, kiun al lia fratino vi volas fari akceptante ŝin kiel edzinon.

Rekonsciĝis Marko Antono kaj tuj li konis Don Rafaelon kaj brakpremane lin forte kaj kisante lin ĉe la vizaĝo diris la vundito al li:

—Nun mi diras, bofrato kaj sinjoro mia, ke la granda ĝojo, kiun mi estas ricevanta vidante vin, ne povas alporti malpli grandan sed malbonan kompenson, grandegan ĉagrenon, ĉar oni diras, ke post la plezuro venas la malĝojo; sed mi konsideros bone suferita kian ajn venontan en min kompanse esti ĝuinte la kontenton vidi vin.

—Nu, mi volas fari la kontenton al vi pli kompleta — rediris Don Rafaelo — prezentante al vi ĉi tiun juvelon, kiu estas via amata edzino.

Kaj serĉante Teodosiion, li ŝin trovis ploraŭta post la ĉeestantaro, kostuŝata kaj mirigata de la doloro kaj de la ĝojo pro tio, kion ŝi vidis, kaj pro tio, kion ŝi estis aŭdinta. Prenis ŝin ŝia frato ĉe la mano, kaj ŝi, ne farante kontraŭstaron, permesis ke ŝia frato ŝin tiru kien li volis, tio estis, antaŭ Markon Antonon, kiu konis ŝin kaj ŝin brakpremis, versante ambaŭ dolĉajn kaj amajn larmojn. Mirigate restis ĉiuj, kiuj en la salono estis, vidante tiel strangan okazantaĵon; ili rigardis unu la alian ne parolante parolon, atendante la finiĝon de tiuj aĵoj. Sed la elrevigita kaj malbonsanca Leokadiino, kiu vidis per siaj okuloj tion, kion Marko Antono faris, kaj tiun, kiu ŝi kredis frato de Don Rafaelo, en la brakojn de tiu, kiun ŝi konsideris sia edzo, konsciente kune kun ĉi tio siajn dezirojn malsukcesintaj kaj siajn esperojn perditaj, ŝi ruze sin liberigis el okuloj ĉies — atente rigardantaj tion, kion la malsanulo faris kun la paĝio, kiun li retenis brakpremen, kaj ŝi eliris el la salono aŭ ĉambrego, kaj rapide ŝi sin metis straten celante iradi senespera tra la mondo aŭ ien, kie personoj ne vidu ŝin; sed apenaŭ ŝi estis atinginta la

straton, kiam Don Rafaelo rimarkis ŝian foreston, kaj same, kvazaŭ de li estus forfluginta lia animo, li demandis pri ŝi, kaj neniu sciis doni al li sciigojn pri ŝia celiro, kaj ne atendante plu, maltrankvilege, li eliris serĉi ŝin, kaj li alkuris al la gastejo en kiu oni diris al li esti gastigata Kalvete, pro eblo ke ŝi estu alŝrinta tien por havigi al si memmovulon por forraĵdi; kaj ne trovinte ŝin tie, li stratiris kvazaŭ frenezulo, serĉante ŝin de loko al loko, kaj pensante ĉu eble ŝi estis reveninta al la galeroj, li alvenis al la haveno, kaj iom da tempo antaŭ la alveno, li aŭdis ke per laŭtegaj paroloj oni petis de la tero la boateton de la ĉefa galero, kaj li konis, ke tiu, kiu laŭtpetis la barketon, estis la bela Leokadiino, kiu, suspektema je ia malbonaĵo, aŭskultante paŝbruo malantaŭen de ŝi, elingigis la spadon kaj atendis singardeme ĝis la alveno de Don Rafaelo, kiun ŝi tuj konis, kaj ŝi ĉagreniĝis pro la renkontiĝo, kaj pli ankoraŭ ĉar tio okazis en loko tiel izola, kaj jam ŝi estis konsciinta, per pli da unu elmontraĵoj faritaj de Don Rafaelo, ke ĉi tiu ne amis ŝin malbone, sed tiel bone, ke ŝi akceptus kiel bonan ŝancon, ke Marko Antono amus ŝin tiel same.

Kiel esprimĝuste povi diri nun la manieron per kiu Don Rafaelo diris al Leokadiino, proponante al ŝi sian animon, ĉar li uzis tiom da paroloj kaj tiajn parolojn, ke mi ne kuraĝas ilin skribi? Sed ĉar estas nepre diri iujn el tiuj, kiujn li diris, jen ĉi tiuj:

—Se kun la feliĉo, kiu mankas al mi, mankus nun al mi, ha belega Leokadiino!, la kuraĝo malkaŝi al vi la sekretojn de mia animo, restus enterigata en la internaĵoj de la eterna forgeso la plej enamiginta kaj honesta volo, kiu estis naskiĝinta kaj kiu povas naskiĝi ĉe ambrulanta brusto. Sed por ne fari ĉi tiun ofendon al mia justa deziro, venu en min tio, kio venu, mi volas, sinjorino, ke vi konsci, se tion ĉi permesus al vi via aliloken forprenita penso, ke pri neniu aĵo supermezuras min pli Marko Antono, ol pri la bono esti amata de vi: mia deveno estas tiel bona, kiel lia, kaj pri la bonaĵoj, kiujn oni nomas riĉaĵoj, ne multe li supermezuras min; pri tiuj naturaj, ne estas dece, ke mi min laŭdu, kaj malpli se al viaj okuloj ili ne estus estimindaj; ĉion tion ĉi mi diras, enpaŝigita sinjorino, por ke vi akceptu la riparon kaj la peron, kiujn la sorto al vi proponas ĉe la limo de via malfeliĉo; vi jam scias, ke Marko Antono ne povas esti via, ĉar la ĉielo lin destinis por mia fratinino, kaj la sama ĉielo, kiu hodiaŭ estas forpreninta al vi Markon Antonon, al vi volas fari rekompencan per mi, ĉar mi ne deziras pli alian bonon dum la vivo, ol min doni kiel edzon al vi; atentu, ke bona sukceso

estas frapanta la pordojn, kiujn ĝis nun vi havis por la malbona, kaj ne pensu ke la kuraĝo, kiun vi estis montrinta por serĉi Markon Antonon estos kaŭzo por ke mi ne estimu vin kaj vin konsideru pri ĉio, laŭ vi meritas, malpli ol se vi neniam estus havinta ĝin, ĉar, je la horo kiam mi volas kaj decidas egaligi min kun vi, elektante vin kiel ĉiaman mastrinon mian, je tiu sama horo, mi tion forgesos, eĉ jam mi forgesis ĉion, kion mi sciis kaj vidis pri ĉi tio; ĉar bone mi scias, ke la fortoj, kiuj min devigis por ke tiel subite kaj liberbride mi min estu decidinta ami vin kaj min mem doni al vi, ĉi tiuj samaj tiris vin en la staton en kiu vi vin trovas, tiel ne estos necese serĉi senkulpigon, kiam ne estis eraro.

Silente restis Leokadiino je ĉio, kion Don Rafaelo diris al ŝi, nur de tempo al tempo ŝi lasis liberlĝi profundaj sopiroj, kiuj eliris el ŝiaj centraj internajoj; kaj Don Rafaelo havis kuraĝon preni al ŝi manon, kaj ŝi ne havis forton por bari tion, kaj tie, kisante al ŝi la manon multajn fojojn, li diris:

—Fine, decidu vin, mastrino de mia animo, estu ĉi tio tutplene sub la vido de ĉi tiu stelumita ĉielo, kiu kovras nin, kaj de ĉi tiu trankvila maro, kiu nin aŭskultas, de ĉi tiuj banataj sabloj, kiuj nin surtenas; donu al mi jam la jeson, kiu sendube konvenas tiel al via honoro, kiel al mia kontento; mi ree diras al vi, ke mi estas kavaliro, kiel vi scias, kaj riĉa, kaj ke mi amas vin bone, kaj estas tio ĉi, kion vi pli devas estimi, kaj ke vi anstataŭ vin trovi sola kun vesto, kiu ne estas deca por via honoro, malproksime de la hejmo de viaj gepatroj kaj parencoj, sen persono, kiu zorgu vin je ĉio, kion vi bezonos, sen espero atingi tion, kion vi serĉis, vi povas reveni al via naskiĝloko vestante vian propran honoran veran vestaron, akompanate de tiel bona edzo, kiel tiu, kiun vi sciis elekti por vi; riĉa, kontenta, estimata kaj servata kaj eĉ laŭdata de ĉiuj, kiujn trafos la okazintaĵoj de via historio; finu, ĉar alifojon, mi diras al vi, levigu min de sur la planko de mia mizero al la ĉielo meriti vin, ĉar, tion farinte, vi faros por vi mem, kaj vi plenumos la leĝojn de la ĝentileco kaj de la bona saĝo, vin montrante samtempe dankema kaj diskreta.

—Nu, do—diris je ĉi tiu rezono la dubanta Leokadiino—, ĉar tiel tion estas ordoninta la ĉielo, kaj ne estas en mia mano, nek en tiu de iu vivanto, kontraŭstarigi tion, kion ĝi estas decidinta, fariĝu tio, kion ĝi kaj vi volas, mia sinjoro; kaj la ĉielo mem scias kun kia honto mi decidas komplezi vian volon, ĉar mi ne komprenas la multon, kiun mi

gajnas obeante vin, sed ĉar mi timas, ke satiginte vian deziron, vi rigardos min per okuloj malsamaj je tiuj, kiuj eble ĝis nun, rigardante min, estas trompintaj vin; sed kio ajn okazos, fine, la nomon edzino legitima de Don Rafaelo de Viljavencio mi ne povos perdi, kaj pro ĉi tiu titolo sola mi vivos kontenta; kaj se la konduto, kiun vi rimarkus en min, depost nia geedziĝo, estus fundamento por ke vi min estimu iom, mi donus al la ĉielo dankojn esti kondukinta min sur tiel strangaj vojoj kaj per tiom da malbonaĵoj al la bono esti via; donu al mi, sinjoro Don Rafaelo, la manon kiel pravon esti mia; kaj estu atestantoj tiuj, kiujn vi diris: la ĉielo, la maro, la sabloj kaj ĉi tiu silento nur interrompita de miaj sopiroj kaj de viaj petoj.

Dirinte tion ĉi, ŝi permesis al la kavaliro brakpremi ŝin, kaj ŝi donis al li sian manon, kaj Don Rafaelo al ŝi sian, festante la noktan kaj novan geedziĝon nur la larmoj, kiujn la kontento, spite de la pasinta malĝojo, ŝprucigis de iliaj okuloj. Poste ili revenis al la domo de la kataluna kavaliro, kiu havis grandegan ĉagrenon pro ilia foresto, kaj saman havis Marko Antono kaj Teodosiino; kiuj jam de mano de pastro estis geedzigitaj, ĉar, pro rezono de Teodosiino—timanta ke ia kontraŭa okazontaĵo ne permesu la bonon, kiun ŝi estis trovinta—la kavaliro ordonis la alvenon de la pastro, kiu geedzigis ilin; tial, kiam Don Rafaelo kaj Leokadiino eniris, kaj Don Rafaelo rakontis tion, kio okazis al li kun Leokadiino, la kavaliro kaj la ĉeestantoj pli ĝojis, ol se ili estus iliaj proksimaj parencoj: ĉar estas natura kvalito propra de la katalunaj nobeloj scii esti amikoj kaj favori la fremdulojn, kiuj de ili bezonas ian neceson. La pastro, kiu ĉeestis, ordonis, ke Leokadiino ŝarĝu la veston kaj sin vestu la propran; kaj la kavaliro por tio provizis akurate donante al ĉiu el ili riĉan veston de sia edzino, kiu estis altranga sinjorino el la familio Granoljekes, fama kaj antikva familio en tiu regno. Li avizis la kuraciston, kiu plendis pro homamo pri la vundito, ĉar li troe parolis, kaj tial ke oni ne lasis lin sola; la kuracisto alvenis kaj ordonis unue lasi la vunditon en silenton. Sed Dio, kiu tiel estis ordoninta, uzante, kiel rimedon kaj ilon por siaj faroj—kiam al niaj okuloj Li volas fari iun mirindaĵon—, tion, kion la naturo mem ne trafas, ordonis, ke la ĝojo kaj malmulta silento, kiujn Marko Antono estis havinta, estu kaŭzo por plibonfartigi lin, oni trovis lin for de la danĝero, kaj de tiam en dek kvar tagoj li ellitiĝis tiel sana, ke sen timo ia li povis ekvojaĝi.

Estas sciinde, ke dum la tempo, kiam Marko Antono kuŝis sur la

lito, li faris promeson, se Dio kuracus lin, iri pilgrimade, piede al Santiago de Kompostela, kaj same promesis Don Rafaelo, Leokadiino, Teodosiino, eĉ Kalvete, la mulisto—ago malofte farita de liaj samprofesianoj—sed la boneco kaj modesteco, kiujn li estis koninta en Don Rafaelo, devigis lin ne forlasi tiun ĝis kiam ĉi tiu estu reveninta al sia lando; kaj konsciante ke ili devis iri piede, kiel pilgrimantoj, li kondukigis la mulojn al Salamanko kún tiu de Don Rafaelo, ĉar ne mankis iu per kiu sendi ilin. Alvenis, do, tagon por la deiro, kaj surmetinte la manteletojn kaj preninte ĉion necesan, ili diris adiaŭon al la sindonema kavaliro, kiu tiom estis favorinta kaj regalinta ilin, kies nomo estis Don Sanĉo de Kardona altranga pro la deveno kaj fama pro li mem; kaj ili promesis al li konservi konstante, same kiel iliaj posteuloj, ĉar al ĉi tiuj ili lasos ordoninta tiel, memoron pri la favoroj tiel eksterordinaraj, kiujn li faris al ili, por danki la favorojn almenaŭ, tial ke ili ne povis servi lin. Don Sanĉo brakpremis ĉiujn, dirante ke de lia natura kvalito devenis fari tiajn agojn aŭ aliajn samajn al ĉiuj, kiujn li konis aŭ konsciis kavaliroj kastilaj. Rebrakpremoj estis dufoje, kaj kun ĝojo miksata kun ia malgaja sento, ili diris la lastan adiaŭon kaj ekpiediris tiel oportune kiel permesis la delikateco de la du novaj pilgrimantinoj. Depost tri tagoj, ili alvenis al Montserrate, kaj tie ili restis dum aliaj tri tagoj kaj praktikis tion, kio estas deca je bonaj kristanoj; same repiediris ili la vojon, kaj ne okazinte al ili malbonaĵoj kaj malfeliĉoj ili alvenis al Santiago. Kaj ĵus plenuminte sian promeson kiel eble plej fervore, ili ne volis forlasi la pilgrimajn vestojn ĝis kiam ili estu atinginta siajn hejmojn, al kiuj piediris iom post iom senlacaj kaj kontentaj; sed antaŭ ol alveni, sin trovante je la vido de la loko de Leokadiino—kiu kiel estas dirite, staras je unu mejlo de tiu de Teodosiino—, de la supra de deklivo, ili ekvidis ambaŭ lokojn, ne povante kaŝi la larmojn, kiujn la kontento vidis la lokojn alfluigis al iliaj okuloj, super ĉio al tiuj de ambaŭ edzinoj, kiuj, per la vidaĵo, renovigis la memoron pri la okazintaĵoj.

Elvidiĝis, de kie la gepilgrimantoj staris, larĝa valo inter la du urboj, ĉe kiu ili vidis, ĉe la ombro de olivarbo, pretan kavaliroŝ sur potenca ĉevalo kun blankega ŝildo ĉe la maldekstra brako kaj tenanta oblikve dikan kaj longan lancon; kaj rigardante lin atenteme, ili vidis, ke ankaŭ, tra olivarbaro, venis aliaj du kavaliroj kun samaj armiloj kaj same ĝentile kaj sintenade, kaj de tiam en malmulton da tempo ili vidis, ke la tri kuniĝis, kaj ke depost iom da tempo de kuniĝo, la armitoj apartiĝis,

kaj ke unu el tiuj, kiuj laste estis alvenintaj apartigis kun tiu, kiu estis unue sub la branĉaro de la olivarbo; ke la du, spronfrapantĉe siajn ĉevalojn, sin ĵetis unu en alian elmontrante esti teruraj malamikoj, celante vundi unu la alian per kuraĝaj kaj lertaj lancofrapoj, kaj deflankigante la frapojn aŭ ricevante ĉi tiujn sur la ŝildon tiel lerte, ke ili bone komprenigis esti majstroj pri tiu skermo; la tria estis rigardanta la batalantojn senmove ĉe sia loko; sed ne povante pacienceme rigardi Don Rafaelo tiun tiel bravan kiel strangan batalon, rapide kurante malsupreniris la deklivon kaj lin sekvis lia fratino kaj lia adzino, kaj, je malmulte da tempo li sin metis apud la du batalantojn, ĝustatempe kiam jam la du kavaliroj estis iom vundataj; kaj ĉar la ĉapelo falis al unu el ili kaj kun ĝi kasko el ŝtalo, turninte la vizaĝon la batalanto, Don Rafaelo konis lin sia patro, kaj Marko Antono konis la alian sia patro ankaŭ. Leokadiino, kiu atenteme rigardadis tiun, kiu ne batalis, konis ĉi tiun, la patron, kiu naskis ŝin; pro la okazantaĵo la gepilgrimantoj restis mirigate, terurigate kaj nekonsciante; sed la surprizo donis lokon al pripensado de la saĝo, la du bofratoj, sen deteno, sin metis inter la du batalantoj, dirante:

— Ne plu, kavaliroj, ne plu, ĉar tiuj, kiuj ĉi tion petas kaj petegas je vi estas viaj propraj gefiloj. Mi estas Marko Antono, patro kaj mastromia - diris Marko Antono -; mi estas tiu, pro kiu, laŭ mi opinias, estas viaj blankharaj respektindaj metitaj en ĉi tiu terura okazantaĵo; moderrigu la furiozecon kaj ĵetu la lancon, aŭ turnu ĝin al alia malamiko, ĉar ĉi tiu, kiu rajdas kontraŭ vi, de hodiaŭ jam pli estos via frato.

Preskaŭ tiujn ĉi samajn saĝajn dirojn diris Don Rafaelo al sia patro. La kavaliroj, sin detenis kaj atente ili metis siajn rigardojn en tiujn, kiuj tiel sin turnis al ili, kaj turnante la kapojn, ili vidis, ke Don Sanĉo, la patro de Leokadiino, elrajdis teren kaj estis brakpremanta tiun, kiun la du kavaliroj opiniis esti pilgrimanto; kaj okazis, ke Leokadiino alproksimiĝis al li, kaj sin montrante al li, ŝi petis je li repacigi tiujn, kiuj batalis, rakontante al li per rapidaj paroloj, ke Don Rafaelo estas ŝia edzo, kaj Marko Antono tiu de Teodosiino.

Aŭdinte ĉi tion, ŝia patro sin elseligis teren kaj ŝin brakpremis, kiel estas dirite; sed forlasante ŝin, li alkuris repacigi ilin, kvankam ne estis necese, ĉar jam la du estis konintaj siajn filojn, plorante laŭ larmoj naskataj de amo kaj kontento kaj en brakpremado. Kuniĝis la tri, kaj la tri rigardadis siajn gefilojn, kaj la tri nesciis kion diri unu la alian; atencis iliajn korpojn dubo ĉu estis fantaziaĵoj, ĉar la neatendita

alveno kaj aliaj suspektoj naskis la dubon; sed, konvinkite iomete, ili révenis al la larmoj kaj brakpremoj. Kaj je ĉi tio, aperis tra la sama valo amaso el armitoj, piedirantoj kaj rajdantoj, kiuj venis respektive defendi la kavalirojn de siaj urboj; sed tial ke ili alvenis kaj vidis ilin brakpremataj de tiuj pilgrimantoj kaj larmŝvelantaj iliajn okulojn, la armitoj rajdantaj sin elseligis teren kaj miris restante en surprizo, ĝis kiam Don Sanĉo diris al ili rapide tion, kion Leokadiino, lia filino, estis rakontinta al li. Ĉiuj iris brakpremi la pilgrimantojn, elmontrante pruvojn pri kontento, kiujn oni ne povas tro laŭdi. Don Rafaelo denove rakontis al ĉiuj, per rapido, kiun la tempo postulis, la tutan okazintaĵon pri sia amo, ke li edziĝis kun Leokadiino, kaj lia fratino Teodosiino kun Marko Antono; novaĵoj, kiuj denove kaŭzis ĝojon. Poste, el la ĉevaloj mem de la armitamaso alkurinta al la helpo, la kavaliroj pretigis tiujn kiuj estis necesaj por la kvin gepilgrimantoj, kaj ili decidis aliri al urbo de Marko Antono promesante al ĉi tiu lia patro okazigi tie la geedziĝ-festojn de ĉiuj, kaj laŭ ĉi tiu opinio, ili deiris; kaj iuj el tiuj, kiuj ĉeestis la okazintaĵon, akcelis la iradon por konigi ĉion al la parencoj kaj amikoj de la geedzigitaj kaj por ke ili danku Dion.

Dum la vojirado sciis Don Rafaelo kaj Marko Antono la kaŭzon por la batalo, tio estis, ke la patro de Teodosiino kaj tiu de Leokadiino postulis dueli al patro de Marko Antono, tial ke la lasta estis sciinta la trompaĵojn de lia filo, kaj alveninte la du kaj trovinte lin sola, la du ne volis samtempe batali kontraŭ li profitante iun supermezuran forton, sed unu kontraŭ unu, laŭ kavaliroj; ke la batalo estu finiĝonta pro morto de unu aŭ de ambaŭ se la gepilgrimantoj ne estus tiel ĝustatempe alvenintaj. Donis dankojn al Dio la kvar gepilgrimantoj pro la ĝustatempe alveno. Kaj alian tagon, de post tiu de la reveno, per reĝa kaj brilega beleco kaj luksa malavaremo, festigis la patro de Marko Antono la geedziĝfeston de sia filo kun Teodosiino kaj tiujn de Don Rafaelo kun Leokadiino. Kaj Marko Antono kaj Don Rafaelo longajn kaj feliĉajn jarojn vivis akompanate de siaj edzinoj, postlasante faman posteularon, kiu venas ĝis hodiaŭ en tiuj du urboj, kiuj estas el plej bonaj de Andaluzio; kaj se oni ne nomas ilin estas por atenti pri la indeco de du virinoj, kiujn eble la langoj ofendemaj, aŭ malsaĝe skrupulemaj, kulpigus pro ilia senpripensoj pri iliaj deziroj kaj pri subita ŝanĝo de vesto; kaj mi petas al tiuj malsaĝe skrupulemaj, ke ili ne sin ĵetu mallaŭdi similajn libermemdecidojn ĝis kiam ili sin vidu en sama okazo esti vunditaj de ĉi tiuj, kiujn oni nomas saĝoj de Kupido, kiuj efektive

estas unu forto, se tiel oni povus ĝin nomi, nekontraŭstarebla, kiu metas la apetiton super la saĝon. Kalvete, la mulkondukisto, restigis al si tiun de Don Rafaelo, tiun, kiun li estis alkondukiginta al Salaman-ko, kaj kun aliaj multnombraj donacoj, kiujn la du edzigitoj donis al li. Kaj la poetoj de tiu tempo havis okazon por uzi la plumojn, trograndigante la belecon kaj la farojn de la du tiel kuraĝaj kiel honestaj fraŭli-noj, ĉefa celo de tiu ĉi stranga okazintaĵo.

RIMARRO: *Don* devenas de «*dominus*», kaj estas vorto, kiun oni antaŭmetis antikve antaŭ nomoj de altrangaj nobeloj, poste antaŭ nomo de ĉiuj kavaliroj, poste antaŭ tiu de ĉiu, kiu estis almenaŭ abituriento kaj jam oni ĝeneraligis la uzon troe.



KORNELIINO

Don Arturo de Isunza kaj Don Johano de Gamboa, samaĝaj proksimume kaj altrangaj kavaliroj, tre diskretaj kaj intimaj amikoj, estis studentaj en Salamanko kiam ili decidis forlasi la universitaton por alkuri al Flamandujo puŝite de la bolanta sango de l'juneco kaj instigite de la deziro, laŭ oni diras, vidi mondon, ĉar ŝajnis al ili pli inda la milita profesio ol iu ajn alia, ĉar kvankam glavo donas bonan sintendon al ĉiuj, des pli al tiuj, kiuj estas riĉaj kaj nobelsangaj. Nu; ili alvenis al Flamandujo ĝustatempe kiam reciprokaj interkonsentoj kaj traktoj estis celantaj rapide firman pacon. Ilin trafis en Antverpeno leteroj el la respektivaj patroj, esprimante ĉagrenon pro la neatendita decido kaj vojaĝo de la filoj sen ia ajn antaŭa avizo, ĉar, alimaniere, la patroj estus zorgintaj kiel eble plej bone la vojaĝon, laŭ dece. Fine, la amikoj, konante la patran ĉagrenon, decidis reveni al Hispanujo, ĉar nenio estis farota de ili en Flamandujo; sed antaŭ ol reveni al la patrujo, ili volis viziti plej famajn urbojn de Italujo; kaj vizitinte ĉiujn, ili haltis en Bolonio, kie, mirigate de la studoj de ĝia fama universitato, ili decidis daŭrigi siajn studojn en ĝi. Tial ili sciigis al siaj patroj la planon, kaj ĉi tiuj tre kontentaj elpruvis la kontenton provizante la amikojn malavarege por ke ili sin montru per sia riĉeco, ĝentileco kaj sindonemo tiel, kiel ilia nobeleco estis postulanta, konsciigante al ĉiuj kiajn patrojn ili havis: De la unua tago, de kiam ili ekĉeestis la kursejojn, ĉiuj juĝis ilin noblaj, ĝentilaj, diskretaj kaj bonedukitaj.

Don Antono estis proksimume dudekkvarjara kaj Don Johano ne supermezuris dudekses jarojn; kaj estis bela ornamo, altvalora, al tia aĝo, iliaj ĝentileco, emoj al muziko kaj poezio same, kiel iliaj lerteco kaj kurajo, kvalitoj farantaj ilin amindaj kaj bone amataj de ĉiuj, kiuj estis interrilatigitaj kun ili. Tuj la du kavaliroj kalkulis multenombro-

ajn amikojn, same hispanajn studentojn kiel fremdajn kaj italajn; ilia sindonema konduto al ĉiuj, samtempe ĝentila kaj fremda je tiu aroganteco, kiun, laŭ oni opinias, ĝenerale elmontras la hispanoj, estis rimarkinda; kaj tial ke ili estis junaj kaj gajaj, ili ĝojis sciante novaĵojn pri belulinoj de la urbo, kaj kvankam estis tre famaj pro siaj honesteco kaj beleco multaj fraŭlinoj kaj sinjorinoj, ĉiujn ĉi tiujn supermezuris F. ino Korneliino Bentibolli, de la antikva kaj sindonema familio Bentibolli iam mastrumanta Bolonion. Korneliino estis ekstreme belega sub gardo kaj protekto de Lorenzo Bentibolli, ŝia frato, honorega kaj kuraga kavaliro. La gefratoj estis orfaj, heredinte de la gepatroj riĉaĵojn, kiuj estas granda helpo ĉe la orfecoj. La honesteco de Korneliino estis tia, kaj la diligenteco de la frato ankaŭ estis tia por ŝin gardi, ke nek ŝi sin vidigis, nek ŝia frato konsentis ke oni vidu ŝin. Ĉi tiu famo naskis dezirojn ĉe Don Johano kaj Don Antonio vidi ŝin eĉ se tio estus okazonta en la preĝejo; sed la penoj, kiujn faris la amikoj por tio, estis vanaj, kaj la deziro, kiu fariĝis tranĉilo por la espero pro la neebleco, estis sensukcesa, pro kio nur ili pasigis vivon per amo al siaj studoj kaj honesta amuzado laŭ sia junaĝo; ilia vivo, do, estis tiel gaja kiel honora, ĉar malmultajn fojojn ili eliris dum la nokto, kaj okaze de eliro ili iris kune kaj bone armitaj.

Nokton, kiam Don Johano sin pretigis eliri, Don Antonio diris al tiu sian decidon resti ĉe la hejmo por preĝi iujn fervoraĵojn; ke Don Johano eliru, ĉar poste li pensis fari same.

—Ne estas kialo por mia antaŭa eliro, tial mi vin atendos, kaj eĉ se ni ne elirus tiun ĉi nokton ne estus grave—diris Don Johano.

—Ne, je via vivo, eliru spiradi la aeron, ĉar mi estos tuj apud vi, se vi irus tra kie ni kutimas promeni—rediris Don Antonio.

—Faru vian plaĉon, restu je bona horo, kaj se vi elirus estu certa ke mi paŝos ĉi tiun nokton la samajn lokojn, kiujn ni paŝis la pasintajn—aldonis Don Johano.

Don Johano eliris kaj restis ĉe la hejmo Don Antonio. La nokto estis iom malluma, je la dekunua, kaj Don Johano, trapasinte du-tri stratojn, sin vidante sola sen akompananto al kiu alparoli, decidis reveni hejmen kaj tion ĉi ekfaris ja, sed traitante straton, kiu havis portikon kun marmoraj kolonoj, li aŭdis, ke de pordo oni *stigas* (1) lin.

(1) Voki singardeme iun per sono atingita de aero eliranta inter la superaj dentoj kaj la fango, kies pinto estas proksima je la dentoj.

La mallumeco de la nokto kaj tiu kaŭzata de la portiko ne permesis al li trafi de kie venis la *siigon*. Li haltis iom, restis atenteme, kaj li vidis ke pordo duonmalfermiĝis; li alproksimiĝis al la pordo aŭdante malaltaŭtan voĉon dirantan: — Ĉu vi estas eble Favio?

Don Johano, tuŝate de la aventuro mallaŭte singardeme respondis jese.

—Nu; prenu—oni diris de interne—, metu ĉi tion en savon kaj revenu poste ĉar estas nepre necese kaj grave.

La kavaliro etendis la manon ektuŝante pakojn, kaj, volante ĝin preni, li konsciis esti necese uzi la du manojn, tial li devis preni la pakojn per ambaŭ manoj, kaj apenaŭ li tenis ĝin, oni fermis la pordon. Hazarde li sin trovis ŝargata en la strato nesciante pri la ŝargo; sed baldaŭ ekploris kreiteto, versajne ĵusnaskito, je kies ploro la kavaliro restis en konfuzo kaj mirigate, nesciante kion fari, ŝanceliĝante kiel agi kaŭze de la okazantaĵo, ĉar frapi la pordon li konsciis danĝere por tiu, kies suĉinfano estis la envolvito, kaj forlasi ĉi tiun tie okazigus riskon por la ĵusnaskito mem; male, porti lin al sia hejmo ankaŭ ne estis plena solvo, ĉar ĉe li ne estis persono por lin varti, nek li konis en la tuta urbo iun al kiu alporti la etuleton. Tamen, atentante ke oni rekomendis al li meti la kreiteton en savon kaj reveni atinginte ĉi tion li decidis alporti lin hejmen, lasi lin en la manoj de la dommastrino, kiu estis servanta lin kaj Don Antonon, kaj reveni poste en la okazintaĵojn atendi por se estus necesa lia helpo, ĉar bone li konsciis, ke oni kredis lin alia kaj ke estis eraro doni al li la ĵusnaskiton. Fine, ne farante pliajn rezonadojn, li revenis sian hejmon kun la ĵusnaskito braken, kiam jam Don Antonio estis foririnta; li eniris en sian ĉambron kaj vokis la dommastrinon kaj, malkovrante la ĵusnaskiton, li vidis la plej belan kreiteton el ĉiuj, kiujn li estis vidinta iam: la tolaĵoj, en kiujn oni envolvis la ĵusnaskiton, elmontris la gepatrojn riĉaj, kaj kiam la dommastrino malvolvis lin, ili rimarkis lian virsekson.

—Necese estas mamnutri ĉi tiun infaneton, por kio ni agos laŭ ĉi tiu plano: vi, dommastrino, demetos al li la riĉajn envolvantaĵojn kaj surmetos al li aliajn, pli humilajn, kaj silentante ke mi estas tiu, kiu lin trovis, vi lin alportos al la domo de akuŝistino, ĉar tiaj virinoj ĉiam kutimas doni sciigojn kaj perojn por samaj bezonoj; vi portos monon per kiu vi satigos ŝin donante nomojn de la gepatroj laŭ via plaĉo por kaŝi la veron pri tio klariganta ke mi estas alportinta lin—diris Don Johano.

La dommastrino promesis fari tute same, kiel planis Don Johano, kaj ĉi tiu, per plej granda rapido ebla, realkuris al la okazintajejo atendi ĉu oni *siigos* lin alian fojon; sed iom antaŭ ol alveni al la domo de kiu oni estis vokinta lin, li aŭdis grandan bruon de glavoj svingataj dum batalo, kvazaŭ multenombraj personoj batalus unu kontraŭ la aliaj. La kavaliro haltis atenteme, sed nenion li aŭdis, ĉar la batalo disvolvigadis en plena muteco. Je la heleco de la fulmoj kaŭzataj de la glavoj frapantaj unu la aliajn kaj la ŝtonojn, apenaŭ Don Johano vidis esti multaj tiuj, kiuj atakis unu solan, konvinkigante pri ĉi tio ĉar ĝustateme li aŭdis:

—Ha, perfiduloj, ĉar vi estas multenombraj kaj mi sola!... Sed spite de ĉio ne estos profitdona al vi via perfido.

Aŭdinte ĉi tion kaj vidante la batalon, Don Johano, puŝate de sia kuraĝa kaj sindonema koro, per du saltoj, sin metis flanken de la solulo, kaj, elingigante la spadon kaj tenante ŝildeton, kiun li portis, diris al tiu, kiu sin defendis brave, per itala lingvo, por ke oni ne konu lin hispano:

—Ne timu, ĉar helpo al vi estas veninta, kiu ne mankos al vi ĝis kiam la vivo forlasos min; svingu la glavon tiel brave kaj sperte kiel ĝis nun, ĉar perfiduloj povas malmulte eĉ se ili estas multenombraj.

Je ĉi tiuj diroj, ekkriis unu el la kontraŭuloj:

—Mensogas vi, ĉar neniu el ni estas perfida, kaj voli venĝi la rabiton honoron permesas ĉian eksceson.

Don Johano ne aldiris pliajn parolojn, ĉar ne permesis tion la rapido, per kiu celis vundi la solulon la atakantoj, kiuj estis ses laŭ opiniis la kavaliro. Tiel la ses atakis lian kunulon, ke, per du samtempaj spadfrapoj ĉe lia brusto, ili faligis lin teren. Ŝajnis al Don Johano, ke la ses estis mortigintaj la solulon, kaj eksterordinare rapide kaj kuraĝe li sin metis kontraŭ ĉiuj, devigante la atakantojn malantaŭeniri per uragano el spadfrapoj tranĉantaj kaj pikantaj; sed ne estus sufiĉa lia diligenteco por ataki la kontraŭulojn kaj sin defendi, se ne estus helpantaj lin najbaraj loĝantoj de la batalstrato, kiuj eltiris lampojn en la fenestrojn kaj vokadis la gardistojn per laŭtegaj voĉoj, pro kio la kontraŭuloj forlasis la straton, rapide forkurante. Jam, je ĉi tio, estis restariginta la falinto, ĉar la pintofrapoj de la spadoj trovis brustarmaĵon kvazaŭ el diamanto, en kiun la spadoj tuŝegis. Estis falinta la ĉapelo al Don Johano dum la batalo, kaj ĝin serĉante, li trovis alian, kiun li sin surmetis ne atentante ĉu ĝi estis aŭ ne lia. La falinto aliris al la kavaliro, dirante:

—Kavaliro, kiu ajn vi estu, mi konfesas ŝuldi al vi mian vivon, kiun mi konservas, kiun kun ĉio, kion mi valoras kaj posedas, mi proponas je via servo; bonvolu diri al mi kiu vi estas kaj kiu estas via nomo, por ke mi sciu al kiu mi devas min montri dankema.

Je tio, diris Don Johano:

— Mi ne volas esti malĝentila, tute male, mi plezure volas komplezi vian peton: mi estas hispana kavaliro, studento en ĉi tiu urbo, kaj ĉu estas grave al vi scii miajn nomojn por okazo ke vi volu min profiti iam, jen ili: Don Johano de Gamboa.

— Grandan favoron vi estas farinta al mi; sed mi, Don Johano de Gamboa, ne konigos al vi miajn nomojn rangon kaj ĉion alian pri mia persono; mi multe ŝatos, ke vi sciu ĉion per aliulo, kaj por ĉi tio mi celos bone, ke oni scigu ĉion al vi.

Don Johano estis demandanta unue al la solulo ĉu li estis vundata, ĉar Don Johano estis vidinta lin trafita de du gravaj spadbatoj; respondante la frapito, ke fama Brustŝirmilo, kiun li metis sub la veston, krom Dio, estis ŝirminta lin, sed tamen kaj spite de ĉio, liaj malamikoj estus mortigintaj lin se la hispana kavaliro ne sin estus metinta ĉe lia flanko. Je ĉi tio, ili vidis personamason, kiu alproksimiĝis, pro kio Don Johano diris:

— Ĉu ĉi tiuj estas la malamikoj revenantaj, vi vin pretigu, sinjoro, kaj vi vin konduitu tiel, kiel vi estas; sed, laŭ mia opinio, ili ne estas tiaj, kaj jes alkurantaj amikoj.

Kaj tiel estis, ĉar la alvenantoj, kiuj estis ok, ĉirkaŭis la nekonaton kaj parolis kun li malmultajn parolojn, tiel mallaŭte kaj sekrete, ke Don Johano ne povis ilin aŭdi. Revenis poste la defendito al Don Johano, dirante al ĉi tiu:

— Se ne estus venintaj ĉi tiuj amikoj, neniel, sinjoro, mi estus forlasonta vian akompanion ĝis kiam vi estus metinta min en savon; sed nun mi vin petas tutkore, ke vi foriru kaj lasu min ĉar ĉi tio konvenas al mi.

Tion ĉi dirante, li palpis al si sian kapon, rimarkante esti kapnuda, kaj sin turnante al tiuj ĵus alvenintaj, petis ĉapelon ĉar lia elfalis. Apenaŭ li tion estis dirinta, kiam Don Johano lin survestis tiun, kiun li estis trovinta ĉe la pavimo ĵus finita la batalo. La nekonato palpis la ĉapelon, kaj ĉi tiun redonante al Don Johano, diris:

— Ĉi tiu ĉapelo ne estas mia, je la vivo de l'kavaliro Gamboa, vi ĝin portu kiel venkosignon pri ĉi tiu batalo, kaj vi ĝin konservu, ĉar mi opinias, ke la ĉapelo estas sufiĉe konata.

Oni donis alian ĉapelon al la defendito, kaj Don Johano, por plenu tion, kion la defendito estis petinta de li, post aliaj kvankam rapidaj komplimentoj, lin lasis ne sciante kiu li estis, revenante en sian hejmon, ne volinte trairi ĉe la pordo de kie oni estis doninta al li la ĵusnaskiton, ĉar li opiniis, ke en la tuta kvartalo ĉiuj estis viglaj kaj maltrankvilaj pro la stratbatalo.

Okazis, do, ke, ĉe la mezvojo al la hejmo dum la reveno, li renkontis sian amikon, Don Antono de Isunza, sian kamaradon, kaj konante unu la alian, diris Don Antono:

— Revenu kun mi ĝis tie supre, kaj dum la irado mi rakontos al vi strangan okazintaĵon, kiu estis al mi, ĉar ion similan eble vi ne estas aŭdinta dum tuta via vivo.

Saman, kia estas via okazintaĵo, mi povos rakonti al vi—diris Don Johano—; sed ni iru kien vi volu kaj rakontu vian.

Gvidis Don Antono samtempe dirante:

— Sciu: malmulte deponi unu horo de via eliro el nia hejmo, mi eliris serĉi vin, kaj ne tridek paŝojn de ĉi tie mi vidis venanta preskaŭ al mia renkonto nigran figuron de persono, kiu rapide piediris, kaj kiam ĝi alvenis tre proksime je mi, mi konsciis la figuron virino per ŝia longa vestaro, kaj ŝi per voĉo interrompata de ploroj kaj sopiroj, diris al mi: «Je bonsorto, sinjoro, ĉu vi estas fremda aŭ urba?», respondante mi tuj: «Mi estas fremda, hispana», kaj ŝi ekkriis: «Dank' al ĉielo, ĉar ĝi ne volas, ke mi mortu sen sakramentoj», je kio mi demandis al ŝi: «Sinjorino ĉu vi estas vundita aŭ vin suferigas ia mortiga malsano?», kaj ŝi respondis: «Povas okazi, ke tio, kio suferigas min, tiel estus se baldaŭ oni ne donus al mi riparon; je la ĝentileco, kiu kutime ĉiam regas ĉe tiuj de via nacio, mi vin petas, sinjoro, ke vi forigu min el ĉi tiuj stratoj kaj konduku min en vian gastejon tiel rapide, kiel vi povos, ĉar tie, se vi ŝatus tion, scios la malbonon, kiun mi havas, kaj kiu mi estas, kvankam ĉio estu kontraŭ mia honoro». Aŭdinte tion, opiniante, ke ŝi bezonis tion, kion ŝi petis, ne aldirinte ion alian, mi prenis ŝin ĉe mano kaj tra stratoj malofte traŭraj de personoj, mi kondukis ŝin al nia loĝejo. Santisteban malfermis la pordon kaj mi devigis la armserviston foriri, evitante ke li vidu ŝin, ĉi tiun kondukante en mian ĉambron, kaj ŝi ĵus enirinte, sin jetis en mian liton svenante. Mi alkuris al ŝi, elvualigis ŝian vizaĝon, kiun ŝi kaŝis per vualmantelo, kaj mi vidis la plej grandan belulinon, kiun homaj okuloj estas vidintaj; ŝi estas, laŭ, mia opinio, aĝa je dekok jaroj, certe malpli ol pli. Mi restis mirigate vidante tiel eksterordinaran

belulinon dum momentoj, kaj tuj mi rapidis ŝuti iom da akvo en sian vizaĝon, per kio ŝi rekonsciĝis, sopirante kortuŝe, kaj tio, kion unue ŝi diris, estis: «Ĉu vi konas min?» «Ve—mi respondis—, nek estas bono, ke mi estu kavinta la bonŝancon koni tiom da baleco.» «Malfeliĉa tiu—ŝi diris—al kiu ĝin donas la ĉielo por plej granda malfeliĉo ŝia; sed, sinjoro, ne estas okazo ĉi tiu por laŭdi belulinon, sed por ripari malfeliĉojn; je vi mem mi petas, ke vi lasu min ĉi tie enfermata, ne permesante ke iu vidu min, kaj ke vi reiru tuj al sama loko, kie vi renkontis min kaj vidu ĉu iuj batalas, ne helpante iun ajn el la batalantoj, sed male, pacigu ilin, ĉar kiu ajn malbonaĵo de la bandoj estos kaŭzo por pligrandigi mian.» Mi lasis ŝin enfermata kaj mi venis repacigi la batalantojn.

—Ĉu vi diros ion alian al mi, Don Antonio?—demandis Don Johano.

—Ĉu vi ne opinias, ke mi estas dirinta tro?—respondis Don Antonio—Mi estas dirinta, ke mi havas sub ŝlosilo ĉe mia ĉambro mem la plej altvaloran belulinon, kiun iam vidis iu ajn.

—La okazintaĵo estas stranga, sendube; sed aŭdu mian—diris Don Johano. Kaj poste ĉi tiu rakontis al Don Antonio tion, kio al li estis okazinta, ke la ĵusnaskito, kiun oni estis doninta al li, estas ĉe ili, ĉe manoj de la dommastrino, al kiu li ordonis ŝanĝi la riĉajn envolvantaĵojn per aliaj pli humilaj kaj porti la kreiteton ien, kie oni mamnutros lin aŭ almenaŭ liveros al li necesan nutraĵon, aldonante ke la batalo, kiun Don Antonio venis serĉi, jam estis finita de tiuj, kiuj estis batalintaj kaj kiun li partoprenis, fariĝinte paco; ke, laŭ lia opinio, ĉiuj, kiuj partoprenis la batalon, estas altrangaj kaj grandvaloraj personoj.

La du kamaradoj, mirigate de la okazintaĵoj, rapide revenis en la hejmon, por scii tion, kion estis bezoninta la enfermatino. Ĉe la vojo, Don Antonio diris al sia kamarado la promeson al la enfermatino ne permesi al iu ajn vidi ŝin aŭ eniri en la ĉambron, en kiun li sola eniros dum ŝi ne ŝatos alian aĵon.

—Ne estas grave, ĉar ne mankos ordono por vidi ŝin, ĉar mi jam tion deziras troe, tial ke vi ŝin laŭdis kiel la plej belegan virinon—diris Don Johano.

Ili alvenis, tiam kaj ĉe la heleco de lampo portata de unu el tri armerservistoj, kiujn ili havis, suprenlevis la rigardon Don Antonio al la ĉapelo surportata de Don Johano, kaj tiu vidis ĝin elradiiganta pro diamantoj kaj, demetante la ĉapelon al sia kamarado, li rimarkis la elradiojn devenantaj de multenombraj diamantoj de buko. La du kamaradoj rig-

ardis kaj rerigardadis ĝin, konkludante, se la diamantoj ne estus falsaj, ĉar verŝajne estas veraj, ke la buko valoras pli ol dek du mil dukatojn. Pro ĉi tio, ili finis konvinkiĝi pri la altrangeco de la batalintoj, speciale pri tiu de la defendito de Don Johano, pri kiu ĉi tiu rememoris parolojn, per kiuj la defendito rifuzis la ĉapelon kaj rekomendis al Don Johano konservi ĝin, ĉar ĝi estas sufiĉe konata. Ili ordonis al la armservistoj foriri, kaj Don Antono malfermis sian ĉambron, trovante la belulinon sidanta sur la lito, kun mano ĉe ŝia vango, elverŝanta mildajn larmojn. Don Johano, pro la deziro, kiun li sentis vidi ŝin, sin metis en la enirejon tiom kiom li povis por, antaŭenigante sian kapon, rigardi singardeme, kaj je tiu momento mem, la brilo de la diamantoj trafis la okulojn de la plorantino, kiu, ilin levante, ekkriis:

—Eniru, sinjoro duko, eniru; kial vi volas tiel avareme doni al mi la bonon de via ĉeesto?

Je ĉi tio diris Don Antono:

—Ĉi tie, sinjorino, ne estas iu duko, ne volante vidi vin.

—Kiel ne? Tiu, kiu sin elmontris ĵus, estas la duko de Ferraro, ĉar lin denuncas la riĉeco de lia ĉapelo.

—Vere, la ĉapelon, kiun vi vidis, ne portas iu duko, kaj se vi volas konvinkiĝi vidante tiun, kiu ĝin portas, donu al li permeson por ke li eniru.

—Je bona horo, li eniru, kvankam se li ne estus la duko miaj mal feliĉoj estus pli grandaj—ŝi diris.

Don Johano ĉion aŭdis, tial li eniris en la ĉambron kun la ĉapelo en la mano kaj, kiam li staris antaŭ ŝi, kaj ŝi konis ne esti li tiu, kiun ŝi diris, tiun de la riĉa ĉapelo, per voĉo embarasata kaj rapidparolante, ŝi diris:

—Ve, malfeliĉa je mi! Mia sinjoro, diru tuj ne restigante min pli korpemata: ĉu vi konas la posedinton de tiu ĉapelo? Kien vi lasis lin, aŭ kiel lia ĉapelo venis al via posedo? Ĉu li estas feliĉe viva, aŭ estas la ĉapelo kuriero por anonci al mi lian morton? Ve, mia bono, kiaj okazantaĵoj estas ĉi tiuj? Ĉi tie mi vidas vian poseditaĵon, ĉi tie mi min vidas sen vi enfermata ĉe loko en kiu, se ĝi ne estus de hispanaj ĝentilaj kavaliroj, la timo perdi mian honestecon estus foriginta al mi la vivon!

—Trankviliĝu, ĉar nek la posedinto de ĉi tiu ĉapelo estas mortinta, nek vi estas ĉe loko, kie oni estas faronta al vi ian ofendon; sed male, servi vin per ĉio kion niaj kapabloj atingos, eĉ meti la vivon preta.

defendi kaj protekti vin, ĉar ne estas dece, ke estu vana al vi la fido, kiun vi havas pri la honoro de la hispanoj; kaj, ĉar ni tiaj estas, kaj altrangaj—je ĉi tiu okazo certe estas ĝustatempa tio, kio ŝajnas arroganteco—, estu certa, estos al vi la ĝentileco, kiun meritas via ĉeesto—diris Don Johano.

—Tiel mi kredas, sed malgraŭ ĉio, diru, sinjoro, kiel venis al via posedo tiun riĉan ĉapelon, aŭ kie estas tiu al kiu ĝi apartenis, tio estas, Alfonso de Este, duko de Ferraro—aldonis ŝi.

Tian Don Johano, por ĉesigi ŝian kortuŝstaton, rakontis kiamaniere li ĝin trovis dum la stratbatalo, kiun li partoprenis helpante kavaliron, kiu, lau tio de ŝi esprimita, sendube estis la duko de Ferraro; ke dum la batalo li estis perdinta sian ĉapelon kaj trovinta tiun; ke la kavaliro instigis lin por ĝin konservi, ĉar estante tre konata la ĉapelo, per ĉi tiu, la hispano scios, kiu estas la nekonata helpito; ke la batalo finiĝis feliĉe por la kavaliro kaj por li mem, kaj ke tuj, post la fino, estis alveninta personaro, kiu verŝajne estis servistaro aŭ amikoj de tiu, kiu ankaŭ verŝajne estis la duko, kiu estis petinta de li forlason kaj deiron kaj dankinta pro la helpo, kiun mi faris al li. Tial kaj tiel ĉi tiu riĉa ĉapelo venis al mia posedo, kaj ĝian posedinton, se li estas la duko, kiel vi asertas, mi adiaŭis ankoraŭ ne unu horo estas pasinta, kaj li restis bone, sane kaj sendanĝere: estu ĉio tio ĉi pero por via konsolo, se vi havus ĉi tiun sciante la bonan staton de la duko.

—Por ke vi sciu, sinjoroj, ĉu mi estas prava kaj mi havas fundamenton por demandi pri la duko, estu al mi atentemaj kaj aŭskultadu mian historion, kiun mi ne scias ĉu kvalifiki malfeliĉa.

Tutan tempon, dum ĉi tio okazis, la dommastrino pasigis gustumigante mielon al la ĵusnaskito kaj ŝanĝante liajn riĉajn envolvantukojn per aliaj humilaj, kaj jam kiam ŝi estis farinta ĉion, volis konduki la kreiteton al la hejmo de akuŝistino plenumante la ordonon de Don Johano, kaj pasante kun la infaneto apud la ĉambro, en kiu estis tiu, kiu volis rakonti sian historion, la ĵusnaskito ekploris tiele, ke la ploron aŭdis la enfermatino, kaj ĉi tiu, starante, sin metis atente aŭskulti, aŭdante pli klare la ploron kaj dirante:

—Miaj sinjoroj, kiu infaneto estas tiu, kiu ŝajnas ĵusnaskita?

Don Johano respondis:

—Ĉi tiun nokton oni forlasis ĉe la pordo de nia hejmo ĵusnaskiton, kaj la dommastrino iras serĉi iun, kiu mamnutros lin.

—Alportu lin al mi, ĉi tien, je la amo de Dio—diris la sinjorino—

ĉar mi faros tiun bonfaron al fremda filo, tial ke la ĉielo ne volas, ke mi tion faru al la propra.

Don Johano vokis la dommastrinon, li prenis la etuleton kaj lin alportis al tiu kiu lin petis, kaj la kavaliro metis la mamnutroton en ŝiajn brakojn dirante:

—Vidu jen, sinjorino, la donacitaĵon, kiun oni estas farinta al mi ĉi tiun nokton, kaj ne estas ĝi la unua, ĉar pasas malmultaj monatoj ne trovante ĉe la kradpordo samajn aĵojn.

Ŝi prenis lin ĉe siajn brakojn, kaj ŝi rigardadis atenteme tiel lian vizaĝon kiel la humilajn, kvankam purajn tolaĵojn en kiuj li estis envolvata, kaj poste, ne povante haltigi la larmojn, ŝi metis la vualon ds sur la kapo sur siajn mamojn, por povi honeste mamnutri la suĉinfanon, kaj alpremante lin al mammo, ŝi kunigis lian vizaĝeton kun sia, per sia lakto ŝi nutris lin kaj per siaj larmoj ŝi banis lian vizaĝeton; kaj tiamaniere ŝi restis ne levante la vizaĝon dum tiom da tempo kiom la suĉinfano volis suĉi la mamon. Dume ĉiuj silentis; la ĵusnaskito mamsuĉis; sed vere ne estis tiel ĉar la ĵusnaskintinoj ne povas doni sian lakton, kaj tion konsciante, tiu kiu volis mamnutri la etuleton, sin turnis al Don Johano dirante:

Vane mi min montris bonfarema; bone mi ŝajnas nova je tiuj ĉi okazoj; faru, sinjoro, ke ĉi tiun suĉinfanon oni nutru per iom da mielo kaj ne konsentu, ke, je ĉi tiuj horoj, portu lin tra stratoj; atendu alvenon de la tago, kaj antaŭ ol porti lin, revenigu lin al mi, ĉar mi min konsolas vidante lin.

Redonis la infanon Don Johano al la dommastrino, kaj li ordonis al ŝi lin varti ĝis la tagiĝo, ke ŝi lin resurvestu la riĉajn tolaĵojn, kun kiuj li lin alportis, kaj ke ŝi ne forportu lin sen antaŭa sciigo al li. Kaj kiam Don Johano reeniris, kaj estis la tri solaj, la belulino diris:

—Se vi volus, ke mi parolu donu al mi antaŭe ion, kion mi manĝu, ĉar mi svenas pro malsato kaj mi havas motivon sufiĉan por tio.

Alkuris rapide Don Antono al ŝranko kaj li eltiris el ĝi multenombrajn konservitaĵojn, kaj el ili iujn manĝis la malsatulino, kaj ŝi trinkis glason da malvarma akvo, per kio ŝi refortigis, kaj iom trankviliĝinte, ŝi diris:

—Sidiĝu, sinjoroj, kaj aŭskultu min.

Ili tiel faris, kaj ŝi duonelkuŝiĝis sidigante sur la liton, kaj sin ŝirmante kontraŭ la malvarmo per la jupoj de la vestaro, ŝi lasis elpendiĝi de sur la kapo dorsen vualo, lasante la vizaĝon libera kaj malkaŝata, montrante per ĝi tiun mem de la luno, aŭ plibone dirate, tiun de la suno

mem kiam ĝi pli bela kaj pli hela sin montras; pluvis fluidigitaj perloj el ŝiaj okuloj kaj ŝi viŝis ilin per lintuketo blankega ĉe manoj tiaj, ke estus tre saĝa tiu, kiu scius trovi diferencon inter la blankeco de la lintuketo kaj tiu de la manoj. Fine, ellasinte multajn sopirojn kaj celante trankviligi iom sian bruston, per voĉo iom dolora kaj embarasata, ŝi diris:

—Mi, sinjoroj, estas tiu, pri kiu multfoje vi estis, sen ia dubo, aŭdintaj paroli ĉie, ĉar la famon de mia beleco, tia, kia ĝi estas, malmultaj langoj estas nepublikigitaj; mi efektive estas Korneliino Bentibolli, kaj dirinte ĉi tion, eble mi estas dirinta du verojn: unue, mian nobelecon; due, mian belecon. De malgranda aĝo mi estis orfa je patro kaj patrino, sub mia frato, kiu de mia infaneco fidis por mia gardo pli al mia honesteco mem, ĉar li fidis je mia honora deveno, ol al la singardemo, kiun li havis por gardi min. Fine, inter muroj kaj ĉe soleco, akompanate nur de miaj servistinoj, mi kreskadis, kaj kune kun mi kreskadis la famo pri mia beleco, portita de la servistoj al la publiko, kaj de tiuj, kiuj, ĉe la sekreto de la familio, havis rilatojn kun mi, kaj de portreto, kiun mia frato mendis pentri al fama pentristo, por ke, kiel li diris, la mondo ne estu perdonta min, tial ke la ĉielo al plej bona vivo destinis min: sed ĉio ĉi tio estus malgranda kaŭzo por akceli mian malfeliĉon, se ne okazus, ke la duko de Ferrara venis esti edzigpatro de ceremonio edziniganta kuzinon mian, kaj en tiun ceremonion irigis min mia frato bonintence kaj je la honoro de mia parenco. Tie mi rigardis kaj estis rigardata; tie, laŭ mi opinias, mi venkis korojn, mi submetis volojn; tie mi konsciis, ke oni ŝatas laŭdojn, kvankam ilin faru flatemuloj; tie, fine, mi vidis la dukon kaj li vidis min, kaj de la intervidiĝo estas rezultinta, ke mi vidas min nun, kiel mi min vidas. Mi ne volas diri al vi, sinjoroj, ĉar estus diri senfine, la perojn, la ruzaĵojn, la manierojn per kiuj la duko kaj mi estas trafintaj, depost du jaroj, dezirojn, kiuj dum tiuj edziĝfestoj naskiĝis ĉe miaj koroj; ĉar nek gardistoj, nek sindeteno, ne honestaj admono, nek ia ajn homa rezono, estis sufiĉaj por bari nian kuniĝon, kiu fine okazis sub promeso, kiun li faris al mi, por esti mia edzo, ĉar sen la promeso estus neeble venki la rokon de mia kuraĝa kaj honora fiereco; mil fojojn mi diris al li, ke li publike petu min de mia frato, ĉar ne estus eble ke ĉi tiu malkonsentus, sen neceso doni klarigojn al la publiko kulpigonta la dukon pro edziĝo malsamranga, tial ke pri nenio la nobeleco de la familio Bentibolli estas malpli ranga ol tiu de lia, de la Estense. Je ĉi tio, li respondis al mi per senkul-

pigoj, kiujn mi konsideris sufiĉaj kaj pravaj, kaj fidema, kiel amosklavino, mi kredis kiel amantino, kaj mi min donis tute memvole al lia volo pere de servestino mia, pli mola je donacaĵoj kaj promesoj de la duko, ol je tio, kion ŝi ŝuldis al la konfido, kiun pri ŝia fideleco mia frato konsciis. Sekve, depost malmultaj tagoj, mi min sentis graveda, kaj antaŭ ol miaj vestoj elmontris mian libervolaĵon—kiun oni povas alnomi alimaniere—, mi ŝajnis malsanon kaj melankolion, kaj mi faris por ke mia frato loĝigu min en la hejmon de tiu mia kuzino, kies edziĝopatro estis la duko. De ĉi tie mi sciigis al la duko mian staton kaj la danĝeron minacantan min kaj la grandan riskon, kiun mi havis pri mia vivo, ĉar mi havis suspektojn koncerne tiujn de mia frato pri mia liberfaro; tial mi kaj la duko decidis interkonsente, ke, ĵus alveninta la lasta monato de la gravedeco, mi lin estu avizanta, ĉar li kun aliaj amikoj liaj venos renkonti kaj forkonduki min al Ferraro, kie ĝustatempe, laŭ li atendis, li edziĝos publike kun mi; ĉi tiun nokton mem estas tiu de la interkonsento por lia alveno, kaj ĉi tiun nokton mem, kiam mi estis atendanta lin, mi vidis mian fraton kun multenombraj akompanantoj armitaj, laŭ tintis la armiloj ĉe la strato, pro kio mi subite maltrankviligis kaj okazis al mi la nasko, kaj je momento mi naskis belan etuleton. Tiu servistino mia, sciante kaj helpante miajn agojn, kiu jam estis singardema por la okazaĵo, envolvis la ĵusnaskiton en aliajn tolaĵojn malsamajn je tiaj, kiajn havas tiu, kiun en vian pardonon oni metis; kaj ŝi, elirinte al la pordo ĉe la strato, donis la etuleton, laŭ ŝi diris, al servisto de la duko. Mi de tiu momento en malmulton da tempo, min pretiginte kiel eble plej bone—laŭ postulo de la okazintaĵo—, eliris el la hejmo, kredante ke la duko estis en la strato, kaj mi ne devis tion fari ĝis kiam lin mi estu vidinta ĉe la pordo; sed la timo, kiun kaŭzis al mi la armita bando de mia frato, kredante ke li jam eksvingis sian spadon super mian kolon, ne permesis al mi fari alian plej bonan aĵon; kaj tial mi malprudente kaj freneze eliris tien, kie okazis al mi tio, kion vi vidis, kaj kvankam mi vidas min sen filo kaj sen edzo kaj kun timo pri plej malbonaj okazintaĵoj, mi dankas la ĉielon, ĉar ĝi direktis min al vi, kaj de vi mi esperas ĉion tion, kio estas esperinda de la hispana ĝentileco, kaj pli de via ĝentileco, kiun vi scias plialtigi, ĉar vi estas tiel nobelaj kiel vi ŝajnas.

Dirinte ĉi tion, ŝi sin lasis fali tute sur la liton, kaj alkurante la du kavaliroj vidi ĉu ŝi svenis, ili rimarkis malon, ke ŝi dolorege ploris, kaj diris Don Johano:

. — Ĝis nun, bela sinjorino, mi kaj Don Antono, mia kamarado, sentis kompaton al vi kaj domaĝon pro via sekso; nun, kiam ni scias vian rangon, la domaĝo kaj la kompato fariĝas nepra devo servi vin; rehavigu al vi kuraĝon kaj ne malesperu, kaj kvankam vi ne estas kutimigita de samaj okazintaĵoj, des pli vi vin montrus inda je via deveno, ju pli pacienceme vi scios elporti ilin; kredu, sinjorino, ke mi imagas, ke ĉi tiuj tiel strangaj okazantaĵoj estos havontaj, feliĉan finon, ĉar ne permesos la ĉielo ke tiom da beleco oni ĝuu malbone, kaj ke tiel honestaj pensoj malsukcesu; kuŝu, sinjorino, atentu pri via persono mem, ĉar vi bezonas sufiĉan flegon, ĉi tien eniros servistino nia por servi vin, pri kiu vi povas fidi same kiel pri niaj personoj; tiel bone ŝi scios silenti pri viaj malfeliĉoj, kiel alkuri al viaj bezonoj.

—Tiaj estas, kiajn mi havas, kaj ili por aĵoj pli malfacilaj devigas min—rediris ŝi—; eniru tiu, kiun vi volu, sinjoro, ĉar estante sendata de vi, mi devas ĉin konsideri tre bona, tiel inda, kiel postulas mia stato, sed malgraŭ ĉio, mi petas vin, ke nur vidu min via servistino.

—Tiel estos—rediris Don Antono.

Kaj lasante ŝin sola, ili eliris, kaj Don Johano diris al la dommastrino, ke ŝi eniru internen kaj portu la ĵusnaskiton kun la riĉaj envolvantaĵoj ĉu ŝi jam estis surmetinta ilin al li. La dommastrino diris jese, kaj ke la etuleto jam estis same, kiel la kavaliro estis alportinta lin. Eniris la dommastrino, avertite de la kavaliroj pri tio, kion ŝi estis respondonta al la sinjorino, laŭ ŝiaj demandoj pri la etuleto. Ŝin vidinte, Korneliino diris al ŝi:

—Venu je bona horo, mia amikino; donu al mi tiun etuleton kaj alproksimigu ĉi tien tiun kandelon.

Tiel faris la dommastrino, kaj prenante la suĉinfaneton Korneliino en siajn brakojn, ŝi tute konfuziĝis, kaj ŝi lin rigardis atenteme kaj diris al la ĉefservistino:

—Diru, sinjorino, ĉu ĉi tiu ĵusnaskito kaj tiu, kiun vi alportis al mi aŭ oni alportis ĵus al mi, estas unu mem?

—Jes, sinjorino—respondis la dommastrino.

—Ve mi pekanta—diris Korneliino—kiel ĉio povis esti? Kiel estas ĉi tio, mia dommastrino? Ĉar la koro mia krevas en la brusto ĝis la momento, kiam mi scios tiun ŝanĝon; diru tion al mi, amikino, je ĉio, kion vi bone amas; mi diras, ke vi diru al mi de kie vi havigis al vi tiel riĉajn envolvantajn tolaĵojn, ĉar mi sciigas vin, ke ili estas miaj ĉu la vido ne trompas min aŭ la memoro ne perfidas min; kun ĉi tiuj tolaĵoj mem aŭ

kun aliaj similaj, mi donis al mia servistino la juvelon amatan de mia animo; kiu demetis ilin al li? Ve, mi, malfeliĉulino! Kaj kiu ilin portis ĉi tien? Ve, mi, malbonsortulino!

Don Johano kaj Don Antono, kiuj ĉiujn tiujn ĉi plendojn aŭskultis, ne volis ke ŝi plu plendadu, nek ili permesis ke la trompo de la ŝanĝitaj envolvanttolaĵoj plu ĉagrenu ŝin, kaj tial ili eniris kaj Don Johano diris:

—Tiuĵ envolvanttolaĵoj kaj tiu etuleto estas viaj, sinjorino Korneliino.

Kaj poste li rakontis al ŝi, punkton post punkto, kiel li estis la persono al kiu ŝia servistino estis doninta la ĵusnaskiton, kaj kiel li estis portinta lin ĉe si, kaj la ordonon, kiun li estis doninta al la dommastrino pri la ŝanĝo de la envolvanttolaĵoj, kaj la kialon pro kiu li estis farinta tiel, kvankam depost kiam ŝi rakontis al li sian naskon, li ĉiam konsciis certe, ke tiu etuleto estas ŝia filo, kaj ke li ne estis dirinta ĉion tial ke li volis, ke, post la maltrankviliĝo pro dubo por koni lin, venu la ĝojo pro la rekono.

Tiam estis senfinaj la ĝojaj larmoj de Korneliino; senfinaj, la kisoj per kiuj ŝi ŝmacis sian filon; senfinaj, la dankoj, kiujn ŝi esprimis al siaj favorantoj, nomante ilin homaj anĝeloj de sia gardo kaj alimaniere, donante tiel certan elpruvon pri sia dankemeco. Ili lasis ŝin kun la dommastrino, rekomendante al ĉi tiu atenti kaj servi ŝin kiel eble plej bone, avertante ŝian staton, por ke la dommastrino alkuru al ŝia flego, ĉar la virinoj scias pli pri tia stato.

Tuj ili iris ripozi dum la tempo, kiu ankoraŭ restis el la nokto, kun la intenco ne eniri en la ĉambron de Korneliino se ŝi ne estus vokonta ilin aŭ estus necese kaj nepre. Venis la tago, kaj la dommastrino kondukis tiun por mamnutri la ĵusnaskiton sekrete kaj senlume; ili demandis pri Korneliino, por scii ĉu jam estis publika ŝia kulpo aŭ estis rondoj komentariantaj ĝin; sed nenion ili sciis kaj aŭdis pri la bataleto kaj foresto de Korneliino. Kaj ĵus aŭdinte siajn lecionojn, ili revenis ĉe si.

Ilin vokis Korneliino pere de la dommastrino, kaj al ĉi tiu ili respondis, ke ili estis decidintaj ne meti siajn piedojn en ŝia ĉambro por ke la honoro kiun oni ŝuldis al ŝia honesteco, restu kiel eble plej alte; sed ŝi kontraŭstarigis la decidon per larmoj kaj petoj por ke ili eniru vidi ŝin, ĉar tio estis la honesteco pli deca ĉu ne por ŝia riparo, almenaŭ por ŝia konsolo. Tiel ili faris, kaj ŝi ilin akceptis kun gaja vizaĝo kaj tre

gentile; ŝi petis al ili bonvolu eliri tra la urbo por scii iujn novaĵojn pri ŝia aventuro; kaj ili diris al ŝi, ke tio jam estis farita de ili tute scivol-eme, sed nenion oni diris.

Je ĉi tio alvenis armservisto, el tri kiujn ili havis, al la pordo de la ĉambro, kaj de ekstere la armservisto diris:

—Ĉe la pordo sin trovas kavaliro kun du servistoj, kiu diras esti nomata Lorenzo Bentibolli, kiu serĉas mian mastron Don Johanon de Gamboa.

Aŭdinte tion ĉi fermis Korneliino la du manojn kaj ĉi tiujn ŝi metis sur la buŝon, kaj tra la pugnoj eliris ŝia mallaŭta kaj timema voĉo, dirante:

—Mia frato, sinjoroj; mia frato estas tiu; sen dubo li estas sciinta ke mi estas ĉi tie kaj li venas por forigi al mi la vivon; helpon, sinjoroj, kaj protekton!

—Trankviliĝu, sinjorino—diris al ŝi Don Antono—, ĉar en loko vi estas kaj sub protekto de kiuj ne toleros fari al vi la plej malgrandan ofendon de la mondo. Alkuru vi, sinjoro Don Johano, kaj sciu tion, kion volas tiu kavaliro, kaj mi restos ĉi tie por defendi, se estus necese, Korneliinon.

Don Johano, ne ŝanĝante la mienon, malsupreniris kaj tuj Don Antono ordonis alporti al li du ŝargitajn pistolojn kaj ke la armservistoj sin pretigu por la defendo prenonte tuj la armilojn kaj resti singardemaj.

La dommastrino, rigardante tiujn preparojn, tremis; Korneliino, timante iun malbonan okazontaĵon, tremis; nur Don Antono kaj Don Johano estis memregataj kaj tre bone decidataj pri tio, kion ili estas farontaj. Ĉe la pordo al la strato, Don Johano trovis Don Lorenzon, kiu, vidante Don Johanon, diris al ĉi tiu:

—Mi petas je via ekscelenco—ĉar ĉi tiu esprimmaniero estas tiu de Italujo—faru al mi la bonvolon veni kun mi al tiu preĝejo, kiu staras kontraŭen, ĉar mi havas aferon, kiun komuniki al via ekscelenco, tiel grava por mi, ke ĝi entenas mian vivon kaj honoron.

—Tre plezure—diris Don Johano—, ni iru, sinjoro, kien vi volu.

Tion ĉi dirinte unu apud la alia, ili iris en la preĝejon, kaj ili sidis sur benkon ĝian kaj ĉe loko, kie oni ne povis aŭskulti ilian konversacion. Lorenzo parolis unue kaj diris:

—Mi, hispana sinjoro, estas Lorenzo Bentibolli, se ne el plej riĉaj, certe el plej ĉefaj de ĉi tiu urbo; ĉi tiu vero tiel konata, taŭgos kiel

senkulpigo pri mia propra laŭdo; mi restis orfa antaŭ kelkaj jaroj kaj restis sub mia regado unu mia fratino tiel bela, ke se ŝi ne estus tiel proksima parencino, mi laŭdus ŝin tiamaniere, ke mankus al mi laŭdparoloj tial ke neniu estas tute ĝusta por ŝia beleco; mia honorrango kaj ŝia beleco devigis nin esti diligenta por ŝin gardi, sed ĉiujn miajn singardemon kaj diligentecon malsukcesigis la kuraĝa volo de mia fratino Kornelino, ĉar ĉi tiu estas ŝia nomo. Fine, por mallongigi, por ne enuigi vin, ĉi tiun rakonton, kiu povus esti longa, mi diras, ke la duko de Ferrara, Alfonso de Este, per okuloj de linko, venkis tiujn de Arguso, malsukcesigis kaj venkis mian ruzecon, deloginte mian fratinton, kaj hieraŭ nokte li forrabis ŝin al mi el hejmo de parencino mia, kaj eĉ oni diras, ke ŝi estis ĵusnaskinta: lastan nokton, mi tion sciis, kaj lastan nokton, mi eliris serĉi la deloginton, kaj mi opinias, ke mi lin trovis kaj glavovundis; sed li estis helpata de iu anĝelo, kiu ne konsentis, ke per sia sango li purigu la malkulon de mia honoro. Mia parencino estas dirinta ĉion al mi, ke la duko trompis mian fratinton per promeso akcepti ŝin kiel edzinon; ĉi tion mi ne kredas, ĉar la edziĝo ne estas konvena koncerne la riĉaĵojn, sed koncerne la devenon la mondo scias la rangon de la Bentibolli de Bolonio; tio, kion mi opinias, estas, ke li profitis tion, kion profitas la potenculoj, kiuj deziras delogi timeman kaj honestan junulinon, trompante ŝin per la dolĉa nomo edzo, devigante ŝin kredi, ke pro iuj respektoj li poste ne povas edziĝi, mensogoj kvazaŭ verŝajnaj veroj, sed falsaj kaj malbonintencaj. Sed estu tio, kio estu, mi vidas min sen fratino kaj sen honoro; ĉar ĉion tion ĉi ĝis nun mi estas metinta sub la ŝlosilon de la silento, kaj mi ne estas volinta rakonti al iu ĉi tiun ofendon ĝis kiam mi konscios ĉu mi povas ĝin ripari aŭ satigi iel; ĉar estas preferinde, ke oni konjektu kaj suspektu la malhonoron pli ol oni ĝin sciu certe kaj diverse, tial ke inter la jeso kaj la neo pri dubo ĉiu ajn povas sin klini al la parto kiun li plej ŝatu, kaj ĉiu parto havos siajn defendantojn. Fine, mi decidis iri al Ferraro, kaj peti al la duko mem la riparon por la ofendo al mi, kaj se li ĝin neus, devigi lin dueli pro la ofero; kaj ĉi tio ne estos per skadronoj da soldatoj, ĉar mi ne povas rekruti kaj subteni ilin, sed ni mem, unuope, por kio mi volas la helpon de via persono kaj ke vi akompanu min al tiu celo, ĉar mi estas fidema je vi tial ke vi estas hispano kaj kavaliro, kiel mi jam scias; kaj por ne doni sciigojn al iu el miaj parencoj aŭ amikoj de kiuj mi esperas nur partiajn konsilojn kaj rezonadojn kaj de vi mi povas esperi tiujn, kiuj estos bonaj, honoraj kaj senpartiaj kvankam la konsiloj rom-

pu tra kiu ajn danĝero; vi, sinjoro, faros al mi la bonvolon veni kun mi, ĉar mi, irante kun hispano ĉe mia flanko, kaj kun tia, kia vi ŝajnas, konscios, ke gardos min la militistaroj de Hérhès'. Multe mi petas je vi, sed multe pli postulas la ŝuldo konstati tion, kion la famo de via nacio proklamas.

—Ne plu, sinjoro Lorenzo—diris je ĉi tiu momento Don Johano, kiu, ĝis tiam ne interrompinte, estis aŭskultinta—, ne plu, ĉar de nun mi min deklaras via defendanto kaj konsilanto, kaj mi prenas sur min la riparon aŭ venĝon por via defendo; kaj ĉi tion ne nur ĉar mi estas hispano, sed ĉar mi estas kavaliro, kaj vi tiel altranga, kiel vi estas dirinta kaj kiel mi kaj la tuta mondo scias. Decidu, kiam vi volu, nian deiron, kaj estos plibone ke ĝi okazu tuj, ĉar la feron oni devas labori kiam ĝi estas ruĝa; la ardo de la kolero kreskigas la kuraĝon, kaj la ĵusa ofendo vekas la venĝon.

Lorenzo starigis kaj ĉirkaŭbrakis premege Don Johanon, kaj li diris:

—Por decidi tiel noblan bruston, kiel estas via, sinjoro Don Johano, ne estas necese meti antaŭ ĝi alian intereson, ol tiun de la honoro, kiun ĝi estos gajnonta per ĉi tiu entrepreno, tiun honoron de nun mi donus al vi, se ni sukcesus feliĉe je ĉi tiu okazo, kaj eĉ ankoraŭ pli, mi al vi proponas ĉiom kiom mi havas, povas, kaj valoras; mi decidus, ke mi deiru morgaŭ, ĉar hodiaŭ mi povos prepari ĉion necesan por tio.

—Ŝajnas al mi bone—diris Don Johano—, kaj donu al mi permeson, sinjoro Lorenzo, por ke mi povu sciigi ĉi tiun aferon al iu kavaliro, mia kamarado, pri kies kuraĝo kaj silento vi povas esperi pli, ol miaj esperigas vin.

—Ĉar vi, sinjoro Don Johano, laŭ vi diris, estas preninta mian honoros sur vin, disponu ĝin laŭ via volo, kaj diru pri ĝi tion, kion vi volos, des pli ĉar, ĉu via kamarado povas esti malpli bona ol vi?

Je ĉi tio, ili ĉirkaŭbrakis kaj adiaŭis sin reciproke, interkonsentinte ke la sekvantan tagon matene, la italo sendos iun avizi la hispanon, por ke, for de la urbo, ili saltu sur selojn kaj rajdvojaĝu maskite.

Revenis Don Johano en sian hejmon kaj li sciigis al Don Antono kaj al Korneliino tion, kio okazis al li kun Lorenzo, kaj interkonsenton, kiu estis decidita.

—Dio helpu min!—diris Korneliino—; granda estas, sinjoro, via ĝentileco, kaj granda via konfido; kiel kaj kial tiel rapide vi decidis vin ĵeti en entreprenon plenan je danĝero? Kaj kion vi scias, sinjoro,

ĉu tiras vin mia frato al Ferraro aŭ al alia loko? Sed kien ajn li vin tiros, vi ja povas esti certa, ke kun vi iras la fideleco mem, kvankam mi, kiel malfeliĉulino, en la atomojn de la suno (1) faletas, kaj mi kiun ajn ombbron timas; kaj ĉu vi ne volas, ke mi timu kiam la respondo de la duko estas entenanta mian vivon aŭ mian morton, kaj kion mi scias, ĉu la duko respondos tiel malgentile, ke la kolero de mia frato staru ĉe la limoj de la diskreteco? Kaj kiam li eliru, ĉu ŝajnas al vi, ke li havas nepotencan malamikon? Kaj, ĉu ne ŝajnas al vi, ke tagojn depost la deiro ĝis via reveno mi ne restos maltrankvila, timema kaj konfuza, atendente la dolĉajn aŭ maldolĉajn novaĵojn pri la okazontaĵo? Ĉu mi amas tiel malmulte la dukon aŭ mian fraton, ke pri kiu ajn el la du mi ne timu la malfeliĉojn kaj mi ne sentu ilin ĉe la animo.

Multe vi pripensis kaj multe vi timas, sinjorino Korneliino—diris Don Johano—, sed donu lokon inter tiom da timoj al la espero, kaj fidu je Dio, je miaj saĝo kaj bona deziro, por vidi tute feliĉe plenumita vian deziron; la iro al Ferraro estas necesa, kaj nei mian helpon al via frato estas neeble. Ĝis nun mi ne scias la intencon de la duko, ankaŭ ni ne scias ĉu li konas vian forkuron, kaj ĉion tion ĉi oni scios per lia buŝo, kaj neniu povos demandi tion al li same kiel mi; komprenu, sinjorino, ke la sanon kaj kontenton de via frato kaj tiujn de la duko mi metis en la pupilojn de miaj okuloj (2); mi atentos pri ili same, kiel pri la pupiloj.

—Se tiel al vi donas la ĉielo, sinjoro Don Johano, povon por ripari, kiel saĝon por konsoli, mi volas vidi vin irinta kaj revenanta, kvankam la timo malĝojigu min dum via foresto, aŭ la espero min subtenu.

Don Antonio aprobis la decidon de Don Johano, lian bonan sindonemon, kiun li estis elmontrinta por la konfido al Lorenzo Bentibolli, laŭdante lian sinkonduton; Don Antonio diris plie: —Mi volas akompani ilin pro tio, kio povos okazi.

—Tio ne—diris Don Johano—, same, ĉar ne estos konvene ke sinjorino Korneliino restu sola, kiel por ke sinjoro Lorenzo ne pensu mi volas profiti penojn de aliaj.

—Mia peno estas via mem—rediris Don Antonio—; kaj tiel, kvankam estu kaŝate kaj de malproksime, mi sekvos vin, ĉar mi scias, ke sinjorino Korneliino ŝatos tion, kaj ke ŝi ne restos tiel sola por manki al ŝi tiu, kiu servos, gardos kaj akompanos ŝin.

(1) Koncernas la polverojn flosantajn en la sunradioj.

(2) Meti en la pupilojn de la okuloj koncernas plej grandan interreson.

Je kio Korneliino diris:

—Granda konsolo estus al mi se mi sciuis, ke vi iros kune aŭ almenaŭ tiel, ke vi helpu unu la alian se la okazo tion postulus, kaj, tial ke mi opinias danĝera vian entreprenon, faru al mi la bonvolon, sinjoroj, porti ĉi tiujn sanktaĵojn kun vi.

Kaj dirante tion ĉi, ŝi elteris, el sur sian bruston, krucon el diamantoj kies valoro estis grandega kaj *agnus-on* el oro, tiel valora kiel la kruco. Ambaŭ kavaliroj rigardis la riĉajn juvelojn kaj taksis ilin pli altvalore ol ili estis taksintaj la bukon; sed la kavaliroj ĝentile rifuzis la donacon redonante al ŝi la juvelojn kaj dirante ke ili portis sur sin sanktaĵojn ĉu ne tiel riĉaj, almenaŭ tiel bonaj laŭ efiko. Korneliino bedaŭris la rifuzon; sed fine ŝi estis komplezema je tio, kion ili volis.

La dommastrino bonege atentis regali Korneliinon, kaj, sciante la foriron de siaj mastroj, pri kiu ili sciigis ŝin sed ne la celon de la foriro kaj kien, ŝi celis zorgi la sinjorinon—kies nomon ankoraŭ ŝi ne sciis— tiel kiel se la kavaliroj ne estus forirontaj. La sekvantan tagon, tre frue, Don Johano kun la ĉapelo de la buko, kiun li ornamis per plumoj nigraj kaj flavaj, kovrante la bukon per nigra vualo, kaj Don Antono adiaŭis Korneliinon, kiu, pensante ke ŝia frato estis tiel proksima, estis tiel timema, ke ŝi ne trafis diri parolon al la du, kiuj ŝin adiaŭis. Eliris unue Don Johano kaj kun Lorenzo aliris ekster la urbo, kaj ĉe fruktogardeno iom malproksima ili trovis du bonajn ĉevalojn, kiujn tenis ĉe la bridoj du servistoj. Ili saltis selen, kaj la servistoj antaŭ la kavaliroj; sur vojetoj kaj vojoj nekutimaj, ĉiuj sin direktis al Ferraro. Don Antono, sur ĉevalo sia, kaj kun alia vesto kaj lertkaŝeme sekvis ilin, sed ŝajnis al li, ke ili estis singardemaj je li, speciale Lorenzo, kaj tial li decidis iri la rektan vojon al Ferraro, certa trovi ilin tie.

Apenaŭ ili estis elirintaj el la urbo, kiam Korneliino rakontis al la dommastrino ĉiujn siajn okazintaĵojn, kaj ke tiu suĉinfano estis ŝia kaj de la duko de Ferraro, kaj ĉion kion ĝis ĉi tie oni estas rakontinta koncerne ŝian historion, kaj Korneliino ne kaŝis al ŝi, ke la celo de la vojaĝo de la kavaliroj akompanantaj ŝian fraton estis devigi la dukon Alfonson doni riparon. Aŭdinte ĉi tion, la dommastrino, kvazaŭ la demono ordonu ŝin por labirintkonfuzi, malhelpi aŭ prokrasti la riparon al Korneliino, diris:

—Ve, sinjorino de mia animo! Kaj ĉiuj tiuj ĉi aĵoj okazis kaj okazas al vi kaj vi restas ĉi tie neatentema kaj tute trankvila! Aŭ vi ne havas animon, aŭ vi ĝin havas tiel malpasia, ke ĝi ne sentas. Kiel vi povas

pensi eble, ke via frato iru al Ferraro? Ne pensu tion, sed pensu kaj kreu, ke li volis forporti de ĉi tie miajn mastrojn kaj forestigi ilin de ĉi tiu domo por reveni al ĝi kaj forigi al vi la vivon, kion li povos fari same kiel iu trinkas glason da akvo; atentu sub kia gardo kaj protekto ni restas, sub tiu de tri armservistoj, kiuj sufiĉe faros gratante la skavion, kiun ili havas abunde, pli ol plenumi tian postenon; almenaŭ mi scias diri pri mi, ke mi ne havos kuraĝon por atendi la okazontaĵon kaj ruinon, kiuj minacas ĉi tiun domon: sinjoro Lorenzo, italo, fidema je hispanoj kaj ke li petu je ili favoron kaj helpon! Por mia okulo, se mi tiel kredus—kaj samtempe tion dirante, ŝi batetis sian okulon per sia pugno (1)—; se vi, mia karulino, volus akcepti mian konsilon, mi donus tian, kia estus utila al vi.

Kornelliino, aŭdante la dirojn de la dommastrino, surprizigis, miris kaj konfuzigis, ĉar la ĉefservistino diris tiel verŝajne, prave kaj tiel timeme, ke ŝajnis al Kornelliino esti vero tio, kion al ŝi diris la dommastrino, eble esti mortintaj Don Johano kaj Don Antono, kaj baldaŭ la eniro de ŝia frato tra tiuj pordoj por ŝin refrapi ponarde; kaj tial ŝi diris:

—Kian konsilon vi donus al mi, amikino, kiu estu bona kaj evitu venontan malfeliĉon.

—Mi donos ĝin tia kaj tiel bona, ke oni ne povu ĝin plibonigi—diris la dommastrino—; mi, sinjorino, servis piav-anon, pastron de vilaĝo staranta du mejlojn de Ferraro; li estas sankta kaj bona persono, kiu faros por mi ĉion, kion petos mi je li, ĉar li havas al mi devon pli ol pro mastrumeco, ni iru al li, ĉar mi serĉos tiun, kiu kondukos nin tuĵ; kaj tiu, kiu venas por mannutri la etuleton, kiel virino malriĉa, iros kun ni ĝis la fino de la mondo; kaj se mi, sinjorino, antaŭsupozas, ke oni vin trovos, estos pli bone ke oni trovu vin ĉe maljuna kaj honora pastro de paroĥejo, ol ĉe junaj kaj hispanaj studentoj, ĉar tiaj, tial ke mi estas bona atestantino, ne malprofitas okazon; kaj nun, sinjorino, ĉar vi malbonfartas, ili respektis vin, sed kiam vi resaniĝos, se vi restus ĉe ili por akiri fortojn, Dio povos ripari, ĉar vere, se min ne estus gardintaj miaj rifuzoj, malestimoj al ili kaj kuraĝo, ili estus frakasintaj min kaj mian honoron, ĉar ne estas oro ĉio tio, kio brilas sur ili; unumaniere ili diras, kaj alimaniere ili pensas; sed ili estas venintaj al mi, mi estas ruza, kaj mi scias kien premas min la ŝuo (2), kaj super ĉio, mi devenas de honora familio, ĉar mi devenas de la familio Kribelos de Milano, kaj

(1) La frazo esprimas: ke mi blindiĝu se mi tiel kredus.

(2) Esprimo por klarigi, ke oni estas sperta.

mi havas la punkton de la honoro dek mejlojn preter la nuboj; kaj per ĉi tio oni povos rimarki, mia sinjorino, la malfeliĉojn, kiujn mi suferis, tial ke malgraŭ mia deveno, mi trafis esti ĉefservistino de hispanoj, kiun ili nomas dommastrino; kvankam vere mi ne povas plendi je miaj mastroj, ĉar ili estas bonegaj kiam ili ne estas koleraĵ, kaj pro ĉi tio ili verŝajne estas *vizkaljanoj* (1), kiel ili diras esti; sed eble por vi ili estos galicianoj, ĉar Galicio estas alia nacio, laŭ famo, iom malpli lojala kaj ĝentila ol Vizkaljo.

Efektive, tiom da rezonoj kaj tiajn diris al Korneliino la dommastrino, ke la malfeliĉulino sin decidis sekvi ŝian konsilon, kaj tial, dum malpli da kvar horoj, la dommastrino disponis interkonsente kun Korneliino ĉion, kaj sin vidis internen de veturilo la du kaj la mamnutristino kun la ĵusnaskito, kaj nesciite de armservistoj, ili ekvojiris al la vilaĝo de la pastro. Ĉion ĉi tion oni faris laŭ plano de la dommastrino kaj per ŝia mono, ĉar antaŭ malmulte da tempo estis paĝintaj al ŝi la mastroj jarsalajron, kaj tial ne estis necese garantiedoni juvelon, kiun al ŝi donis Korneliino; kaj kiel ili estis aŭdintaj diri al Don Johano, ke li kaj la frato de Korneliino ne devis vojaĝi sur la rekta vojo al Ferraro, sed male sur vojetoj apartaj, ili volis iri la rektan kaj malrapide por ne renkonti ilin, kaj la mastro de la veturilo alĝustigis la rapidecon laŭ la volo de la vojaĝantinoj, ĉar ĉi tiuj pagis lin laŭ lia plaĉo.

Ni lasu ilin irantaj, ĉar ili iris tiel kuraĝe kiel bone gvidate, kaj ni sciu, kio okazis al Don Johano de Gamboa kaj al sinjoro Lorenzo de Bentibolli; pri kiuj oni diris esti sciintaj sur la vojo, ke la duko ne estis en Ferraro, sed en Bolonio; kaj tial, forlasante la deflankigitan vojon sur kiu ili vojiris, ili venis en la ĉefan vojon, aŭ *majstran trejon*, kiel oni diris tie, opiniante ke sur tiu estis venanta la duko ĉar de Bolonio li estis deirinta. Kaj malmulte da tempo depost kiam ili eniris en ĝin, rigardante al Bolonio por vidi ĉu sur la vojo venis iu, ili vidis amason da rajdantoj, kaj tiam diris Don Johano al Lorenzo, ke ĉi tiu sin deflankigu de la vojo por se okaze inter tiuj venantoj venus la duko, ĉar Don Johano volis paroli al la duko tie, antaŭ ol li eniru en Ferraro, kiu staris proksime de tie. Tiel faris Lorenzo, kiu aprobis la opinion de Johano. Ĵus deflankiginte Lorenzo, Don Johano demetis la vualeton ŝirmantan la altvaloran bukon, kaj ĉi tion li faris pro prudenta saĝo, laŭ li diris poste.

Je ĉi tiu momento alvenis la amaso da vojirantoj kaj inter ili venis

(1) Provinco Vizcaya (Vizkalja). Bilbao. Vaskoj.

virino rajdanta sur ĉevalino kun vojaĝa kostumo kaj la vizaĝo kovrita de masko ĉu por plibone sin kaŝi je la vido kaj kono, ĉu por sin ŝirmi kontraŭ la suno kaj la aero. Haltigis la ĉevalon Don Johano meze de la vojo, kaj li restis kun la vizaĝo malkaŝata atendante ke la vojirantoj alvenu, kaj kiam ili estis proksimaj, la gracio, la kuraĝa sintenado, la potenca ĉevalo, la eleganta vestaro kaj la elradioj de la diamantoj, tiris al li la okulojn de ĉiuj, kiuj venis tien, speciale tiujn de la duko de Ferraro, kiu estis unu el ili, kiu, ĵus fiksinte siajn okulojn en la bukon, tuj konsciis, ke tiu, kiu ĝin portis, estis Don Johano de Gamboa; tiu, kiu savis lin dum la bataleto; kaj tiel prave li konsciis tiun ĉi veron, ke li, farante nenium alian rezonon, spronfrapis sian ĉevalon, rapidirante al Don Johano, dirante:

—Mi kredas, ke mi ne min trompos pri io, sinjoro kavaliro, se mi nomas vin Don Johano de Gamboa, ĉar via kuraĝa sintenado kaj la ornamajo de tiu ĉapelo tion estas diranta al mi.

—Tia estas la vero—diris Don Johano—, ĉar neniam mi sciis kaj volis kaŝi mian nomon; sed diru al mi, sinjoro, kiu vi estas, por ke mi ne estu malĝentila.

—Ĉi tio estas neebla—rediris la duko—, ĉar mi estas certa, ke vi ne povos esti malĝentila je iu okazo; samtempe mi diras al vi, sinjoro Don Johano, ke mi estas la duko de Ferraro, kiu estas devigata servi vin dum ĉiuj tagoj de sia vivo, ĉar ankoraŭ ne estas kvar noktojn de kiam vi donis ĝin al mi.

Ne finis diri ĉi tion la duko, kiam Don Johano, per stranga rapido, saltis de la ĉevalo kaj alkuris kisi la piedon de la duko; sed kvankam rapide li alkuris, la duko jam estis sin foriginta el la selo tiel, ke li finis alteriĝi ĉe brakoj de Don Johano.

Sinjoro Lorenzo, kiu de iam malproksime rigardis ĉi tiujn ceremoniojn, ne pensante ke ili estis ĝentilaj sed koleraĵ, spronfrapis sian ĉevalon al la duko kaj Don Johano, sed, je la mezo de la kurado, li haltigis ĝin ĉar li vidis la dukon kaj Don Johanon ĉirkaŭbrakantaj sin reciproke premege, ĉar Bentibolli jam estis koninta la dukon. Ĉi tiu, supren de la ŝultroj de Don Johano, rigardis Lorenzon kaj konis lin, pro kio li iomete maltrankviligis, kaj dum li estis ĉirkaŭbrakanta Don Johanon, al ĉi tiu li demandis ĉu Lorenzo Bentibolli, kiu estis tie, venis kun li aŭ ne. Pro kio Don Johano diris:

—Ni apartigu iomete de ĉi tie kaj mi rakontos al via ekscelenco grandajn novaĵojn.

Tiel ili faris kaj Don Johano daŭrigis:

—Sinjoro, Lorenzo Bentibolli, kiun vi vidas tien, havas plendon ne grandan kontraŭ vi: li diras, ke estas kvar noktojn de kiam vi elirigis lian fratinn, Korneliinn, el hejmo de kuzino ŝia, kaj ke vi estas trompinta kaj malhonoriginta ŝin, kaj li volas scii kian riparon vi pensas doni al li por ke li konsciitu tion, kio konvenas al li; li petis je mi, ke mi estu lia defendanto kaj peranto; mi tion ĉi promesis al li, ĉar per la suspektoj, kiujn li donis pri la bataleto, mi sciis, ke vi, sinjoro, estis la posedinto de tiu ĉi buko, kiu, pro malavaremo kaj ĝentileco viaj, estas mia, kaj konsciante, ke neniu povas solvi vian plendon pli bone ol mi, kiel mi jam estas dirinta, mi promesis al li mian helpon; mi volas nun sinjoro, ke vi diru al mi tion, kion vi scias pri ĉi tiu afero kaj se estas vero tio, kion diras Lorenzo.

—Ve, amiko! — diris la duko—; tio estas tiel vera, ke mi ne kuraĝus nei tion kvankam mi volus: mi ne estas trompinta kaj foriginta Korneliinn, kvankam mi scias, ke ŝi forestas el la hejmo, kiun li diras; mi ne estas trompinta ŝin, ĉar mi ŝin konsideras mia edzino; mi ne forigis ŝin, ĉar mi ne scias pri ŝi, se publike mi ne okazigis mian edziĝon, tio estis ĉar mi atendis, ke mia patrino—kiu estas jam ĉe la fino—pasu de ĉi tiu vivo al plej bona, tial ke ŝi deziras ke estu mia edzino Livio, filino de la duko de Mantuo, kaj pro aliaj malkonvenaĵoj eble pli gravaj ol la diritaj, kiujn diri nun ne estas dece, tio, kio okazas, estas, ke la nokton, kiam vi helpis min, mi celis konduki ŝin al Ferraro, ĉar ŝi sin trovis ĉe la monato naski la etuleton, kiun mi naskigis en ŝin laŭ destino de la ĉielo, kaj ĉu pro la stratbatalo, ĉu pro malatento, kiam mi alvenis al ŝia hejmo, mi rimarkis, ke el ĝi eliris la servistino, kiu helpis niajn interkonsentojn. Mi demandis al ŝi pri Korneliino, kaj ŝi diris, ke Korneliino jam estis elirinta, kaj ke tiun nokton etuleto estis naskiĝinta, la plej bela el la mondo, kaj ke ŝi estis doninta lin al Fabio, mia servisto. La servistino estas tiu, kiu venas tie; Fabio estas ĉi tie, kaj la etuleto kaj Korneliino ne aperas, kaj mi estas estinta dum ĉi tiuj du tagoj en Bolonio atendente kaj atentante vigle aŭdi iujn novaĵojn pri Korneliino, sed mi atingis nenion.

—Tial, sinjoro—diris Don Johano—, kiam Korneliino kaj via filo aperos, ĉu vi jesos, ke ŝi estas via edzino kaj li via filo?

—Jes, vere; ĉar kvankam mi min altestimas kavaliro, pli mi min altestimas kristano; kaj plie, ĉar Korneliino estas tia, ke ŝi meritas esti mastrino de regno. Kiam ŝi aperu kaj kvankam mia patrino viva aŭ

mortinta estu, la mondo scios, ke se mi sciis esti amanto, mi sciis la promeson, kiun mi donis sekrete, plenumi publike.

— Nu, ĉu vi diros same—diris Don Johano—tion, kion vi diris al mi, al via frato sinjoro Lorenzo?

—Tro ĉagrenas min—respondis la duko—ke mi ne rapidu konigi tion al li

Tuj Don Johano faris signalojn por ke Lorenzo elseliĝu kaj alproksimiĝu al la loko en kiu ili staris, kiel li faris tute fremda je penso pri la bona akcepto, kiu lin atendis. Antaŭeniris la duko akcepti lin kun malfermataj brakoj, kaj la unua parolo, kiun prononcis la duko, estis frato.

Apenaŭ sciis Lorenzo komplimenti tiel ameman saluton, nek tiel gentilan akcepton; kaj tial, restante muta antaŭ ol prononci parolon, Don Johano diris:

—La duko, sinjoro Lorenzo, konfesas la konversacion sekretan, kiun li estas havinta kun via fratino Korneliino; same li konfesas, ke ŝi estas lia legitima edzino, kaj ke same, kiel li tion diras ĉi tie, li tion diros publike, kiam estos ĝustatempe, li deklaras same ke antaŭ kvar noktojn li iris forigi ŝin el la hejmo de ŝia kuzino por ŝin konduki al Ferraro kaj atendi okazon festi sian edziĝon, kiun li prokrastis pro pravaj kaŭzoj, kiujn li estas dirinta al mi; li konfesas same la batalon, kiun li ludis kun vi, kaj ke kiam li iris al Korneliino, li nur renkontis Sulpicion, ŝian servistinon, kiu estas tiu virino, kiu estas tie, per kiu la duko sciis, ke Korneliino unu horon antaŭan estis naskinta, kaj ke la servistino donis la ĵusnaskiton al servisto de la duko, kaj ke poste, Korneliino, kredante ke tie estis la duko, estis elirinta el la domo timante, ĉar ŝi opiniis, ke jam vi, sinjoro Lorenzo, konis ŝiajn agojn. Sulpicio ne donis la ĵusnaskiton al servisto de la duko, sed al alia persono; Korneliino malaperis, li senkulpigas sin pri ĉio kaj diras, ke kiam aperos Korneliino, tuj li akceptos ŝin kiel sian veran edzinon. Atentu, sinjoro Lorenzo, se estas io pli, kion diri aŭn kion deziri, ol la malkaŝo de la du tiel altvaloraj kiel malfeliĉaj estaĵoj.

Je ĉi tio, respondis Lorenzo sin jetante ĉe la piedojn de la duko, kiu penadis levi lin:

—De via kristaneco kaj nobeleco, Moŝta sinjoro kaj frato mia, ne povis mia fratino kaj mi esperi pli grandan bonon ol tiun kiun vi faras al ni ambaŭ: al ŝi, egaligante ŝin kun vi; kaj al mi, metante min ĉe la nombro de viaj servistoj.

Dume liaj okuloj vualigis pro larmoj, kaj same al la duko okazis, ambaŭ estis kortuŝataj, unu de la perdo de sia edzino, la alia de la trovo de tiel bona bofrato; sed ili konsideris, ke ŝajnus malforto doni per larmoj elmontrojn pri tiom da sentemo, kaj ili haltigis la larmojn. Ĉi tiujn reenfermante en siajn okulojn, kaj tiuj de Don Johano, gajaj, preskaŭ petis al ili gratulojn pro apero de Korneliino kaj de ŝia fileto, ĉar li ĉi tiujn lasis en sia hejmo.

Dum ĉi tio estis okazanta, aperis Don Antonio de Isunza, kiu estis konata de Don Johano per la ĉevalo kaj de iom malproksime; sed kiam tiu alvenis proksime li haltis kaj vidis la ĉevalojn de Don Johano kaj Lorenzo, kiujn la servistoj tenis ĉe la bridoj tien kaj deflankigatajn: li konis Don Johanon kaj Lorenzon sed ne la dukon, kaj li ne sciis ĉu alproksimiĝi ĉu ne al la loko en kiu staris Don Johano, kaj irante en la servistojn de la duko, li demandis ilin ĉu ili konis tiun kavaliron, kiu kun la aliaj du kunestis, montrante la dukon. Ili respondis esti la duko de Ferraro, pro kio li pli konfuziĝis, eĉ malpli li sciis kien fari; sed lin tiris el lia embaraso Don Johano, vokante lin per lia nomo. Elseligis sin teren Don Antonio, rimarkante ke ĉiuj staris kaj li aliris al ili: akceptis lin la duko tre ĝentile, ĉar Don Johano diris al li, ke Don Antonio estis lia kamarado. Fine Don Johano rakontis al Don Antonio ĉion tion, kio estis okazinta al li kun la duko ĝis kiam Don Antonio estis alveninta. Ĝojis multege Don Antonio, kaj li diris al Don Johano:

— Kial, sinjoro Don Johano, vi ne finas meti la ĝojon kaj la kontenton de ĉi tiuj sinjoroj en plej alta grado, petante la gratulojn pro la renkonto de Korneliino kaj de ŝia fileto?

— Se vi ne estus alveninta, sinjoro Don Antonio, mi estus petinta la gratulojn; sed petu ilin vi kaj mi certigas ke la du donos ilin al vi bonvoleme.

Tial ke la duko kaj Lorenzo aŭdis diri pri la renkonto de Korneliino kaj pri gratuloj, ili demandis pri kio estis tio.

— Kio estas tio! — diris Don Antonio —; tio estas, ke mi volas ludi rolon en ĉi tiu tragika komedio, esti la ludanto, kiu petos la gratulojn pro la renkonto de Korneliino kaj de ŝia filo, kiuj restas en mia hejmo.

Kaj poste li rakontis punkton post punkto ĉion tion, kion ĝis nun oni estas dirinta, pro kio la duko kaj Lorenzo ricevis tiom da plezuro kaj ŝato, ke Lorenzo ĉirkaŭbrakis Don Johanon, kaj la duko Don Antonio: la duko, promesante sian ŝtaton je ĝojo; kaj Lorenzo, sian bienon, sian vivon kaj sian animon. Ili vokis la servistinon, kiu donis la

jusnaskiton al Don Johano, kaj ŝi, koninte Lorenzon, estis tremanta, kaj ili demandis al ŝi, ĉu ŝi konis la viron al kiu ŝi estis doninta la etuleton. Ŝi diris, ke ŝi ne konis lin, sed ke ŝi estis demandinta al li ĉu li estis Fabio, kaj ke li estis respondinta jese, pro kio fidema ŝi estis doninta al li la etuleton.

—Tio estas la vero—diris Don Johano—, kaj vi, sinjorino, fermis la pardon poste, dirinte al mi, ke mi estu metonta la jusnaskiton en savon kaj revenonta poste.

—Tiel estas, sinjoro—diris la servistino, plorante.

—Jam ne estas necesaj larmoj ĉi tie, sed ĝojo kaj festoj; la afero estas, ke mi ne devas realiri al Ferraro sed reveni tuj al Bolonio, ĉar ĉiuj tiuj ĉi kontentoj estas en ombro ĝis kiam faros ilin veraj la ĉeesto de Korneliino.

Kaj ne dirante plu, laŭ komuna interkonsento, ili ekrevenis al Bolonio.

Akcelis la iradon Don Antono por atentigi Korneliinon, por ne alarmi ŝin per la neatendita alveno de la duko kaj de ŝia frato; sed tial ke li ne trovis ŝin, nek la armservistoj sciis diri novaĵojn pri ŝi, li fariĝis la plej malĝaja kaj konfuziĝinta viro de la mondo; kaj kiel li rimarkis la foreston de la dommastrino, li konsciis, ke pro ŝia intrigo foriris Korneliino. La armservistoj diris al li, ke la dommastrino forestis de la tago mem, de kiam Don Johano kaj Don Antono estis foririntaj, kaj ke la Korneliinon, pri kiu li demandis, neniam ili vidis. Tute konfuzate restis Don Antono pro la neatendita okazintaĵo, timante ke eble la duko konsiderus ilin trompantoj aŭ mensogantoj, aŭ eble pensus li aliajn pli malbonajn aĵojn, kiuj al ili alportus senhonoron kaj al Korneliino senkrediton. Tiel estis pensanta Don Antono, kiam eniris la duko kaj Don Johano kaj Lorenzo, kiuj, tra stratoj nekutimaj kaj kaŝataj, lasante ceterajn akompanantojn ekster la urbo, alvenis al la domo de Don Johano kaj renkontis Don Antonon sidantan sur seĝo, apogantan sian kapon ĉe la vangoj sur la manoj, kaj kun koloro kiel tiu de mortinto.

Demandis al li Don Johano kian malsanon li havis kaj kie estis Korneliino.

Kaj Don Antono respondis:

—Kiel vi volas ke mi ne sentu min malsana? Ĉar Korneliino malaperis, kiu kun la ĉefservistino, kiun ni destinis por ŝin akompani, saman tagon de nia forveturo de ĉi tie, foriris.

Malmulte mankis al la duko por morti kaj al Lorenzo por senespe-

riĝi, aŭdante tiajn novaĵojn. Fine ĉiuj restis kortuŝate, konfuzate kaj imagante. Je ĉi tio, alproksimiĝis armservisto al Don Antonio, kaj ĉe lia orelo li flustris:

—Sinjoro, Santisteban, la armservisto de Don Johano, de la tago kiam viaj Moŝtaj sinjoroj foriris, havas virinon tre belan en sia ĉambro, kaj mi opinias ke ŝia nomo estas Korneliino, ĉar tiel mi aŭdis ŝin nomi.

Maltrankviliĝis denove Don Antonio, kaj pli li volus ke ne estus aperinta Korneliino, ĉar sen dubo li pensis, ke ŝi estis tiu, kiun la armservisto kaŝadis, ol trovi ŝin en tia loko. Malgraŭ ĉio tio, li nenion diris, sed li aliris al la ĉambro de la armservisto, kaj trovis la pordon ŝlosita, kaj li rimarkis ke la armservisto ne estis en la hejmo; li alproksimiĝis al la pordo kaj diris per voĉo mallaŭta:

—Malfermu, sinjorino Korneliino, kaj eliru akcepti vian fratron kaj la dukon, vian edzon, kiuj venas serĉi vin.

Oni respondis al li de interne:

—Ĉu mokas min iu? Nu, vere, ĉar mi ne estas tiel malbela, nek tiel malŝatata, ke ne povu serĉi min dukoj kaj grafoj, kaj tion meritas persono, kiu interrilatigas kun armservisto.

Per tiuj paroloj komprenis Don Antonio, ke ne estis Korneliino tiu, kiu respondis. Dume, venis Santisteban, la armservisto, kaj li alkuris tuj al sia ĉambro, kaj trovante tie Don Antonon, kiu petis oni alportu al li ŝlosilojn, kiuj estis en la domo por provi malfermi, la armservisto surgenuen kaj tenante la ŝlosilon diris:

—La foresto de viaj Moŝtaj sinjoroj kaj mia friponeco, plibone dirite, instigis min venigi virinon por pasigi kun ŝi tiujn ĉi tri noktojn. Mi petas je via Moŝta sinjoro Don Antonio de Isunza, je via scio pri bonaj novaĵoj de Hispanujo, ke ne sciu tion mia mastro. Don Johano de Gamboa, vi ne tion diru, ĉar ŝin mi elpelos tuj.

—Kaj kiel oni nomas tiun virinon?—demandis Don Antonio.

—Oni nomas ŝin Korneliino—respondis la armservisto.

La armservisto, kiu malkaŝis la friponaĵon, kiu ne estis bona amiko de Santisteban, oni ne sciis ĉu naive, ĉu malice, subeniris kien estis la duko, Don Johano kaj Lorenzo, dirante:

—Fidu je la armservisto, je Dio!, ĉar oni estas deviginta lin forigi sinjorinon Korneliinon; li bone kaŝis ŝin; tute certe ke li ne volus estu venintaj la sinjoroj por longedaŭrigi tri-kvar tagojn pliajn la aventuron.

Aŭdis ĉi tion Lorenzo, kaj li demandis:

—Kio estas tio, kion vi diras, kavaliro? Kie estas Korneliino?

—Supren—respondis la armservisto.

Apenaŭ aŭdis ĉi tion la duko, kiam, kiel fulmo, li supreniris la ŝtuparon, supren, vidi Korneliinon, kian li imagis aperinta, kaj tuj li alvenis al la ĉambro kie estis Don Antonio, kaj enirante, diris li.

—Kie estas Korneliino, kie estas la vivo de mia vivo?

—Ĉi tie estas Korneliino—respondis unu virino, kiu estis envolvata ĉe blanka tuko de la lito kaj kun la vizaĝo kovrata, kaj kiu daŭrigis dirante—: Helpu min Dio! Ĉu estas ĉi tio rabo de iu bovo? Ĉu estas aĵo nova dormi virino kun armservisto por fari tiom da miroj?

Lorenzo, kiu ĉeestis, kun ĉagreno kaj kolero, tiris la littukon ĉe ĝia ekstremo kaj li malkaŝis la virinon, kiu estis sufiĉe bela kaj juna, kaj kiu pro hontigo sin metis la manojn antaŭ la vizaĝon kaj poste rapidcelis preni siajn vestojn, kiuj estis al ŝi kvazaŭ kapkuseno, ĉar la lito ne ĝin havis, kaj per ili la kavaliroj rimarkis, ke ŝi certe estis iu amvendistino el la perditaj ĉe la mondo.

Demandis al ŝi la duko ĉu estis vero, ke ŝia nomo estis Korneliino kaj ŝi respondis jese, kaj ke ŝi havis tre honorajn parencojn en la urbo, kaj ke neniu diru el ĉi tiu akvo mi ne trinkos. Restis tiel hontigata la duko, ke preskaŭ li ekpensis ĉu la hispanoj mokis lin, sed por ne okazigi tian malbonan suspekton, li turniĝis kaj eliris ne dirante eĉ parolon, sekvante lin Lorenzo, kaj ili saltis ĉevalen kaj deiris, lasante Don Johanon kaj Don Antonon tro pli hontigataj ol ili estis, kaj la hispanoj decidis fari la penojn eblajn eĉ neeblajn por serĉi Korneliinon kaj satigi la dukon pri sia lojala konduto kaj pri sia bondeziro. Ili forpelis Santisteba'n pro lia malrespektemo kaj elhejmigis la diboĉitan Korneliinon, kaj je tiu momento venis en ilian memoron forgesitaĵo, ke ili ne estis dirintaj al la duko la juvelojn, kiujn Korneliino estis volinta donaci al ili, ĉar per tiuj ĉi pruvoj, li kredus ke Korneliino estis ĉe ili, se ili estus priparolinta tiel, kaj ke ŝia foresto ne dependis de ili, pri kio ili estis senkulpaĵ. Ili eliris por diri al la duko ĉi tion sed ili ne trovis lin ĉe Lorenzo, kie ili opiniis trovi lin; Lorenzon jes, kiu diris, ke la duko, ne haltinte eĉ momenton, forvojaĝis al Ferraro, ordoninte al li serĉi lian fratiron.

Ili diris al Lorenzo tion, kion ili decidis diri al la duko, sed Lorenzo esprimis al ili, ke la duko forvojaĝis tre kontenta je ilia konduto, kaj ke la duko kaj li opiniis esti kaŭzo de la foriro de Korneliino ŝia granda timo, kaj ke Dio volos ke ŝi aperu, ĉar certe la tero ne estis englutinta

la ĵusnaskiton, la dommastrinon kaj ŝin. Per ĉi tio, ĉiuj konsoliĝis, kaj ili ne volis ekserĉi ŝin per publikaj anoncoj, sed per rimedoj sekretaj, ĉar neniu alia pli ol ŝia kuzino sciis ŝian malaperon; kaj inter tiuj, kiuj ne konis la intencojn de la duko, la honoro de ŝia fratino riskus perdi se ili sciigus la malaperon, kaj estus granda penado iri konvinkante ĉiun pri suspektoj, kiujn vivega malico naskas.

La duko vojaĝis, kaj la bona sorto, kiu disponadis feliĉon por li, decidis lian alvenon al la vilaĝo de la pastro, ĉe kiu jam estis Korneliino, la infaneto, lia mamnutristino kaj la konsilintino, kaj ĉi tiuj sciigis al la pastro la okazintaĵojn kaj petis je li konsilon pri tio kion ili faros. Estis la pastro granda amiko de la duko, kiu, en lian keĵmon, pretigita laŭ oportuneco de pastro riĉa, ofte sin gastigis, kaj de tie la duko iris ĉasi, ĉar ĉi tiu multe ŝatis tiel la komfortemon de la pastro kiel lian saĝecon, kiun la pastro havis por ĉio, kion li diris kaj faris. Li ne alarmiĝis vidante la dukon ĉe si, ĉar, kiel estas dirite, ne estis unuan fojon vidi lin; sed malĝojigis lin vidi la dukon malgaja, ĉar tuj li rimarkis, ke ia pasio estis kaptinta lian koron.

Duonaŭdis Korneliino, ke la duko de Ferraro estis tie kaj ŝi alarmiĝis ekstreme ne sciante la intencon, kiu venigis lin; ŝi tordis siajn manojn kaj iris de unu loko en alian, kiel persono freneziginta; volis paroli Korneliino al la pastro, sed ĉi tiu estis parolanta al la duko, kaj ŝi ne havis okazon paroli al tiu.

La duko diris al la pastro:

—Mi venas, patro mia, malgajega, kaj mi ne volas hodiaŭ eniri en Ferraro, sed mi volas esti via gasto; diru al tiuj, kiuj venas kun mi, ke ili pasu al Ferraro kaj ke nur restu Fabio.

Tiel faris la bona pastro, kaj poste li iris ordoni necesajojn por regali kaj servi la dukon, kaj okaze de ĉi tio li povis paroli al Korneliino, kiu prenante liajn manojn, diris al li:

—Ha, patro kaj animgvidanto mia! Kaj kio estas tio, kion volas la duko? Je la amo al Dio, sinjoro, vi donu al li konsilon por mia afero, kaj celu malkaŝi kaj kavigi iun signon pri lia intenco; por tio, gvidu vin kiel eble plej bone vi konscios kaj via granda saĝeco vin konsilos.

Je ĉi tio, diris la pastro:

—La duko venas malgaja, ĝis nun li ne diris al mi la kaŭzon; tio, kion ni devas fari, estas, ke tuj oni vestu la infaneton tre bone kaj surmetu sur lin, sinjorino, ĉiujn juvelojn, kiujn vi havas, ĉefe tiujn,

kiujn estis doninta al vi la duko, kaj vi permesu min fari, ĉar mi esperas je la ĉielo, ke ni havos hodiaŭ bonan sukceson.

Ĉirkaŭbrakis lin Korneliino, kaj ŝi kisis lian manon kaj sin direktis vesti kaj ornami la etuleton. La pastro eliris por agrabligi la tempon al la duko dum venis la horo por tagmanĝi, kaj dum sia parolado, la pastro demandis al la duko se estis eble scii la kaŭzon de lia melankolio, ĉar sen dubo de unu m'jlo oni povis rimarki lian malgajecon.

—Pastro—respondis la duko—, estas klare, ke la malĝojoj de la koro eliras al la vizaĝo; sur la okulojn oni legas tion, kio estas en la animo; kaj tio, kio estas des pli malbona, estas, ke mi ne povas nun komuniki mian malĝojon al iu.

—Nu, sinjoro—rediris la pastro, se vi estus en okazo por vidi ŝatataĵojn, mi montrus al vi unu, kiu, laŭ mia opinio, kaŭzus al vi grandan plezuron.

—Malsaĝa estus—diris la duko—tiu, kiu ne volus akcepti la riparilon por sia malbono kiam oni ĝin proponus al li; je mia vivo, patro, vi montrus al mi tion, kion vi diras, ĉar certe estas iu el viaj kuriozaĵoj, kaj por mi ĉiuj estas ŝatindaj.

Starigis la pastro, kaj li iris tien, kien estis Korneliino, kiu jam estis ornaminta sian fileton kaj surmetinta al li la riĉajn juvelojn, kun aliaj tri juveloj belegaj, ĉiuj donacitaj de la duko al Korneliino, kaj la pastro, prenante la infaneton ĉe siaj brakoj, aliris al la loko en kiu estis la duko, kaj dirante al li ke li stariĝu kaj alproksimiĝu al la heleco de la fenestro, la pastro metis la infaneton de siaj brakoj en tiujn de la duko, kiu, kiam rigardis kaj rekonis la juvelojn, kaj vidis ilin, tiujn mem, kiujn li iam estis donacinta al Korneliino, restis mirigate; kaj rigardante atentege la infaneton, ŝajnis al li vidi sian portreton mem, kaj plena je miro, li dimandis al la pastro, kiu estis tiu mamnutrateto, kiu, laŭ la vestaro kaj juvelaro siaj, ŝajnis filo de iu princo.

—Mi ne scias—rediris la pastro—; mi nur scias, ke, de antaŭ mi ne scias kiom da noktoj, lin portis al mia hejmo kavaliro de Bolonio, kaj li petis je mi atentegi lin kaj lian varton, ĉar li estas filo de altranga patro kaj de ĉefa kaj belega patrino; ankaŭ venis kun la kavaliro virino por mamnutri la infaneton kaj ŝi respondas scii nenion; kaj vere, se la patrino estus tiel bela kiel la mamnutristino, tiu devas esti la plej bela virino de Italujo.

—Ĉu ni ne vidos ŝin?—demandis la duko.

—Jes, certe—respondis la pastro; venu, sinjoro, kun mi, ĉar se

vin mirigas la ornamaĵoj de tiu infaneto, kiel mi kredas ke ili estas miriganta vin, saman efikon, mi opinias, ke estos kaŭzonta al vi vidi lian mamnutristinon.

Volis preni la infaneton el la duko la pastro, sed tiu ne konsentis tion, male, lin li premis ameme ĉe siaj brakoj kaj ŝmacis lin. Antaŭeniris iomete la pastro kaj diris al Korneliino, ke ŝi eliru sen maltrankvilo akcepti la dukon. Tiel faris Korneliino, kaj pro la emocio ŝiaj vangoj tiel ruĝiĝis, ke tia koloro plibeligis ŝian naturan koloron eksterordinare. Miris la duko, kiam li vidis ŝin, kaj ŝi, sin ŝetante ĉe liaj piedoj, volis kisi ilin al li. La duko, ne dirante eĉ parolon, donis la infaneton al la pastro, kaj turnante la dorson al ili eliris rapide el la ĉambro.

Ĝus vidinte tion, Korneliino diris, sin turnante al la pastro:

— Ve, sinjoro, mia! Ĉu la duko miris ĉagrene vidante min? Ĉu mi aspektis malbela al li? Ĉu li forgesis sian devo n al mi? Ĉu li ne diros al mi eĉ parolon? Ĉu tiom ĝenis lin lia filo, ke li pro tio tiel elgis la etuleton el siaj brakoj?

Je ĉio tio ĉi respondis nenio la pastro mirigate de la eliro de la duko, ĉar li opiniis esti forkuro la eliro pli, ol alia ŝjo, sed okazis, ke li eliris voki Fabion kaj diri al li:

— Kuru Fabio, amiko, kaj per tuta diligento reiru al Bolonio kaj diru, ke tuj Lorenzo Bentibolli kaj la du hispanaj kavaliroj, Don Johano de Gamboa kaj Don Antono de Lunza, sen ia senkulpigo, senprokraste, venu en ĉi tiun vilaĝon, atentu amiko, ke vi reiru kaj vi revenu nepre kun ili, ĉar estas ilia ĉeesto al mi tiel grava kiel la vivo.

Ne estis maldiligenta Fabio, kiu tuj efektivigis la ordonon de sia mastro. La duko reiris poste al la loko en kiu restis Korneliino elverŝante belajn larmojn; ŝin prenis la duko ĉe siaj brakoj, kaj alfluigante siajn larmojn al ŝiaj, mil fojojn li ĝuis la mieron de ŝiaj lipoj, kaj ilia kontento restigis la langojn mutaj. Kaj tiel, ĉe silento honesta kaj amarda ĝuis unu la alian la du feliĉaj geamantoj kaj veraj geedzoj. La mamnutristino kaj Kribelo almenaŭ, kiel ĉi tiu diris, kiu de tra pordoj de aliaj ĉambroj estis rigardinta tion, kion faris la duko kaj Korneliino, pro ĝojo batadetis siajn kapojn kontraŭ murojn kvazaŭ ili estus perdintaj sian prudenton. La pastro ŝmacadis la etuleton, kiun li tenis ĉe siaj brakoj, kaj per sia dekstra mano, kiun li liberigis, li ne laciĝis beni la sin brakpremantajn gesinjorojn. La ĉefservistino de la pastro, kiu ne ĉeestis la gravan okazintaĵon, ĉar ŝi estis okupata farante la manĝaĵojn, kiam ĉi tiujn ŝi konsideris pretaj eniris voki ilin, por ke ili sidigu ĉe la

tablo. Ĉi tio finis la brakpremadon ameman, kaj la duko prenis la infaneton el la pastro en siajn brakojn, kaj ĉe siaj brakoj li tenis lin tutan tempon de la pura kaj bone spicita eĉ luksega manĝaĵaro; kaj dum ili manĝis rakontis Korneliino ĉion, kio okazis ĝis la alveno al tiu hejmo pro konsilo de la dommastrino de la du hispanaj kavaliroj, kiuj servis, gastigis kaj gardis sin per plej honesta kaj akurata ĝentileco, kiun oni povis imagi. La duko rakontis al ŝi siavice tion, kio al li estis okazinta ĝis tiu momento. Ĉeestis la mamnutristino kaj la dommastrino, kaj ili havis de la duko grandajn proponojn kaj promesojn. En ĉiuj renaskiĝis la ĝojo pro la feliĉa fino de la okazintaĵo, kaj ili nur atendis kompleti kaj fari ĝin kiel eble plej sukcesinda kaj dezirinda per la alveno de Don Lorenzo, de Don Johano kaj de Don Antono, kiuj tri tagojn deponis tiu momento venis kvazaŭ flugante, avidemaj scii ĉu ian novaĵon pri Korneliino havis la duko, ĉar neniu novaĵon pri ŝia apero povis diri Fabio, kiu iris avizi ilin tial ke la armservisto nenion sciis.

Eliris akcepti ilin la duko al ĉambrego antaŭa je tiu en kiu estis Korneliino, kaj li eliris, ne montrante kontenton ian, pro kio la jus venintoj malĝojis. La duko devigis ilin sidiĝi kaj li sidiĝis kun ili, kaj alparolante al Lorenzo la duko diris:

—Bone vi scias, sinjoro Lorenzo Bentibolli, ke mi neniam trompis vian fratinton, pri kio estas bonaj atestantoj la ĉielo kaj mia konscienco; vi scias same la diligentecon per kiu mi estas serĉinta ŝin kaj la deziron, kiun mi estas havinta, trovi ŝin por fariĝi ŝia edzo, kiel mi promesis al ŝi; ŝi ne aperas, kaj mia promeso ne povas esti eterna; mi estas juna kaj ne tiel sperta pri la aĵoj de la mondo, ke mi evitu esti tirota de tiuj, kiuj proponas al mi la plezuron ĉiumomente; sama emo, kia devigis min promesi esti edzo ŝia al Korneliino, tiris min doni antaŭ ol al ŝi promeson pri edziĝo al terkulturistino de ĉi tiu vilaĝo, kiun mi pensis lasi trompata por alkuri al la valoro de Korneliino, kvankam mi ne alkuru al tio, kion postulis al mi la konscienco, kio ne estis malgranda pruvo pri amo; sed, ĉar neniu edziĝas kun virino, kiu ne aperas, nek estas aĵo prava ke iu serĉu la virinon, kiu lin forlasas, ĉar ĉi tio estus iri serĉi tiun, kiu abomenas lin, mi diras ke vi konsci, sinjoro Lorenzo, kian satigon mi povas doni al vi pro la ofendo, kiun mi ne faris al vi, ĉar neniam mi havis intencon ĝin fari al vi, kaj poste mi volas, ke vi donu al mi permeson por plenumi mian unuan promeson edziĝi kun la kamparanino, kiu jam estas interne de tiu ĉi domo.

Dum la duko ĉi tion diris, la vizaĝo de Lorenzo ŝanĝadis la koloron

mil fojojn, kaj li ne povis esti sidanta trankvile, klaraj signoj pri la kolero, kiu estis kaptanta liajn tutajn kapablojn. Same okazis al Don Johano kaj al Don Antonio, kiuj tuj sin decidis por ne toleri al la duko lian celon kvankam ili estu vidontaj sin devigataj forpreni al li la vivon. Legante, do, la duko sur iliajn vizaĝojn iliajn intencojn, li diris:

—Trankviliĝu, sinjoro Lorenzo, ĉar antaŭ ol vi respondos al mi parolon, mi volas, ke la beleco, kiun vi admiros sur tiun, kiun mi volas akcepti kiel edzinon, devigu vin doni al mi la permeson, kiun de vi mi petis; ĉar la beleco estas tia kaj tiel ega, ke ĝi pri plej grandaj eraroj estas senkulpigo.

Ĉi tion dirinte, la duko starigis kaj eniris kien Korneliino estis riĉege ornamata per ĉiuj juveloj de la infaneto kaj per aliaj multaj. Kiam la duko turnis la dorson, starigis Don Johano, kaj metante ambaŭ manojn sur la brakojn de la seĝo sur kiu estis sidanta Lorenzo, ĉe lia orelo, li diris:

—Je Santiago de Galicio, sinjoro Lorenzo, kaj je la fido de kristano kaj de kavaliro, kiujn mi havas, mi toleros, ke la duko atingu sian celon same, kiel mi fariĝos maŭro ĉi tie kaj ĉe miaj manoj li lasos sian vivon aŭ li plenumos la promeson, kiun al sinjorino Korneliino, via fratino, li estas doninta, aŭ almenaŭ li donos al ni tempon por serĉi ŝin, kaj ĝis kiam certe oni sciu ŝian morton, li ne povos edziĝi.

—Mi havas saman opinion—diris Lorenzo.

—Nu, ankaŭ saman opinion havos mia kamarado Don Antonio—re-diris Don Johano.

Je ĉi tio eniris tra la ĉambrego antaŭen Korneliino inter la pastro kaj la duko, kiu tenis ŝian manon, post ili venis Sulpicio, la servistino de Korneliino, la mamnutristino kaj la dommastrino de la du kavaliroj. Kiam Lorenzo vidis sian fratinton kaj li konvinkigis ke ŝi vere estis Korneliino, ĉar komence ŝajnis al li neebla tia okazaĵo kaj la ŝajno ne permesis al li kompreni la veron, faletante ĉe siaj piedoj mem, li sin jetis ĉe tiujn de la duko, kiu levis lin kaj lin metis inter la brakojn de lia fratino; tio estas, ke lia fratino brakpremis lin kiel eble plej ĝojege. Don Johano kaj Don Antonio diris al la duko, ke li okazigis la plej gentilan kaj spritan ŝercon de la mondo. La duko prenis la infaneton, kiun Sulpicio tenis, kaj donante la etuleton al Lorenzo li diris:

—Ricevu, sinjoro frato, viajn nevon kaj mian filon, kaj konsciu ĉu vi volas doni al mi permeson por mia edziĝo kun ĉi tiu kamparanino, kiu estas la unua al kiu mi estas doninta promeson pri edziĝo.

Oni neniam finus se oni rakontus tion, kion respondis Lorenzo; tion, kion demandis Don Johano; tion, kion sentis Don Antono, la entuziasmon de la pastro, la ĝojon de Sulpicio, la kontenton de la konsilintino, la miron de la mamnutristino, la suprizon de Fabio, kaj fine la ĝeneralan kontenton ĉies. Poste la pastro edzigis la geamantojn kaj estis ilia geedzigpatro Don Johano de Gamboa; kaj ĉiuj interkonsentis, ke tiu ceremonio restu sekreta ĝis kiam finiĝu la malsano, kiu restigis ĉe la vivlimo la dukinon, la patrino de la duko, kaj ke dume sinjorino Korneliino kun la frato revenu al Bolonio. Ĉion oni faris tiel: la dukino mortis, Korneliino eniris Ferraron, ĝojigante la mondon per sia ĉeesto, la funebro fariĝis gajaj luksaj festoj; la mamnutristino kaj la dommastro fariĝis riĉaj; Sulpicio fariĝis edzino de Fabio; Don Antono kaj Don Johano kontentegaj esti servintaj la dukon, kiu al ili proponis du siajn kuzinojn, kiel edzinojn, kun riĉega mondoto. Don Antono kaj Don Johano diris, ke la kavaliroj de la nacio *vizkaina* plej grandparte edziĝas en sia patrujoj; kaj ke ne pro maŝato, ĉar ĉi tio ne estis ebla, sed por plenumi laŭdindan kutimon kaj la volon de siaj gepatroj, kiuj jam certe promese edzigis ilin, ili ne akceptis tian honorigan proponon.

La duko akceptis ilian senkulpigon, kaj li, per manieroj diskretaj kaj honoraj, serĉante okazojn favorajn, sendis al ili multajn donacaĵojn al Bolonio, kaj iuj estis tiel riĉaj kaj tiel ĝustatempe kaj trafokaze, ke kvankam ili povis rifuzi la donacaĵojn por ne ŝajnigi ricevi pagon, la okazo, kiam la donacaĵoj alvenis, ebligis la ricevon, speciale tiujn, kiujn li sendis al ili je la tempo, kiam la kavaliroj ekdeiris al Hispanujo, kaj tiujn, kiujn li donis al ili, kiam ĉi tiuj iris al Ferraro por adiaŭi lin. kaj ili renkontis Korneliinon kun aliaj du etuletoj virinseksaj, kaj la dukon pli enamiginta ol iam. La dukino donis la krucon el diamantoj al Don Johano kaj la *agnus'on* al Don Antono, kiuj, ne povante rifuzi la donacojn, ĉi tiujn akceptis. La kavaliroj realvenis en Hispanujon, sian patrolandon, kie ili edziĝis kun riĉaj, ĉefaj kaj belaj virinoj, kaj ĉiam ili havis interkorespondadon kun la duko kaj la dukino kaj kun Lorenzo Bentibolli kun granda plezuro ĉies.



ATENTU!

TUJ aperos la unua kajero (32 paĝa) de la tutmondfama verko DON KIHOTO de MANĈUJO, ĉar S-ro Ludoviko Torrent, kompetenta presisto kaj tre entuziasma je nia helpa internacia lingvo Esperanto, prenis sur sin la taskon liveri al la Esperantistaro la grandiozan verkon iom post iom per sinsekvaj kajeroj, ĉar la traduko postulas grandan atentemon kaj laboron, tial ke estas nepre necesa por tia traduko granda fideleco, celante konservi kiel eble plej eĉ la stilon. Vere la entrepreno estas impona, sed la esperanta literaturo devas plenumi la taskon liveri al la tuta mondo la verkon de la senmorta Miĥaelo de Cervantes Saavedra.

Estas multenombraj la hispanaj eldonoj de ĉi tiu verko; sed estas unu majstra, tre grava kaj interesa, pro la granda nombro da rimarkoj pri la teksto, kaj ĉi tiun oni elektis. Ankaŭ por plej bona traduko de la vidpunktoj aluditaj, oni utiligos ĉefverkojn pri la Gramatiko kaj vortaro de la Kastila lingvo en Don Kihoto.

La kajero, 32 paĝa, koston 0,60 sv. fr., sed Asocioj, Grupoj, Librovendistoj kaj Esperantistoj, kiuj menĉu almenaŭ kvindek specimenojn havos 10 % da rabato. Ĉiam antaŭpago estas postulata. Oni ni akceptas respondkuponojn. Skribu tre klare.



FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESPERANTO
HISPANIA ESPERANTO-FEDERACIO

58. S-ro Francisco Azorín.—Claudio Marcelo, 18, *Córdoba*.
 59. » Antonio Sáez.—Sierpes, 13, *Sevilla*.
 60. Universidad Popular.—*Segovia*.
 61. Grupo Escolar de Santa Eulalia.—*Segovia*.
 62. S-ro Eduardo J. de Castro, Ingeniero.—*Gijón (Asturias)*.
 63. » Narciso Bofill.—Sindicato, 188, *Palma de Mallorca*.
 64. » Amalia Núñez.—Mayor, 48, *Pamplona*.
 65. » Cayetano Redondo.—Alonso Cano, 29, *Madrid*.
 66. » Alberto Díaz.—*Bata (Guinea Esp.)*.
 67. » Luis Rodríguez Escartín.—Ilustración, 8, *Madrid*.
 68. » Julio Blasco de la Torre.—*Olivenza (Badajoz)*.
 69. » Pascual Morató.—San Francisco, 129, *Liria (Valencia)*.
 70. » José Anglada.—Sitjas, 8, *Barcelona*.
 71. » Francisco Piñol.—Amalia, 16, *Barcelona*.
 73. » Emilio Pérez Núñez.—San Ildefonso, 10 y 12, *Madrid*.
 74. » Lucrecio Notario.—San Pedro, 38, *Puertollano (Ciudad Real)*.
 75. » Julián Sosa.—Gonzalo de Córdoba, 22, *Madrid*.
 76. » Juan del Pozo.—Gallinato, 4, *Sevilla*.
 77. » Manuel Vicente.—Macasta, 13, *Sevilla*.

HISPANA ESPERANTO-ASOCIO

(H. E. A.)

Se vi estas fervora esperantisto deziranta akceli triumfon de Esperanto en nia lando, vi tuj nepre aliĝu: al H. E. A., pagante la jarkotizon—Du pesetojn—, al la loka Grupo kaj al regiona Organizo. La membrokarto kostas 0,50, do, la unua jarkotizo estas 2,50 pesetojn. Se ankoraŭ viaj monrimedoj permesas al vi iun alian elspezon atentenu bone, ke.

UNIVERSALA-ESPERANTO-ASOCIO

(U. E. A.)

Boulevard du Théâtre, 12. Genève. Svisujo, estas gravega internacia Organizaĵo, kiu sukcese laboras por la triumfo de Esperanto en ĉiuj rondoĵoj de la nuntempa vivo, kaj ke vi devas aliĝi al ĝi pagante KVIN sv. fr., kaj U. E. A. liveros al vi jarlibron kun adresaro de Delegitoj en multenombraj urboj de la tuta mondo, pretaj fari al vi ĉiajn servojn pri komerco, turismo, k. c. Por hispanoj la kotizo estas 6 pesetojn.

PRESEJO TORRENT KAJ KOMP^o
Válgame Dios, 6
MADRIDO-HISPANUJO
1927
